

EL POPOLA

# ĈINIO


中国报道

11

1987







*Al foiro*

Foto de ŠEN ĆEN



## Enhavo

### JUBILEA JARO DE ESPERANTO:

Kongreso de Esperanto ĉe la sojlo de ĝia dua jarcento . . . . .	2
Mia kontribuo al la Centjara Jubileo de Esperanto . . . . .	11

ESP-NOVAĴOJ . . . . .	13
-----------------------	----

POR KOMENCANTOJ: Senbraka knabino . . . . .	29
---	----

La nuna stato de la elektra industrio de Ĉinio . . . . .	15
--	----

VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (11): La Ebenajo de Okcidenta Siĉŭan . . . . .	62
---	----

Estetika edukado en Ĉinio . . . . .	18
-------------------------------------	----

Ne tro laciĝu la terglobo . . . . .	30
-------------------------------------	----

Kuracado kaj sanprotektado plibonigitaj en la kamparo de Hunan . . . . .	33
--	----

NOVELO: Ŝjaŭŝjaŭ (Dua parto) . . . . .	36
--	----

### ĈINA LITERATURO:

Plej fruaj noveloj de Ĉinio . . . . .	40
---------------------------------------	----

Du el la ekstravagancaj noveloj de la dinastioj Ŭej, Ĝin, Sudaj kaj Nordaj . . . . .	43
--	----

Pomuj' vojrande . . . . .	44
---------------------------	----

ĈINAJ ARTOJ: Ĉinaj ceramikaĵoj . . . . .	22
--	----

Nove fondita Ĉina Muzeo de Poŝtmarkoj . . . . .	52
---	----

Tang Muhaj, la unua ĉina lernanto de Karajan . . . . .	54
--	----

TRA NIA LENSŬ: Popolaj artoj sur stratoj . . . . .	45
--	----

La unua pasejo de la Granda Muro . . . . .	56
--	----

Miljaraj trezoroj en ŝtondomo eltrovitaj . . . . .	48
--	----

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Nacia regiona aŭtonomio de Ĉinio . . . . .	59
---	----

La nuna internacia komerco kaj disvolviĝantaj landoj . . . . .	69
--	----

AMUZO . . . . .	58
-----------------	----

KURANTAĴ AFEROJ . . . . .	71
---------------------------	----

INTER NI . . . . .	51
--------------------	----

KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	10,29,58
------------------------------	----------

SUR LA KOVRILŬ: Rakonto pri la lago Ĵijŭetan (Ĝenro pri Gaŭŝan-nacieco)

de GOŬ SIŬĈING

INTERNE DE LA KOVRILŬ: Al foiro

Foto de SEN ĈEN

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: ĈINAJ POŝTMARKOJ

SUR LA DORSKOVRILO: La Sep Stel-rokoj

Foto de LIŬ ĜIBIN



# KONGRESO DE ESPERANTO ĈE LA SOJLO DE ĜIA DUA JARCENTO

de LIU CAISHENG

*Bonvenon, bonvenon, bonvenon  
Por ni ĉiuj,  
Bonvenon, bonvenon, bonvenon  
Por ni ĉiuj,  
Verda stelo nin allumas  
Niajn korojn ĝoj' brakumas  
Amilkeco nin kunfandu  
Kaj ni ĉiuj kune kantu.*

Por celebri la centjaran jubileon de Esperanto, 5 946 homoj de malsamaj haŭtkoloroj kaj kun malsamaj kredoj el 73 landoj de la kvin kontinentoj venis al Pollando, la naskiĝloko de Esperanto. Por bonvenigi la gastojn kaj sukcesigi la 72-an UK, la pola popolo bone faris la preparan laboron. Kaj tion ja montris la supre menciita kantoteksto.

La Palaco de Kulturo kaj Scienco, la kongresejo de la 72-a UK, estas majesta konstruaĵo 257 metrojn alta. En la tagoj de la kongreso ĝi aspektis aparte grandioza.

La solena inaŭguro de la kongreso okazis la 26-an de julio. Ĝin ĉeestis Roman Malinowski, alta protektanto de la kongreso kaj prezidanto de la pola parlamento, la estraranoj de UEA kaj Roman Dobrzyński, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio. S-ro Nigel Cassar, reprezentanto de la ĝenerala sekretario de UN, donis salutvortojn al la kongreso kaj partoprenis ĝin de la komenco ĝis la fino. La ĝenerala sekretario de Unesko s-ro Amadou Mahtar M'Bow sendis gratulan telegramon al la kongreso. Ĉeestis la inaŭguron kaj faris salutvortojn ankaŭ diplomatoj de multaj landoj en Pollando.

Pro limigo de la kongresejo la kongresa inaŭguro okazis dufoje en la sama tago.

Jarcento estas mallonga por ĉiu ajn lingvo en ĝia historia evoluo. En tiu tempo Esperanto disvolviĝis rimarkinde. Koncerne la historion de Esperanto, d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, diris: "Antaŭ cent jaroj, ĝuste en la hodiaŭa tago, en presejo apud nia nuna kongresejo, aperis malgranda libro. . . Malmultaj estis la homoj. . . kiuj povis ĝuste antaŭvidi, ke tiu eta kaj modesta broŝuro semos semon, kiu disbranĉiĝos en plenan kaj vivipovan lingvon, kiu etendiĝos en ĉiun angulon de la terglobo, kaj estos uzata por ĉiuj taskoj. . ." "Ĝi vivis spite al antaŭjuĝoj, spite al superteraj reformoj, spite al organizaj fuŝoj, spite al ĵaluzoj kaj kvereloj." S-ro Nigel Cassar menciis en sia parolo la disvastiĝon kaj funkcion de nia lingvo. Li diris: "Dum la pasintaj cent jaroj, milionoj da homoj lernis Esperanton kaj uzis ĝin kiel komunikilon je individua bazo. Esperanto faris multon por kunligi homojn de malsamaj fonoj, kulturoj kaj lingvoj, kaj uzante Esperanton ili transsaltis la lingvajn barojn. De post sia kreiĝo Esperanto fariĝis valida komunikilo kaj ĉiujare aperas meznombro 200 libroj en Esperanta traduko." Li diris ankaŭ, ke "La Universala Esperanto-Asocio kaj Unuiĝintaj Nacioj ĝuas intimajn rilatojn."

La kongreso plene montris al la mondo, ke Esperanto estas tre utila por defendi la mondpacon. Dum la pasintaj cent jaroj esperantistoj de diversaj landoj, alte tenante standardon kun verda stelo, faris sian kontribuon por preventi militon kaj defendi la pacon.

Antaŭ la kongreso esperantistoj de multaj landoj kolektiĝis en Gdansk, grava pola industria urbo ĉe la Balta Maro. Antaŭ 48 jaroj germanaj faŝistoj etendis tien siajn agresajn ungojn





### *La inaŭguro*

kaj taĉmento de la armitaj fortoj de Gdansk heroe rezistis 7 tagnoktojn kontraŭ la atako de iliaj aviadiloj kaj militŝipoj. Por rememorigi pri la heroaj agoj de la polaj defendantoj en la batalo por paco kaj libereco kaj por esprimi sian volon defendi justecon, pacon kaj liberecon, samideanoj de malsamaj haŭtkoloroj respektive metis florkronon al la monumento de Herooj.

Dum la kongreso la samideanoj vizitis tombejon de la homoj, masakritaj de germanaj faŝistoj en la Dua Mondmilito. Inter ili estis parencoj de L. L. Zamenhof.


S-ro Roman Malinowski diris en la kongreso, ke Zamenhof kreis la lingvon, “kiu servu la noblajn celojn de la eliminado de konfliktoj, inter la anoj de diversaj naciecoj, la lingvon, kiu servu la konstruadon de fido, interkompreniĝo kaj paca ordo”. “Mi parolas pri ĉi tiuj dolorigaj demandoj de nia mondo, ĉar mi konscias pri tio, ke por solvi ilin necesas interkompreniĝo, kaj ĉi tiun interkompreniĝon en la tuthomara skalo klopodas servi la lingvo Esperanto. Ne estas do mirige, ke la valorojn de ĉi tiu lingvo rimarkis ankaŭ Unesko, kiu proklamis du rezoluciojn pri la demando de iom vasta utiligo de Esperanto en internaciaj kontaktoj. Kaj la Monda Pac-

Konsilantaro, en unu el siaj rezolucioj, esprimis al esperantistoj rekonon pro la kontribuado al la firmigo de la paco kaj vastigado de la ideoj de frateco kaj amikeco inter la homoj de diversaj naciecoj. . . La paco estas samtempe vorto kaj celo — precipe proksima al la esperantistoj, kiuj konscias pri tio, ke nur en la kondiĉoj de la paco la Esperanto-movado povas ekzisti kaj evolui, kaj la lingvo — praktike servi la homaron.”

S-ro Amadou Mahtar M'Bow diris en sia gratula telegramo al la kongreso: “Esperanto konstante pruvis sian valoron kiel bonega perilo de interkompreniĝado inter popoloj kaj kulturoj kaj grave kontribuas al paco en la mondo.”

Laŭkutime en la kongresaj tagoj okazis multaj fakaj kunvenoj. En la Internacia Kongresa Universitato estis 23 prelegoj, el kiuj 8 temas pri naturaj sciencoj. El tio videblas, ke nia lingvo jam ludas sian rolon en la kampo de scienco kaj tekniko. La membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio, same kiel aliaj kongresanoj, ĉeestis diversajn fakajn kunvenojn. Ĝang Ĉjiĉeng, estro de la delegacio, diris en sia prelego “Per Esperanto por Lingva Egaleco” en la tago de la paco: “En la vera senco de la vortoj, paca kunvivado devas esti kunvivado en reci-





*S-ro Roman Malinowski (maldekstre), d-ro Humphrey Tonkin kaj s-ro Roman Dobrzynski (dekstre) sur la podio*

proka interkompreniĝo kaj amikeco, kaj interkompreniĝo kaj amikeco inter diversaj popoloj povas estiĝi nur sur la bazo de reciproka respekto kaj egaleco. Tiurilate, unu el la necesaj kondiĉoj estas la radikala forigo de lingva koloniismo, aŭ alivorte, elimino de lingva diskriminacio kaj starigo de lingva egaleco.” En kunveno de EVA fama ĉina verkisto Chun-Chan Yeh parolis pri la subteno de Lusin, fondinto de la nova ĉina literaturo, al Esperanto. Li diris, ke en la revuo “Tradukaĵoj” redaktita de s-ro Lusin aperis multaj verkoj elesperantigitaj, el kiuj multaj estis de malfortaj nacioj, precipe de orienteŭporaj. Li Ŝiĝjun (Laŭlum), vicĉefredaktoro de “El Popola Ĉinio”, en la ĝenerala kunveno pri la kongresa temo diris, kiel ĉinaj esperantistoj pere de Esperanto konigis al la ĉinaj legantoj fremdlandajn progresajn literaturajn verkojn dum la pasintaj 80 jaroj. Li laŭdis la turisman aferon en la pola urbo Bydgoszczy. Li montris, ke ankaŭ tio estas esperiga aktivado. Li Sen, ĉina fervoja fakulo, en la kunveno de la Internacia Fervojista E-Federacio (IFEFF) konigis al la ĉeestantoj la pasintecon kaj estantecon de la

elektrizitaj fervojoj en Ĉinio. Li donacis al IFEFF lignoskulptaĵon.

Tiu senprecedence granda kongreso ludis bonan rolon por akceli la amikan kontakton inter la diverslandaj esperantistoj. Antaŭ la kongreso esperantistoj de multaj landoj renkontiĝis en Gdansk. Sur altaĵo, kiu ebligas birdvidon al la senlima Balta Maro, ĉiulandaj esperantistoj elektis sian reprezentanton por planti Esperanto-Kverkon laŭvice de la komenclitero de ties nomo en la Esperanta alfabeto. En la fundo de la kavo oni metis porcelanan teleron fabrikitan speciale por la nuna kongreso. Ĝang Ĉjiĉeng diris antaŭ sia buto de la arbo: “Esperanto simbolas pacon kaj amikecon. Nun ni plantu pacon kaj amikecon!”

Juna franca esperantisto Jorgos Christian Lavarenne kun siaj amikoj bicikle traveturis preskaŭ la tutan Eŭropon por partopreni la kongreson. Ili ekveturis de Ceret, trans Pireneojn, preter Hispanion kaj tra Parizo, Genevo, Bruselo, Kolonjo, Hamburgo kaj Kopenhago, kaj fine atingis Varsovion la 25-an de julio. Survoje ili





*La fermo de la kongreso*

*Antaŭ la statuo de Zamenhof en Bjalistoko*





*Granda kunveno en Bjalistoko aprobas la proponon de s-ro Roman Malinowski pri fondo de la Monda Esperanto-Centro en tiu urbo.*



*S-ro Roman Malinowski (maldekstre) kaj d-ro Ludoviko Zaleski (dekstre), nepo de Zamenhof, en la kongreso*





*Prezentado antaŭ la kongresejo*



*La Ĉina Esperanto-Delegacio antaŭ la kongresejo*

*Kongresanoj antaŭ la inaŭguro*



*En Kalocsay-salono iras prelego.*



*Kunsido de EPĈ-legantoj*



propagandis Esperanton. La vojaĝo de Jorgos interesis multajn kongresanojn. Oni fotiĝis kun li unu post alia kaj donacis al li memoraĵojn.

La arta programo de la kongreso estis abunda. En la filmo "Ie en Eŭropo" ĉiuj roluloj parolis Esperanton. La filmo produktita de Hungario faris sensacion en la kongreso. Krome, tre allogis la rigardantojn ankaŭ la filmo "Post 20 Jarcentoj" kaj la teatraĵo "Vizaĝoj kaj Masoj" ludita de la Gdanska Esperanto-Teatro. La monologo "Zamenhof" ludita de unu sola aktorino, en kiu ŝi ludis la rolojn de la patrino, edzino kaj filino de Zamenhof, spegulis la vivon de L. L. Zamenhof. Ĝi estis ludita 6 jarojn, tamen ĉi-foje ĝi ricevis denove varmajn aplaŭdojn. Multe ludis ankaŭ sovetuniaj kaj orient-eŭropaj esperantistoj. La kanto kaj danco sur strato allogis multajn pasantojn.

Estas neforgesebla la vizito al Bjalistoko, la naskiĝloko de L. L. Zamenhof. La 29-an de julio 500 kongresanoj venis tien. Ili aprobis "Deklaron de Bjalistoko" al la ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo. La deklaro alvokas, ke la popoloj de diversaj landoj plioftigu senperan kontakton, kiu tamen postulas komunan lingvon. Ĝi diras: "Esperanto — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo." "Tial, ni rekomendas al ŝtatestroj,



*En la vespero en Bydgoszcz*

registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo."

La kongreso decidis starigi la Mondan Esperanto-Centron en Bjalistoko kaj alvokis, ke oni kontribuu al ĝi per mono. Pola geedza paro la unua donacis al ĝi 20 000 zlotojn. La centro ampleksas muzeon, bibliotekon, salonon, sporthalon k. a.



*Plantado de kverko omaĝe al la jubilea jaro de Esperanto*



*Memoraĵojn al EPC-legantoj en la kunsido*

La kongreso decidis fondi la Azian Esper-Centron kaj nun UEA kontaktiĝas kun koncernaj aŭtoritatoj.

La 30-an de julio kunsidis redaktoroj de EPC kaj ĝiaj legantoj en la salono Felikso. Tuj ĉe la komenco de la kunsido la salono kun 300 sidlokoj estis plenplena de ĉeestantoj. La malfruiĝintoj do devis stari ĉirkaŭe kaj eĉ ekster la pordo. La 300 ekzempleroj de "El Popola Ĉinio", insignoj kaj aliaj donacetoj estis baldaŭ

elĉerpitaj. Post la parolo de Li Siĝjun pluraj ĉeestantoj tuj sin direktis al la mikrofono. Por ŝpari tempon, oni tuj staris en vico. Antaŭe sovetuniaj samideanoj malofte ĉeestis tian kunsidon, sed ĉi-foje ili venis kaj faris varmajn kaj amikajn parolojn. Krom laŭdo kaj kuraĝigo oni prezentis al ni ankaŭ utilajn proponojn. Iuj esprimis sian deziron, ke Ĉinio faru grandan kontribuon al la Esp-movado en Azio, aliaj proponis aperigi plu artikolojn konvenajn al la komencantoj, eviti neologismojn, daŭrigi la ĉin-lingvan kurson, kaj triaj esperis, ke EPC konigos la tradician ĉinan brodarton. . . Iuj samideanoj kritikis nin pri la transskribo de propraj nomoj en nia revuo.

Tagmeze de la 1-a de aŭgusto la martelado sur la podio anoncis la finiĝon de la jubilea jaro de Esperanto kaj komenciĝon de ĝia dua jarcento. Falis la kurteno de la 72-a UK, tamen por realigi la idealon de Zamenhof, ni devas fari multajn laborojn. Ĉi-flanke samideanoj de la pola urbo Bydgoszcz donis al ni bonan ekzemplon. Tie ĉirkaŭ duono de la loĝantaro parolas Esperanton. Prave diris ĉina Esperanto-poeto Laŭlum en sia poemo:

*Esperanton vi praktikos,  
Laŭ model' de pola Bidgoŝ?  
Bona estas la decido.  
Paŝojn faru kun memfido!  
Bidgoŝ iĝu monumento,  
De la granda Nova Sento  
En la Dua Novjarcento.*

## KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* La Studenta Verdstelo-Klubo en Jilin-a Teknologia Universitato dez. kor. t.m. Esperante, angle aŭ ruse. Skribu al: s-ro Liu Minghui, 116-003 Sidalin Dajie, Chang Chun, Jilin, Ĉinio.

\* 17-j. fraŭlo dez. kor. kun 13-20-j. knabinoj pri ĉiuj temoj el Svedio, Aŭstrio, GFR, GDR, Turkio, kaj Jugoslavio. Adr.: Majid Jafari, Sarbaz Shahid Page Saĵa, Hassan Abad, N-ro 25, Tabriz, Iran.

\* 14-j. knabino vol. kor. tutmonde rumane, germane aŭ Esperante kun kolektantoj de bildkartoj. Adr.: Nica Marilena, Codru Cosminului Nr. 72, Bl. 16, sc.A., ap.3. Brasov-2200, Rumanio.

\* 12-j. Gall Attila dez., interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bk. Adr.: Gall Attila, Cornisa, Bl 3, ap. 13, Jud: Mures, Cod: 4300, Rumanio.

\* 35-j. geedzoj dez. kor. kun bredistoj de hundoj chow-chow kaj pri aŭtoturismo, Jaromir Veverka, Běloveská 1672, 547 01 Náchod, Ĉeĥoslovakio.

\* Mi deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj Esperante, angle aŭ france LINDOLFO CAMPOS, Poŝtkesto 253, 58100 Campina Grande-PB, Brazilo.

\* 22-j. esperantisto interesiĝas pri filozofio, literaturo, fotografio kaj turismo kaj vol. kor. tutmonde pri diversaj temoj. Stanislav Debski, Str. Glowna 55, 97-122 Rozyca, Pollando.

\* 18-j. knabino dez. kor. kun geamikoj en Afriko, Ameriko kaj Azio pri diversaj temoj, Hofman Erika, Roze Luksemburg 12, 25000-Sombor, Jugoslavio.

\* Mi dez. kor. pri ĉiuj temoj kun amikoj ĉefe el Hungario, Rumanio, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj Jugoslavio, Bede Hujnal (23-j.), Str. Inimii, Bl: 10, ap: 50, 4100, M. Cive, Jud: Harghita, Rumanio.



# MIA KONTRIBUO AL LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO

La 3-an de julio 1986, Zorka kaj mi estas antaŭ centoj da Egelnantoj en la Pekina Instituto de Lingvoj. Preskaŭ unu monaton ni restas kune. La kursoj daŭras tri semajnojn kaj poste estas la Internacia Konferenco de Sciencistaj Esperantistoj.

Neniam ni travivis tiom interesan kaj ĝojigan periodon. La kursoj okazas matene; sed posttagmeze, kiam ni promenas en la parko, ofte ni renkontiĝas kun la gelernantoj; rapide formiĝas grupo kaj komenciĝas la diskutoj. Tre agrable estas konstati ke ne plu la instruantoj starigas la demandojn, sed respondas al la petoj de niaj simpatiaj geamikoj, multe pli parolemaj posttagmeze ol matene; pro tio ke la temoj estas tute liberaj.

Ĉiu donis sian adreson kun sia nomo, en Esperanto kaj en ĉinaj ideogramoj. Kun la jamaj korespondantoj mi havas nun longan liston; eble cent kvindek.

Ofte trafas nin la demando:

“Ĉu vi skribos al mi?”

“Mi provos certe.”

Mi jam diris, ke de kvardek jaroj mi estas esperantisto; mi aldonas ke neniam la disiĝo post gravaj renkontiĝoj estis tiom kortuŝa kaj dolora. Ĉar Ĉinio kaj Francio situas tiom malproksime unu de la alia; ĉiu pensis verŝajne, ke la “ĝis revido” estas definitiva. Mi ripetas nun ke



*La aŭtoro (dekstre) kaj lia edzino (la kvara de dekstre) vizitas la Orientan Maŭzoleon en Ŝenjang.*

ni revidiĝos; pasis nur kelkaj monatoj kaj viaj maljunaj francaj geamikoj jam denove strebas al via kara lando, kie ili pasis tiom belajn tagojn kaj vivis neforgeseblajn momentojn. Ĉiutage estis festo en la koro.

Ni sciis ke ni vojaĝos nordorienten post la UK, sed foje mi provis havi kelkajn detalojn:

“Kien?” “Nordorienten.”

“Kiam?” “Post la kongreso.”

La respondoj ne estis sufiĉe kontentigaj, laŭ mia ideo, kaj mi pretis pensi ke niaj amikoj iom neglektis nian ekspedicion. Sed estis kialoj; ili havis tiom da zorgoj pro la kongreso.

Iun vesperon “niaj” ŝoforo kaj veturilo, kiuj fakte estas niaj de unu monato, kondukas nin al la Pekina Stacidomo, kie ni estas ennestigitaj en kvarkuŝeta kupeo de unuaklasa vagono,

kun niaj du ĉiĉeronoj. Dek kvin horojn poste ni atingas nian celstacion Anŝan en Ljaŭningprovinco.

Ĝis nun mi ne sciis precize kiel estas akceptataj eminentaj gastoj en Ĉinio. Nun mi scias: Delegacio iras renkonte al la vizitantoj kun interpretistoj, fotistoj kaj raportistoj. Okazas la oficialaj ceremonioj. Estas bankedoj, multaj tostoj, paroladoj kun la partopreno de la plej altaj funkciuloj. Ĉiutage estas vizitoj al diversaj entreprenoj: kombinaĵoj, uzinoj, fabrikoj; al lernejoj, institutoj, stadionoj ktp. Foje estas ekskursoj al pitoreskaj lokoj, kamparoj, eĉ al najbaraj urboj kies reprezentantoj oficiale akceptas la gastojn, ofertas bankedon, interŝanĝas donacojn. Tio ĉi estas kvazaŭ laborparto; sed kompreneble ankaŭ estas distraj momentoj: kunvenoj kun amikoj kaj libervola diskutado;



*La aŭtoro (la sesa de dekstre en la fronto) kaj esperantistoj de Anŝan*

vesperaj varieteoj kun orkestro, balo, kantoj, deklamoj, teatraĵoj; spektado al plenaeraj sportludoj kiun partoprenas gejunuloj en buntaj vestaĵoj el la tuta lando.

Jen tio kion ni spertis en Anŝan dum la tuta semajno.

Jen kiel tiu industria ŝtalarbo kun 1 274 000 loĝantoj, honoris du simplajn francajn esperantistojn. Mi hontas, mi konfuziĝas, mi pentas kaj pardonpetas, ĉar iam mi pretis ekdubi pri la zorgemo de miaj karaj ĉinaj geamikoj.

Kia perfekteco en tiu organizado!

La saman perfektecon ni ĝuis dum nia ekskurso al Daljan kaj nia restado en Ŝenjang. Vizitoj al la urbo; kunvenoj kaj festenoj kun niaj samideanoj. Rapide pasas la tempo kaj ankaŭ elĉerpiĝas niaj fortoj. Denove mi petas pardonon al niaj tiom zorgemaj gesamideanoj.

De Ŝenjang ni devis vojaĝi al Harbin, laŭ la plano. Estas tre alloga perspektivo iri ĝis tiu norda urbo kaj denove trovi

konatulojn, kiuj atendas nin kun vasta programo. Sed kion fari, kiam sentiĝas laceco kaj prezentiĝas du longaj pertrajnaj veturadoj. Proksimume 15-hora de Ŝenjang al Harbin; kaj 30-hora de Harbin al Pekino. Vere je nia bedaŭro, ni devis rezigni pri tiu tro laciga ekspedicio.

Do ni revenis al Pekino per malgranda helica aviadilo, kiu flugas nek rapide, nek alte kaj tiel ebligas al ni spekti la dense loĝatan ebenaĵon, tre belan, kaj transflugi la montojn sur kies krestoj ripozas la fama Granda Muro. Grandioza spektaklo!

Kaj jen denove Pekino; la Instituto de Lingvoj; nia ĉambro kaj niaj fidelaj amikoj, kiuj ofertas la lastan bankedon en la restoracio de la Instituto antaŭ la starto al la aerodromo kun deko da geamikoj. Lastaj manpremoj; lastaj ĝisoj; lastaj mansvingoj ĝis kiam ni dronas en la homa svarmo.

En 1987, mi estas 70-jara homo, 40-jara esperantisto, 30-jara korespondanto de EPC kaj 15-jara prezidanto de "Rueil

Esperanto". Tiom da jubileo kaj datrevenoj mi devas celebri; sed kiel? Multajn konsilojn mi legis.

Antaŭ sep jaroj mi sendis artikolon al EPC kun niaj adreso kaj foto sur la publika placo dum Esperanto-ekspozicio; ĉeestis ankaŭ nia urbestro de Rueil-Malmaison. Tiu dokumenteto aperis en ĉina-esperanta revuo "La Mondo" n-ro 1/1985. Tuj venis leteroj el diversaj provincoj de Ĉinio. Al ĉiu mi respondis kaj la reto vastiĝis ĝis proksimume 50 gekorespondantoj, ĉiuj ege entuziasmaj ĉar finfine povis uzi Esperanton por korespondi kun eksterlandano.

Sed la tasko estis peza, kaj mi pensis ke aliaj okcidentaj esperantistoj povus same kiel mi, korespondi kun miaj ĉinaj konatuloj. Kaj komence de la jaro 1986 mi skribis artikolon por instigi la legantojn al korespondado kun ĉinoj. Ĝi aperis en "SAT-Amikaro", franclingva buŝteno, sub la titolo "Helpon" en n-ro 4/1986. Venis multaj petoj kaj tiel mi donis al ĉiuj miaj ĉinaj leteramikoj novan francan korespondanton.

"El Popola Ĉinio" n-ro 12/1986 presis la saman artikolon sub la titolo "Laŭ nia sperto" kaj venigis leterojn al ni el la tuta mondo; eĉ el Ĉinio.

"Esperanto Fervojisto" monata bulteno de la francaj esperantaj fervojistoj, reprenis ĝin en sia n-ro 2/1987, kaj tiele, daŭre venadas petoj, ĝis nun ĉirkaŭ 80, sed nia ĉina listo entenas preskaŭ du cent adresojn. Do mi donas po 2 aŭ 3 adresojn al ĉiu petanto esperante ke ĉiu ĉina amik(in)o ricevos leteron

*(Daŭrigo sur p. 20)*



## ESPERANTA EKSPOZICIO EN PEKINO

De la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazis en Pekino Esperanta ekspozicio por memorigi la 100-jaran jubileon de Esperanto.

La ekspozicio prezentis ĉefe la E-movadon en Pekino, la sintenon de ĉinaj gvidantoj kaj famuloj al Esperanto, Esperantaj eldonadoj kaj elsendon. Ĝi montris Esperantajn librojn, gazetojn kaj filatelajojn.

La ekspozicion vizitis miloj da personoj, inter kiuj estis ĉinaj eminentuloj, esperantistoj kaj Esperanto-simpatiantoj. En la ekspozicio vendiĝis pli ol 2 000 ekzempleroj de Esperantaj libroj kaj gazetoj, memorigaj poŝtmarkoj kaj unuataĝaj kovertoj emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko por la 100-jara jubileo de Esperanto. La Centra Televido de Ĉinio kaj la Pekina Televido raportis pri la inaŭguro de la ekspozicio.

La ekspozicion organizis la Pekina Esperanto-Asocio, la redakcio de "Ei Popola Ĉinio", Radio Pekino, la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉi-

*En la Esperanta ekspozicio por la centjara jubileo de Esperanto en Pekino*



na Akademio de Sciencoj kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

## ĈINAJ PROVINCOJ FESTIS LA 100-JARAN JUBILEON DE ESPERANTO

En la lasta tagdeko de julio la Esperantaj organizaĵoj de la provincoj Hubej, Gŭangdong, Junnan, Henan kaj Ĝeĝjang kaj la urboj Uhan, Kantono kaj Ĉengĝoŭ solene celebris en diversaj manieroj la 100-jaran jubileon de Esperanto.

Hubej-provinco kaj Uhan festis en la Halo de la Uhan-a Popola Registaro. Gvidantoj de la lokaj partiaj kaj registaraj institucioj ĉeestis la festadon kaj faris paroladon. Ili substrekis la valoron de Esperanto en la socia vivo de la homaro kaj kuraĝigis gejunulojn bone lerni kaj apliki Esperanton por fari kontribuon al interkompreniĝo inter diverslandaj popoloj

kaj interŝanĝo de kulturo, scienco kaj tekniko.

La Gŭangdong-a Esperanto-Asocio publikigis specialan eldonaĵon por la 100-jara jubileo de Esperanto kaj specialan folion por propagando de Esperanto. Je Ŝjŭanping, provincestro de Gŭangdong, skribis titolon por la eldonaĵo, kiu prezentis la vivon de Zamenhof en lia juneco, lian Unuan Libron, la historion kaj la nunan staton de la E-movado en Gŭangdong-provinco kaj Kantono, la opinion de famuloj pri Esperanto kaj scienc-teknikajn kaj literaturajn verkojn en Esperanto.

Por festi la 100-jaran jubileon de Esperanto, kunvenis en Kunming, Junnan-provinco, 200 esperantistoj el la naciecoj han-a, ti-beta, baja, hani-a kaj ji-a. La lokaj radiostacio, televida stacio kaj ĵurnalo raportis pri la kunveno.

Similaj kunvenoj okazis ankaŭ en la provincoj Henan, Ĝeĝjang kaj Ŝandong kaj en la urboj Ĝengĝoŭ, Hangĝoŭ, Ŝinŝjang, Ĉingdaŭ, Ĉangĝji kaj Hengjang.

## ESPERANTAJ FILATELAĴOJ EN ĈINIO

La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis multajn filatelajojn okaze de la 100-jariĝo de Esperanto.

*Esperantaj unuataĝaj kovertoj por la centjara jubileo de Esperanto*





*Esperantistoj de Ĉangŝa festas la centjaran jubileon de Esperanto.*

Krom ke la ministerio emisiis la jam konatan memorigan poŝtmarkon por la 100-jara jubileo de Esperanto, ankaŭ poŝtoŝtampoj kaj kompanioj de poŝtmarkoj de 17 urboj eldonis Esperantajn unuataĝajn kovertojn kaj tiuj de 26 urboj faris Esperantajn stampilojn por la jubileo. Esperantaj filatelaĵoj neniam estis tiel riĉaj en la historio de la ĉina E-movado. Tio montras, ke Esperanto havas certan influon en Ĉinio. Esperantaj unuataĝajn kovertojn eldonis kaj Esperantaj stampilojn faris Pekino, Ŝanhajo, Tjanĝin, Nankino, Suĝoŭ, Ĉangĝoŭ, Ĉangŝu, Ĉjiŝujan, Ĝjading, Ŝjian, Ŝenjang, Urumĉi, Ĉangĝji, Hefej, Maanŝan, Fuĝoŭ, Ĝengĝoŭ, Ŝinŝjang, Ĉangŝa, Kantono, Ŝenĝen, Ĝjangmen, Nanning, Ĉengdu kaj Kunming. La poŝtoŝtampo de Mjanjang, Siĉuan-provinco, emisiis Esperantan memorkoverton kun Esperanta memorstampo. Menciindas, ke la unuataĝaj kovertoj projektitaj de s-ano Ĝang Linĵuj por Ĉangĝoŭ, Ĉangŝu kaj Suĝoŭ estas multe ŝatataj. La kovertoj

surhavas bildojn de Zamenhof, verda stelo kaj la Unua Libro, kiuj bone sugestas la signifon de la 100-jara ekzisto de Esperanto.

### **ĈINA GAZETARO RAPORTIS PRI MEMOR-AKTIVADOJ DE LA 100-JARA JUBILEO DE ESPERANTO**

De junio la ĉina gazetaro multe raportis pri memoraktivadoj de la 100-jara jubileo de Esperanto. En julio lastjare kelkdek ĵurnaloj raportis pri la 71-a UK. Ĉi-jare, sekve de la memoraktivadoj de la 100-jara jubileo de Esperanto en diversaj lokoj, refoje aperis en la ĉina gazetaro nova alttajo subteni Esperanton. La Ŝinhŭa-novaĝ-agentejo plurfoje informis pri la 72-a UK kaj la Popola Ĵurnalo trifoje publikigis la informojn. La Centra Televizio de Ĉinio kaj Radio Pekino ĝustatempe raportis pri la memor-kunveno kaj Esperanta ekspozicio en Pekino. La gazeto "Ĉina Junularo"

*Partoprenantoj de la 82-a Kongreso de Skota Federacio Esperantista sur la unua Esperanta strato en Skotlando*



aperigis la artikolon "Internacia Kongreso sen Interpretisto" por detale prezenti la 72-an UK. La gazeto "Poŝto de Fuĉeng" eldonis specialan numeron por jubilei Esperanton. "Ekonomia Ĵurnalo", "Ĵurnalo de Ĝuĝoŭ" kaj "Ĵurnalo de Hengjang" aperigis artikolojn kaj informojn pri Esperanto. Radiostacioj, televidaj stacioj kaj ĵurnaloj de diversaj provincoj kaj urboj ĝustatempe raportis pri la lokaj memor-aktivadoj.

### **MUZEO DE PACO KAJ SOLIDARECO EN SAMARKANDO**

Laŭ iniciato de lokaj E-aktivuloj en Samarkando fondiĝis Muzeo de Paco kaj Solidareco en la urbo-centro. En ĝi troviĝas eksponataj pacpropagandiloj el pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj. La organizantoj de la unika Muzeo konstante kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn materialojn pri batalo de la popoloj kontraŭ militarismo, faŝismo kaj novkoloniismo, por la paco, socia justeco kaj progreso, kaj volonte akceptas dokumentojn kaj rememorojn de veteranoj-kontraŭfaŝistoj kaj leterojn de diverslandaj pacbatalantoj. Bv. direkti ĉiujn kontribuojn al: Museum of Peace and Solidarity, c/o International Friendship Club "Esperanto", P.O. Box 76, 703000 Samarkando, Uzbekistan, USSR.

### **ESPERANTO-KURSO EN MAR DEL PLATA**

Okaze de la centjariĝo de Esperanto la Mar del Plata Esperanto-Klubo organizis, la 4-an de aprilo, Esperanto-kurson sub la aŭspicio de la Komunuma Kultur-Sekretariejo, Societo de Verkistoj de la Bonaer-provinco kaj Societo de Pollandanoj en Mar del Plata. Ĝin partoprenis ĉ. cent gelernantoj. Samtempe kun tio strato de la urbo nomiĝas "Strato de la Esperanto-Lingvo".

Ili volas kontaktiĝi kun esperantistoj en aliaj landoj, precipe tiuj, kiuj ne parolas la hispanan. Skribu

JAN ĜJAN:


# LA NUNA STATO DE LA ELEKTRA INDUSTRIO DE ĈINIO

En la lastaj jaroj la elektra industrio de Ĉinio disvolviĝis rapide. En la fino de 1985, la totala elektra produkto-kvanto kaj totala kapacito de generatoroj jam atingis 410 miliardojn da kWh. kaj 86.29 milionojn da kilovattoj kaj okupas la 5-an kaj 7-an lokojn de la mondo respektive. En 1986 la pliigita kapacito de generatoroj en nia tuta lando superis 5 milionojn da kilovattoj kaj la totala elektra produkto-kvanto atingis 445 miliardojn da kWh., je 9.4% pli multe ol tiu en 1985. Ĝia kresko superis la industrian.

La baza politiko de Ĉinio pri disvolvo de la elektra industrio estas: aktive disvolvi termoelektron, plenergie ekspluati hidroelektron, laŭ plano kaj laŭ lokaj

kondiĉoj konstrui nuklean elektrejon kaj samtempe ekspluati naftan skiston, ventopovon, tervarmon, sunenerĝion kaj tajdo-enerĝion.

De multaj jaroj, la termoelektra konstruado okupas gravan lokon en la elektra industrio de Ĉinio. En 1985, la totala kapacito de generatoroj kaj produkto-kvanto de termoelektra okupis 69.7% kaj 77.5% respektive en la totala kapacito de generatoroj kaj la totala produkto-kvanto de elektro de Ĉinio. En la 50-aj kaj 60-aj jaroj oni konstruis elektrejojn ĉefe en grandaj kaj mezgrandaj urboj. Kun la disvolviĝo de la tekniko pri altensia kaj ultraaltensia elektrotransmisio, Ĉinio kiel eble plej multe utiligis siajn favorajn kondiĉojn de abunda



*Altensiaj elektro-transmisiaj lineoj de Liŭĝjaŝja-hidroelektrejo*

karbo kaj rapidigis la konstruadon de elektrejoj en regionoj de karbominejoj. Ekfunkciis unu post alia Fuŝin-elektrejo de Ljaŭning-provinco, Ljanghŭaj-elektrejo de Anhuj-provinco, Ĝjaŭzŭo-elektrejo de Henan-provinco, Laj'u-elektrejo de Ŝandong-provinco kaj aliaj grandaj elektrejoj en la karbominejaj regionoj. La novaj grandaj elektrejoj en karbominejoj estas Datong-elektrejo en Ŝanŝji-provinco, Ŝjuĝoŭ-elektrejo en Ĝjangsu-provinco, Zoŭŝjan-elektrejo en Ŝandong-provinco,

al: Mar del Plata Esperanto-Klubo, Hernandarias 5558, 7600 Mar del Plata, Argentino.

## LA UNUA ESPERANTA STRATO EN SKOTLANDO

La 9-an de majo 1987, kiam okazis la 82-a Kongreso de Skota Federacio Esperantista, strato estis nomita kiel "ESPERANTO ROAD", kiu estas la unua Esperanta strato en Skotlando kaj signis la Jubilean Jaron de Esperanto. Ĝin inaŭguris s-ino H. Wyvill el la distrikta konsilantaro ĉe Prest-

wick. S-ro W. Auld, fame konata Esperanta poeto kaj aŭtoro dankesprimis pro la okazo.

## KOLEKTO DE STRATPANELAJ FOTOJ

ESPERANTO, 481 Square Zamenhof, F-73000 CHAMBERY, FRANCIO kolektas fotojn de la stratpaneloj kun "ZAMENHOF" aŭ "ESPERANTO" en via urbo. Ili petas, ke oni sendu ĝin al ili, kaj kompanse ili sendos tiun de CHAMBERY.

## TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ


La P.T.T.-a Esperanto-Asocio celas eldoni meze de 1988 "Tutmondan adresaron de la esperantistoj". Por senpage registri vian adreson, vi nepre devas enskribi ĝin sur speciala karto, kiu estas mendebla ĉe: Esperanto-PTT, F-05004 GAP CEDEX, Francio. 5 kartoj kontraŭ 1 internacia respondkupono, 15 kartoj kontraŭ 2 irk., 30 kartoj kontraŭ 3 irk. aŭ egalvaloroj en nestampitaj poŝtmarkoj de via aŭ de alia lando.



Jūanbaŭŝan-elektrejo en la Interna Mongolio kaj Doŭhe-elektrejo en la urbo Tangŝan, Hebej-provinco. Tiuj ĉi elektrejoj ludas gravan rolon en la ekonomia disvolviĝo kaj plibonigo de la livero de elektro al industrio kaj agrikulturo.

Post kiam Ĉinio ekpraktikis pordomalferman politikon, la ekonomio de la apudmaraj malfermaj urboj disvolviĝis rapide kaj sekve multe pligrandiĝis la elektra bezono. Por iom post iom plibonigi la tian elektran liveradon, Ĉinio planis konstrui 28 havenajn elektrejojn kun la totala kapacito de generatoroj de 20 milionoj da kilovattoj kaj jara elektra produkto-kvanto de 120 miliardoj da kWh. La havenaj elektrejoj estas naturdotitaj en transporto de energio. Oni povas malvarmigi elektroproduktajn

*La unua ĉina turbinogenerato-ro kun kapacito de 600 000 kilovattoj, produktita de la Harbin-a Fabriko de Elektraj Maŝinoj*



maŝinojn rekte per marakvo kaj amasigi cindron ĉe la marmalprofundaĵo por konstrui kampon. Kaj krome, la elektro estas liverata al apudmaraj ekonomie evoluintaj regionoj, tiel ke la distanco de elektra transmisio estas multe mallongigita kaj oni povas ŝpari monon por konstrui elektran transmision linion. La ekonomia efiko estas granda. Nun 15 havenaj elektrejoj tra la lando estas en konstruado. Ili pliigos elektro-produktopovon je 8 milionoj da kilovattoj post sia transdono al uzado. Tio certe ludos gravan rolon por ekonomia disvolvigo kaj internacia ekonomia interŝanĝo de la apudmaraj regionoj.

Ĉinio estas abunda je akvaj riĉfontoj. Pro tio, ĝi metis ekspluatadon de hidroelekto en tre gravan lokon. En 1985 la totala kapacito de hidroelektraj generatoroj jam atingis 26.26 milionojn da kilovattoj, kiuj konsistigis 31.7% de la totala kapacito de Ĉinio. La produkto-kvanto de hidroelekto atingis 91 miliardojn da kWh, kiuj konsistigis 22.8% de la totala produkto-kvanto de elektro de Ĉinio. Pro longa tempo de la hidroelektra konstruado kaj manko de kapitalo, nun estas malfacile grand-skale fari tian ekspluatadon. Oni devas konstrui elektrejojn nur en la loko kun bonaj naturaj kondiĉoj kaj alta ekonomia efiko. La dua granda rivero en Ĉinio — la Flava Rivero estas ekspluatita kompare frue. Ĉe ĝiaj supra kaj meza basenoj jam konstruiĝis Ĉingtongŝja-, Liŭĝjaŝja- Ŝanmenŝja- kaj aliaj 3 hidroelektrejoj. Ilia totala kapacito de generatoroj estas 2.322 milionoj da kilovattoj. Inter ili Liŭĝjaŝja-elektrejo estas la plej granda kun kapacito de 1.16 milionoj da kilovattoj. Tiuj ĉi hidroelektrejoj liveras sufiĉan kaj malmulteko-


stan elektron al la industria produktado de la kvar provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de nordokcidenta Ĉinio. Por akceli la hidroelektran industrion Ĉinio konstruis ankaŭ plurajn grandajn hidroelektrejojn ĉe aliaj riveroj en Ĉinio, ekz., la ŝlosila akvo-utiliĝaĵo Geĝoŭba sur Jangzi-rivero, la unua granda rivero en Ĉinio, estas la plej granda hidroelektrejo konstruata en la lando. Ĝi situas ĉe la elfluejo de la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero. Ĝia totala kapacito de generatoroj estas 2.715 milionoj da kilovattoj kaj jara meza elektra produkto-kvanto estas 15.7 miliardoj da kWh. La unua-perioda konstruo kun kapacito de 965 000 kilovattoj estas finkonstruita kaj komencis produkti elektron. Koncerne la dua-periodan konstruon, en 1986 jam ekfunkciis kvar generatoroj, ĉiu kun kapacito de 125 000 kilovattoj kaj la kvina generatoro estas instalata nuntempe. La konstruado de Geĝoŭba montris novan nivelon de la hidroelektra konstruado de Ĉinio. De 1986 ĝis 1990, Ĉinio laŭplane konstruos dekkelkajn grandajn kaj mezgrandajn hidroelektrejojn sur Jangzi-rivero, la supra kaj meza partoj de la Flava Rivero kaj Hongŝuj-rivero de sudokcidenta Ĉinio. Nun la ŝtato organizis aron da superaj fakuloj por fari profundan esploradon pri la ebleco entrepreni samcelan konstruon de la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero atentatan de ĉinoj kaj eksterlandanoj.

En la lastaj jaroj ankaŭ la konstruado de elektra reto de Ĉinio disvolviĝis rapide. Nun la totala kapacito de generatoroj de la kvar transprovincaj elektraj retoj en norda, nordorienta, orienta kaj centra Ĉinio superis 12 milionojn da kilovattoj kaj tiu de nordokcidenta kaj sudokcidenta

Ĉinio superis 5 milionojn da kilovattoj. Konforme al la konstruado de grandaj termoelektraj kaj hidroelektraj, la elektraj retoj certe pli kaj pli grandiĝos. Espereble ĉe la fino de la "Sepa Kvinjara Plano", la totala kapacito de generatoroj de elektraj retoj en nordorienta, norda, orienta kaj centra Ĉinio superos 15 milionojn da kilovattoj.

Samtempe kun la disvolvo de termoelektraj kaj hidroelektraj, Ĉinio ekspluatas konforme al lokaj kondiĉoj energiajn fontojn, kiaj tervarmo, tajdo, ventopovo kaj metano, por produkti elektron. En 1984 la kapacito de generatoroj de la tervarmaj elektraj atingis 12 mil kilovattojn. Inter la konstruitaj tajdaj elektraj de Ĉinio, la dudirekta tajda elektraj de Ĝjangŝja de Ĝeĝjang-provinco estas la plej granda. Ĝia kapacito de generatoroj estas 3 200 kilovattoj. Ĝi estas ankaŭ unu el la grandaj tajdaj elektraj en la mondo. Rilate la utiligon de ventopovo por doni elektron, nun Ĉinio jam fabrikis kelkcent- kaj kelkmil-kilovattajn malgrandajn generatorojn kaj mikrogeneratorojn. En la tuta lando jam instaligis pli ol dek mil generatoroj tiuflanke kun kapacito de 2 300 kilovattoj, el kiuj la plej granda havas kapaciton de 800 kilovattoj kaj estis konstruita en Fuĝjan-provinco oktobre de 1986 kunlabore inter Ĉinio kaj Belgio. Koncerne la elektran produktadon per sunenergia kaj metano, Ĉinio faras esploradon kaj akiris ian progreson.

Ĉinio komencis entrepreni ankaŭ nukleelektran produkton. La Ĉinŝan-a Nukleelektraj de Ĝeĝjang nun estas en streĉa konstruado. Ĝiaj instalaĵoj estas projektitaj kaj fabrikitaj



*La Ĉinŝan-a Nukleelektraj en konstruado*

de Ĉinio mem kaj ĝia kapacito de generatoroj estos 300 000 kilovattoj. La nukleelektraj Dajaŭan apud la urbo Ŝenĝen de Ĝuangdong-provinco investita kune de Ĉinio kaj aliaj landoj jam ekkonstruiĝis aprile de 1984. Tie oni instalos du generatorojn, ĉiu kun kapacito de 900 000 kilovattoj kaj la unua generatoraro liveros elektron al Hongkongo kaj Ĝuangdong post sia finkonstruiĝo en 1992.

La ĉina elektra industrio metas grandan atenton sur aplikadon de novaj teknikoj kaj ekipaĵoj. Nun Ĉinio povas memstare solvi teknikajn problemojn de pro-

spektorado, projektado, konstruado kaj funkciado de grandaj elektraj. La aŭtomata nivelo en elektra produktado leviĝas jaron post jaro. La grandaj elektraj havas centralizitan regadon kaj sekurecan observadon. La laŭgrada centralizita regulado kaj aŭtomata frekvenca modulado estas farataj en elektra reto. La komputiloj kaj tekniko pri inform-traktado nun estas popularigitaj kaj aplikataj en la elektra industrio. Fondiĝis scienc-esplora sistemo de diversaj fakoj kaj konstruiĝis scienc-esplora eksperimenta bazo de ĉefaj fakoj. □

# ESTETIKA EDUKADO EN ĈINIO



*Instruado de pianludo*

Tio estas ordinara lernejo. Tie la ĉirkaŭ-10-jaraj infanoj povas improvize komponi, kiam vizitantoj skribis tekston, donis muziktemon aŭ titolon.

Ĝi estas la Eksperimenta Elementa Lernejo de Tjanmen-gubernio, Hubej-provinco. La supre menciitaj "ĉirkaŭ-10-jaraj komponistoj" estas membroj de la Ŝingĝi-a Infana Ensemblo de la lernejo. Nun, 8 el ili aperigis 26 verkojn en la tutlandaj muzikaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj 30 verkoj estis tradukitaj kaj aperigitaj en Usono. La Eksperimenta Elementa Lernejo de Tjanmen-gubernio estas unu el la bonaj lernejoj, kiuj bone donis estetikan edukon.

De longa tempo, kaŭze de tio, ke oni ne havis ĝustan takson pri estetika eduko, en Ĉinio la estetika eduko ankoraŭ estas malforta. Ĝi ne nur ludas gravan rolon en ekspluato de la intelekto de homoj, altigo de ilia

observa kaj imaga kapablo pri la naturo kaj socio, sed ankaŭ estas grava rimedo por kulturi en ili noblajn idealon kaj moralon kaj edifi ilin (precipe la infanojn kaj gejunulojn) per bona moralo kaj spirito.

En la lastaj jaroj, kun kresko de la bezono de kultura kaj spirita vivo, oni iom post iom ekkonis, ke sen estetiko la eduko estas nekompleta, tial la estetika eduko iom post iom vekis atenton ĉe la publiko. Nun la ŝtato definitive listigas la estetikan edukon en la edukan orientilon same kiel la morala, intelekta kaj korpokultura edukoj. Samtempe naskiĝis la Arteduka Komisiono sub la Ŝtata Eduka Komisiono. Ĝi konsultiĝas al la lasta pri edukaj principo, disvolva plano, reguloj, sistemo ktp. kaj helpas ĝin en gvido, akcelo kaj kontrolo de arta eduko por akceli la disvolviĝon de estetika eduko en diversaj lernejoj. Laŭ nekompleta statistiko, nun el la tuta lando estas 60 altlernejoj, kiuj fondis instru-esploran sekcion aŭ grupon respondecan pri arta eduko.

## ESTETIKA EDUKO DE INFANECO

La estetika eduko same kiel

multaj alispecaj edukoj devas esti farata de infaneco. La elementaj lernejoj en diversaj lokoj de Ĉinio faras ĉion eblan por plifortigi kaj plibonigi la instruadon de pentrado, muziko, manlaboro ktp., por ke la lernantoj de infaneco ricevu ĝustan estetikan edukon kaj bonan artan influon, kio certe utilos al ilia kreskado.

Jen ekzemplo en Ĝingou de nordorienta Ĉinio. Tie la ekonomio kaj kulturo ne estas disvolviĝantaj. La tieaj 7 gubernioj estas agrikulturaj senescepte. Por akceli la tiean estetikan edukon en la elementaj lernejoj, la eduka departemento ekfunkciigis provan kurson el 25 unuaklasaj novaj lernantoj en iu lernejo sude de Ŝingĉeng-gubernio. Sub gvido de juna instruisto la geknaboj komencis lerni liniaron kaj ludon de muzikiloj kaj fari ekzercon pri solfeĝo kaj kantado. Koncerne la aranĝon de la lecionoj, la kurso estas sama kiel la ordinara kursoj escepte nur de du lecionoj novaj ĉiusemajne. Du jaroj pasis, la kursanoj jam estas kapablaj ĝuste distingi tonon, lerte solfeĝi kaj ludi solon, dueton, ĥoron kaj muzikajn instrumentojn. Iliaj muzikaj nivelo kaj kapablo



atingis tiujn de la sesaklasaj lernejoj.

Influante de la nomita elementa lernejo, pluraj gubernioj de la regiono Ĝinĝou unu post alia ekfunkciigis la similajn kursojn, kiuj ĉiuj ricevis kompare bonan efikon: Duono de la 800 lernantoj en tiaj provaj kursoj el-lernis ludi pianon, violonĉelon, violonon k. a. Nun pli ol 200 000 infanoj de la regiono estas edukataj en muziko malsamgrade.

Krome, iuj lernejoj laŭeble plibonigas lecionojn de pentrado, manlaboro kaj kaligrafio kaj plifortigas la instruadon en la lecionhoroj kaj donas helpon post lecionoj.

## INTERLIGITA INSTRUADO

En la pasinteco al Ĉinio mankis interligita estetika instruado de la infanĝardenoj al element-, mez- kaj alt-lernejoj kaj ankaŭ mankis la estetika instruado esprimanta trajtojn de malsamaj periodoj. Tio ne utilis al popularigo kaj altigo de la estetika eduko. Nun la stato iom post iom estas plibonigata. La popularigo de estetika eduko en altkaj mez-lernejoj iom post iom estas pliantentata same kiel tiu en element-lernejo.

Ekde la komenco de la 80-aj jaroj la 8-a Mezlernejo de Pekino serioze faris estetikan edukon same kiel morala, intelekta kaj korpokultura edukoj. Krom lecionoj de muziko kaj belarto en malsuperaj klasoj, la lernejo mem kompilas lernobjektojn kaj funkciigas nedevigan kurson de muziko, estetiko kaj belarto en la unua kaj dua superaj klasoj. La lernejo fondis postlecionan artan lernejon, por ke lernantoj interesiĝu pri la estetika eduko. La lernejo funk-

ciigas kursojn de latuninstrumentoj, akordiono, komponado, ĥoro, pekina opero, kunĉju-opero, pentrado, kaligrafio kaj aliaj. Ĉ. 400 geknaboj partoprenas la lernadon. Iuj el iliaj verkoj gajnis tutlandan premion, aliaj aperis sur la televida ekrano aŭ en fakaj gazetoj. Lernado de muziko kaj belarto jam furoris en la lernejo.

Antaŭe la altaj lernejoj de Ĉinio ne prenis la estetikan edukon kiel oficialan studobjekton. Ĝenerale oni nur faris prelegon pri estetiko. Nun Nankaj-Universitato kaj aliaj altlernejoj rigardas ĝin kiel oficialan nedevigan studobjekton por popularigi la estetikan edukon. La sukcesintoj en la ekzameno povas akiri poentojn.

Laŭ statistiko, Fudan-universitato, Ĝongŝan-universitato,

Ŝanhaja Universitato, Orient-Ĉinia Instruista Universitato, Pekina Brodkasta Instituto k. a. sume ĉ. 50 altlernejoj ekfunkciigis lecionon de filmo kaj televid-filmo kaj ankaŭ preskaŭ 100 altlernejoj funkciigas filmokurson kun pli ol 10 nedevigaj objektoj, nome, "filmoteoria esploro", "filmo-literatura verko", "komentario pri filmoj kaj televid-filmoj" ktp. Iuj instruistoj kaj studentoj de Siĉŭan-Universitato ankaŭ partoprenis en la scenaro-reĝisorado, ludo kaj fotografado de pli ol 20 televidaj filmoj.

La filma leciono tre interesas studentojn. Laŭ statistiko, pli ol 80% de la studentoj memvole lernas filman lecionon. La funkciigo de la leciono plibonigas sci-konsiston de la hodiaŭaj studentoj kaj precipe influis

### *Mezlernejoj en pentrado*



iliajn artan inklinon kaj apredadon.

Pro manko de instruistoj estas malfacile funkciigi nedevigan studobjekton pri muziko en politeknikaj institutoj, tamen la Pekina Aviad-Instituto k. a. venkis la malfacilon kaj kreis kondiĉon por la leciono. Iuj instruistoj estas kumulaj. Ili mem verkis lernobjektojn kaj gvidis kursojn post laborhoroj. Iuj lernejoj funkciigas ankaŭ serion da sintezaj kursoj. Krom muziko ili instruas ankaŭ literaturon, fotografion, belarton kaj kaligrafion.

Por doni specialan trejnadon pri estetiko al infanoj kaj eksterlernejaj junuloj, kiujn interesas estetiko, en diversaj lokoj ekfunkciis diversaspecaj postlecionaj belartaj lernejoj kaj kursoj. En la vilaĝo Longĝaŭ de la antaŭurbo de Ĉengdu, Siĉŭan-provinco estas nefama lernejo — la Postlabora Belarta Lernejo kolektive funkciigata. La lernejo ekfunkciis en 1985 kun piana, violona kaj naci-muzika fakoj, kie lernis 45 3-6-jaraj geknaboj. Nun 7 el ili sukcesis en la ekzameno kaj eniris en la elementan lernejon sub la Centra Konservatorio kaj pli ol 30 el ili eniris en la elementajn lernejon sub la Siĉŭan-a Konservatorio kaj aliaj artaj institutoj kaj trupoj. En la koncerto “Ĉengdu-a Aŭtuno” okazigita en la urbo Ĉengdu 3 programeroj de la lernejo estis premiitaj. Iuj

aperis sur la televida ekrano. Krome, la lernejo ofte organizas prezentadon, kio estas bonvena al la spektantoj.

### MULTSPECAJ FORMOJ

La estetika eduko estas enhavoriĉa. La formoj de la estetika eduko en malsamaj lokoj estas multspecaj. Krom la supre menciitaj instruaj aktivadoj de muziko kaj belarto, multa alt- kaj mezlernejoj de Ĉinio ankoraŭ okazigis artan festivalon, ekspoziciojn de kaligrafiaĵoj, belartaĵoj, filatelajoj kaj brodaĵoj, fondis literatur-poeman societeton kaj faris konkurson de kantado, kiuj estis bonvenaj al la lernantoj.

Nun en nemalmultaj mez- kaj element-lernejoj de Pekino aperis nova estetika formo — lernejoj teatraĵoj. La teatraĵoj estas verkitaj de instruistoj kaj lernantoj mem, kiuj kune prezentas sur scenejo. La teatraĵoj ĉefe spegulas la vivon de lernejoj. Tio estas sinteza arto, kiu povas influi kaj ekzerci lernantojn en muziko, danco, belarto, deklamado, prezentado kaj aliaj flankoj.

Septembre 1986 la Norda Politekniko de Pekino fondis artan muzeon, la unuan el la politeknikaj institutoj de la tuta lando. La muzeo ampleksas salonojn de ceramikaĵoj, kaligrafiaĵoj, desegnaĵoj kaj artaĵoj, kie estas eksponataj famaj antikvaj porcelanaĵoj kaj fajen-

caĵoj kaj modernaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de Ĉinio. De tie studentoj konas la ĉinajn artojn kaj estas influitaj de estetiko.

Ĉiujare la Norda Politekniko okazigas ekspozicion pri kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de la instruistoj kaj studentoj. En 1984 la politekniko okazigis rememor-ekspozicion pri kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de la tutlandaj studentoj. La nedeviga studobjekto pri skizo funkciigata de la politekniko estas bonvena al la studentoj. Ĉiujare la politekniko okazigas artan kaj kulturan festivalojn, intime kontaktas multajn famulojn de kulturaj rondoj kaj fakaj kulturaj kaj artaj societoj kaj ofte invitas ilin fari prelegon kaj prezentadon, kio larĝigas vidkampon de studentoj, levas iliajn artan spektkapablon kaj intereson pri la estetika eduko kaj akcelis artan aktivadon kaj estetikajn instruadon en la politekniko. Kaj unu post alia stariĝis la Kaligrafia Asocio, Pentrada Asocio kaj Filatela Asocio de la politekniko.

Same kiel supre menciite, en la lastaj jaroj la ĉina estetika eduko atingis certajn plibonigon kaj disvolviĝon, tamen la artinstrua administra organizo ne estas perfekta kaj ankoraŭ ne formiĝis artinstrua administra trupo. Mankas al ili spertoj gvidi artan instruadon. Grave mankas instruistoj pri artoj. La malfaciloj kaj mankoj estas solvendaj. □

(Daŭrigo de p. 12)

aŭ poŝtkarton el iu parto de la mondo okaze de la jarcento de Esperanto.

Se mi atingos tiun sukceson, mi estos kontenta.

Se ĉiu adrespetanto ricevos respondon de sia ĉina korespondant(in)o, mi estos trafinta mian celon.

Se mia modesta kontribuo al la centjara jubileo de la Internacia Lingvo iom pli vastigos la

amikecon inter niaj ĉinaj gesamideanoj, kaj la cetera tutmonda esperantistaro mi ankaŭ jubileos, jubileos kaj “kampeos” (tostos) je la memoro al la kreinto de Esperanto: Ludoviko Zamenhof. □



# NOVELOJ DE LUSIN

(Plena kolekto)

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. 496p. Ilus. 21.5cm. Bind. 10-Es-1290S. £2,80 US\$4,80

Lusin (1881-1936) estas la plej fama verkisto de Ĉinio kaj ankaŭ fondinto de la moderna ĉina literaturo. Liaj ĉefaj noveloj estis verkitaj dum la jaroj 1918-1925. Ili klare spegulas la ŝanĝigojn de diversaj socitavoloj de la tiama ĉina socio, forte kritikante la malluman realon kaj esprimante grandan simpatian al la suferantaj popoloj.




Ba Jin (1904- ), fama verkisto kaj veterana esperantisto de Ĉinio. Nun li estas prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ankaŭ membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

Kiel esperantisto li tradukis kaj rekomendis al ĉinaj legantoj mallongan romanon *Prin-*

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPC**

**aŭ Esperanta sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



La kolekto enhavas ĉiujn 33 novelojn de la aŭtoro. La antaŭparolo al lia unua novelkolekto "Krioj", en kiu li klarigis kial li prenis literaturon kiel sian batalilon, helpas al la legantoj kompreni liajn novelojn. Al tiu ĉi volumo estas aldonitaj "Kronologiaj Notoj pri Lusin" kaj 20 tutpaĝaj bonkvalitaj ilustraĵoj.

## AŬTUNO EN LA PRINTEMPO

(1932)

Ba Jin (Bakin). Trad. Laŭlum. 1980. Eldonita de EPC. 116p. Ilus. 21cm. Broŝ. 10-Es-1525p. £2,40 US\$4,90

*tempo en la Aŭtuno* de Julio Baghy, kaj inversigis la titolon por nomi sian propran romanon, kiun oni rigardas kiel fratinan verkon de tiu de Baghy.

Tiu ĉi romano temas pri tragedia amhistorio de juna paro. La aŭtoro skribis: *Aŭtuno en la Printempo* estas ne nur milde larmanta rakonto, ĝi estas ankaŭ alvoko de unu tuta generacio de junuloj.

# ĈINAJ CERAMIKAĴOJ

de GU PEJĈU\*

La ĉina ceramiko havas historion de 10 000 jaroj. Estas notite en historiaj libroj, ke jam en la primitiva socio prapatroj de ĉinoj faris argilajn ĉerkojn, tamburojn kaj kuir-pelvojn uzatajn sur ŝtono ardigita per fajro. Ĝis nun oni elterigis multajn ceramikaĵojn kaj fajencaĵojn en ruinoj de la frua periodo de neolitiko antaŭ 6 000-10 000 jaroj en Hemudu de Jujaŭ-gubernio, Ĝeĝjang-provinco kaj Jiŝing-gubernio, Ĝjangsu-provinco.


En la meza kaj posta periodoj (la 50-a — la 20-a jc. a.K.) de

neolitiko estis la kolor-ceramikaĵa Jangŝaŭ-kulturo, kiu ekzistis en la nunaj Henan, Gansu, Ŝinĝjang, Ĉinghaj, Ningŝja, Ŝenŝji, Ŝanŝji, Siĉŭan kaj Ŝandong. La tiamaj ceramikaĵoj estis forme naturaj, dikaj, pezaj kaj stabilaj. Post polurado de argilaj modeloj oni ruĝe kaj nigre desegnis sur ili fiŝojn, ranojn, homajn vizaĝojn, cervojn, petalojn kaj ondojn, kiuj montriĝas simplaj kaj vivecaj kaj estas tre valoraj en Ĉinio. Poste aperis Longŝan-kulturo (en la nuna Ŝandong-provinco), kiu prenis la nigran ceramikaĵon kiel sian re-

prezantan verkon. Tiam oni uzis radon de ĉaro por fari argilajn modelojn. La ceramikaĵoj variis forme. Iuj dikas nur iom pli ol unu milimetron, kiel ovoŝelo. Tial la nigra ceramikaĵo en delikata stilo nomiĝas ankaŭ ovoŝela ceramikaĵo.

En Ŝang-dinastio (la 16-a — la 11-a jc. a.K.) krom la blanka ceramikaĵo kun elegante gravuritaj bildoj de nuboj, pluvo kaj flugilo de cikado, aperis ankaŭ glazurita ceramikaĵo, kiu markis la transiron de la ĉina ceramikaĵo al porcelanaĵo kaj estis unu el la grandaj inventoj de la antikva civilizacio de la ĉina nacio.

*Fajenca vazo kun koloraj desegnoj de neolitiko antaŭ 4 000-10 000 jaroj*



La ceramikaĵoj de Ĉin- kaj Han-dinastioj (221 a.K. — 220 p.K.) estis bonkvalitaj kaj la specoj estis pli multaj. Inter la ceramikaĵoj estis kruĉoj, tripe-daj ujoj, urnoj, tualetujoj, teleroj, bovloj, kandelingoj, akvopotoj k.a.; la glazuroj estis blua, verda, flav-verda, nigra, bruna, oranĝa kaj arĝenta. Samtempe en la socio furoris luksa entombigo, tial aperis belegaj entombigotaĵoj kaj terakotaj homoj. En 1974 oni trovis kavon de terakotaj homoj oriente de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en Lintong, Ŝenŝji-provinco. La kavo kovras 13 000 kvadratajn metrojn. Tie estis elterigitaj pli ol 6 000 malhele grizaj terakotaj militistoj kaj ĉevaloj, ĉiu kun meza alteco de 2 metroj. La kirasitaj militistoj kun lanco enmane aspektas



versimilaj kaj bravaj. La ĉevaloj fortikaj, proporcie kaj anatomie harmoniaj, kun levita kapo, direktas koleran rigardon antaŭen. Iuj aspektas tuj galopontaj al batalkampoj. La terakota legio estas honorita kiel la oka miraklo de la mondo. Diversaj terakotaj terasoj, kioskoj, ĉaroj, ĉevaloj, ŝipoj, kabanaj, grentenejoj, brutoj, kuirejoj, rakontistoj, dancistoj, kantistoj kaj akrobatoj kun distingigaj karakteroj kaj mienoj estas figuritaj elvokive. Ili spegulas la tiaman socian vivon kaj estas valoraĵoj en la historio de la ĉina arto.

La plej eminenta verko el la ĉinaj ceramikaĵoj estis trikolore glazurita ceramikaĵo de Tang-dinastio (618-907 p.K.), kiu heredis la arton de kolora glazurado de terakotaj homoj kaj ĉevaloj de Han-dinastio. Ĝenerale oni uzis ĉefe flavan, verdan kaj okran glazurojn. Estas multaj la specoj de trikolore glazuritaj ceramikaĵoj. Inter ili estas ne nur vazoj, teleroj, bovloj, pokaloj, vinujoj, urnoj k.a., sed ankaŭ terakotaj kameloj, militistoj, dancistinoj, ĉevaloj, leonoj, pavilonoj kaj artaj montetoj. Precipe la kamelo, sur kies dorso sidas varoj kaj eksterlanda komercisto kun bluj okuloj, alta nazo kaj longa barbo, rememorigas pri karavano sur la Silka Vojo de la prospera Tang-dinastio kaj pri la tiama kultura kaj ekonomia interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Post Song-dinastio (960-1279 p.K.), precipe en Ming-kaj Ĉing-dinastioj (1368-1911 p.K.), la ceramikaĵoj kaj fajencaĵoj de Foŝan de Gŭangdong-provinco, Jiŝing de Ĝjangsu-provinco, Zibo de Ŝandong-provinco, Ĝjanŝuj de Junnan-provinco kaj Jongĉang de Siĉŭan-provinco

rimarkinde disvolviĝis kaj la fajencaĵoj de Jiŝing fariĝis la plej famaj.

La fajencaĵoj el purpura argilo de Jiŝing, precipe tetrinkiloj el tia argilo, estas stile modestaj kaj elegantaj. Teo, infuzita en tia fajencaĵo, ne perdas sian guston. Tial fajencaĵoj de Jiŝing estas popularaj en la kamparanaj familioj kaj tetrinkejoj en suda Ĉinio. Teknike oni sufiĉe lerte faras argil-preparon, bakadon, formigadon kaj gravuradon. Oni uzas argilterojn, krom purpura kiel la ĉefa, ankaŭ ruĝan, verdan, vermilionan, brunan, flavverdan kaj blankan. Oni donis al kruĉo formon de banbustumpo, arbostumpo, vaksukurbo, lotusfloro, lotusradiko aŭ akvomelono. Ĝi estas okangula aŭ ovala. La formo kaj strukturo estas harmoniaj kaj la konturo ĉarma. Per grifelo la majstroj gravuras bildon, kaligrafiaĵon, epigrafon kaj stampon sur fajencaĵoj. Por fari fajencaĵojn oni postulas tre altan teknikon. Ekz., inter la kovrilo kaj aperturo de kruĉo preskaŭ ne estas fendo. Vidu fajencaĵon faritan de majstro de Ming-dinastio. Se oni metas la kovrilon de kruĉo sur la aperturon, oni povas levi la kruĉon, suprentirante ĝian kovrilon. Post polurado ekbrilas la fajencaĵo el purpura argilo. Post multfoja lavado kaj viŝado ĝi ricevas pli helan brilon, tial ĝi estas alte taksata kaj ŝatata de aprecioj.

Ĉingou-ceramikaĵoj de Gŭangŝji aperis en Tang-dinastio kaj prosperis en la regperiodo (1851-1861) de Ŝjanfeng de Ĉing-dinastio. La ĉefa koloro de argilo estas brile okra. La delikata argilo havas funkcion de akvosorbo kaj aerotralaso. Teo, infuzita en tetrinkilo el tia argilo, estas bongusta kaj refre-




*Trikolore glazuritaj ceramikaĵoj kaj virinoj de Tang-dinastio (618 — 907)*

ŝiga. La akvo en vazo el tia argilo ne facile malbonodoriĝas. Floro plantita en ĝi disvolviĝas pompe kaj la radikoj ne putriĝas. Se oni konservas manĝaĵon somere en tia ceramikaĵo, la konservaĵo ne malboniĝas post unu nokto. La ceramikaĵoj, produktitaj en Ĝjanŝuj de Junnan, estas fortikaj. Se oni frapas ĝin, ĝi sonas kiel metalo. Ŝi'uan — ceramikaĵoj de Gŭangdong aperis en Song-dinastio, kaj en Ming-dinastio ili, elegante kaj riĉe glazuritaj, nomiĝis Gŭangjaŭ-ceramikaĵoj. Ili havas koloron safiran, violan aŭ grenatan. En Ĉing-dinastio oni prenis kiel reprezentan verkon skulptitan argilan arhaton aŭ palacan servistinojn.

En la pasinteco ĉinaj ceramikaĵoj estis enkondukitaj en Japanion kaj Eŭropon kaj faris sian kontribuon al la kultura



*Ceramikaĵoj de Gujĝoŭ: Bovlo kaj kaproforma kruĉo (Nuntempo)*



*Trikolore glazurita ceramikaĵo en stilo de Tang-dinastio (Nuntempo)*

interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Nun la antikvaj ĉinaj ceramikaĵoj estas bone hereditaj kiel valoraĵoj, en siaj eminenta arto, modesta stilo kaj vasta uzebleco.


Tamen la ĉinaj ceramikistoj ne estas kontentaj pri tradiciaj heredaĵoj. Por adaptiĝi al la bezono de la epoko, ili senĉese kreas novajn, plialtigas la kvaliton kaj faras elstarajn ceramika-

ĵojn unu post alia, tiel ke la ĉina ceramiko atingas pli altan nivelon. □

*\*La aŭtoro estas vicĉefredaktoro de la gazeto "Ĉina Metiarto".*

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


- |                   |                      |                      |                     |
|-------------------|----------------------|----------------------|---------------------|
| 1. Anŝan          | 2. Gŭanŝjan-gubernio | 3. Ĉengdu            | 4. Tjanmen-gubernio |
| 5. Ĝinĝoŭ-regiono | 6. Hunan-provinco    | 7. Ŝanhajĝŭan-pasejo | 8. Fufeng-gubernio  |




*Argila pelvo kun desegnoj  
de homa vizaĝo kaj  
reto de neolitiko antaŭ  
4 000-10 000 jaroj*




*Terakotaj militisto kaj ĉevalo de Ĉin-dinastio (221 a.K.—206 a.K.)*







*Fajenca vazo kun koloraj desegnoj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.)*



*Trikolore glazurita ceramikaĵo: Muzikistoj sur kamelo de Tang-dinastio (618-907)*



*Fajencaj lernantoj de la Okcidenta Ĉin-dinastio (265-317)*



*Trikolore glazurita relikvujo de Song-dinastio (960-1279)*





*Fajencajo de Jiŝing:  
Kruĉo kun ore desegnita  
pejzaĝo de Ĉing-dinastio  
(1644-1911)*



*Glazurita Ŝi'ŝan-ceramikaĵo:  
La diablo-pelanta dio Ĝongkuj  
(Nuntempo)*



# Senbraka knabino

Kiam mi unuafoje vidis la knabinon, mi demandis ŝin senĝene: "Ĉu vi sentas ian ĝenon en ĉiutaga vivo?"

"Malmulte. Mi mem povas lavi al mi la vizaĝon kaj piedojn. Mi ankaŭ povas lavi kaj fliki vestojn," ŝi respondis.

"Ĉu vi estas ĉagrenata?"

"Mi havis grandan ĉagrenon, sed nun mi havas feliĉon."

Ŝi ekridis. Evidente, la rido venis el la koro.

Ŝi nomiĝas Juŝuang. Antaŭe ŝi havis brakojn kiel aliaj. Sed trafika akcidento perdigis al ŝi la brakojn en la infaneco. Tiam ŝi ne sentis ĝenon, ĉar ŝia patri-no flegis ŝin en la vivo.

Post kiam ŝiaj pliaĝa kaj juna fratinoj ekvizitis lernejon, ŝi rimarkis la diferencon inter si kaj aliaj.

La lernejo akceptis la obstinan knabinon escepte. En la lecionhoroj ŝiaj kunlernantoj skribis per kraĵono, sed ŝi senmove sidis sur seĝo kun larmoj

ruliĝantaj de sur la vizaĝo. Poste ŝi ekzercis sin en skribado per kraĵono fiksita inter la dentoj. Ŝia juna fratino diris:

"Mi faru por vi la hejmtaskon."

"Ne, mi mem faras ĝin."

"Ne, ne. Mi mem faros ĉion, kion la kunlernantoj."

En la sekva semestro Juŝuang jam kapablis fari la hejmtaskon, kiel ŝiaj kunlernantoj. En mezlernejo ŝi ricevis premion plurfoje pro bonaj notoj en la ler-



"Juŝuang, ne skribu, sed nur aŭskultu," diris instruisto.

nado. Tamen pro tio ŝi faris pli multe da peno ol la aliaj. □

## KORESPONDI DEZIRAS

\* 18-j. lernanto Edvin Sahnazarjan dez. kor. tutmonde Esperante, angle pri ĉiuj temoj. Adr.: Nr. 29 K. Sahrabzadeh, Kh, Marvdasht Tehran 16397, Iran.

\* 35-j. supera mezlerneja instruisto de la angla lingvo dez. kor. kun geamikoj de la mondo kaj in-

teresiĝas pri muziko kaj interŝanĝo de Esperantaj gazetoj. Adr.: Zang Yuhuai, Di 29 Zhongxue, Dehui, Jilin, Ĉinio.


\* Chen Zhong 24-j. dez. kor. kun esperantistoj de Irano, Rumanio, Jugoslavio, Usono, Francio, Hungario pri ĉiuj temoj. Adr.:

Guangxi Yingshan Chaiyoujichang, 13 Xinxiang, Luzhaixian, Guangxi, Ĉinio.

\* Zhou Zhiqi 23-j. dez. kor. kun filatelistoj de la tuta mondo por interŝanĝi poŝtkartojn kaj aliajn filatelaĵojn Adr.: Lianshengjie 2, Changsha, Hunan, Ĉinio.

# NE TRO LACIĜU LA TERGLOBO

— Pri “La Tago de la Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo” en Ĉinio



*En la kunveno por la Tago de Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo la reprezentanto de UN en Ĉinio s-ro Manfred Kulesa (maldekstre) nome de UN donacas “Loĝantaran Horloĝon” al s-ro Ŭan Li, la reprezentanto de la ĉina registaro.*

La kanto “Komuna Sorto” tekstas jene: “Jam laciĝis la terглоbo kun mieno malgaja. Nin portante, ĝi iras ne facile.” Hodiaŭ, la nombro de la loĝan-

taro de la mondo kreskas je 80 milionoj ĉiujare. La kanto atentigas al la homaro, ke la spaco kaj la riĉfontoj de la terглоbo estas limigitaj, kaj ke la rezulto

estus neimagebla, se oni ne bone bridus la pliiĝon de la loĝantaro. La aktivado de la “Tago de la Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo” en la 11-a de julio 1987,

iniciatita de la Fonduso por Loĝantaraj Aktivecoj de UN, avertis al la tuta mondo: Severe bridi la pliiĝon de la loĝantaro mem estas urĝa tasko frontata de la tuta mondo.

Tiutage sur stratoj en Pekino miloj da homoj en longaj vicoj tenis la slogan-tabulojn "Por la feliĉa morgaŭo ni unuiĝante bridu la pliiĝon de loĝantoj!" "Praktiku eŭgenikon por feliĉigi la postajn generaciojn!" kaj donis konsulton pri naskolimigo kaj tiun pri eŭgeniko kaj genotiko. Iuj aktoroj prezentis programerojn. Ambaŭflanke de stratoj oni servis per senpaga har-tondado kaj malmultekosta tajlado por infanoj. 50 3-11-jaraj infanoj kune pentris sur ŝtofpeco longa je 50 metroj surstrate por esprimi sian aspiron al la estonta vivo.

Posttagmeze, la kunveno por la "Tago de la Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo" okazigita en Pekino puŝis la rememorigajn aktivecojn al alta tajdo. Antaŭ tio, la Ŝtata Naskolimiga Komisiono de Ĉinio okazigis novaĵanoncan kunvenon kaj kunsidon, kaj Radio Pekino elsendis programerojn tiurilate.


Tiel multaj kaj bone preparitaj aktivecoj montris la taksadon de la ĉina registaro pri la loĝantara problemo.

En la fino de 1986, la totala nombro de la loĝantaro de la ĉeftero de Ĉinio jam atingis 1.05721 miliardojn, kiuj konsistigas ĉ. 22% de la monda loĝantaro. En 1949 en Ĉinio estis nur 0.54 miliardo da loĝantoj, kaj en 1981 la lando havis miliardon. Tiel rapida pliiĝo de la loĝantaro sendube kaŭzis multe da malfaciloj al Ĉinio, disvolviganta lando, kiu postiĝas ekonomie kaj kulture. Ekz., en

Pekino la meznombra denseco de loĝantoj por ĉiu kvadrata kilometro atingis 564 kaj en la distriktoj de la urbo ĝi jam proksimiĝis al 26 000. En Ŝanhajo tia stato estas pli serioza. La

meznombra denseco de loĝantoj por ĉiu kvadrata kilometro atingis 42 000. Pro troloĝateco pli kaj pli akriĝas la kontraŭdiroj de manko de tero, loĝdomoj, akvo kaj energifontoj.

*Infanoj pentras sur 50-metra blanka ŝtofo por la Tago de Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo.*





En 1973 Ĉinio enprenis la bridadon de la pliiĝo de la loĝantaro en la tutan planon pri ekonomia kaj socia disvolviĝo. La ĉina registaro opinias, ke la senbrida pliiĝo de la loĝantaro kompensas la ekonomian disvolviĝon, tiel ke necesas praktiki naskolimigon.

La naskolimiga politiko en Ĉinio konsistas el tri punktoj.

Unue, naskolimiga politiko. La ĉina registaro kuraĝigas por malfrua geedziĝo, malfrua nasko kaj eŭgeniko kaj proponas, ke ĉiu geedza paro nasku nur unu infanon, escepte de tiuj geedzoj, kiuj povas laŭplane naski la duan infanon pro aktualaj malfaciloj. Por la nacimalplimulto, ĝenerale, ĉiu geedza paro povas naski du infanojn, kaj al iuj nacimalplimultaj geedzoj estas permesite naski tri. Laŭ statistiko, nun en Ĉinio la geedzoj, kiuj volas havi nur unu infanon tutvive, konsistigas 16% de la naskipovaj geedzoj, dum tiuj en la kamparo konsistigas 10%.

Due, politiko pri premio kaj brido. Tio estas helpa rimedo de propagando kaj edukado. Praktike, en la urboj 1-14-jaraj solinfanoj povas ricevi neegalan sanprotektan subvencion ĉiumonate; longiĝas la ripoztempo de akuŝintino de solinfano, kiu ricevas plenan salajron en la ripoztempo. En la kamparo la familioj kun solinfano povas laŭkontrakte kulturi pli da kampoj aŭ pagi malpli da greno, prioritare ricevi monprunton kaj teknikan servadon por disvolvi produktadon kaj pliiĝi enspezon. Krome, en iuj lokoj, se eble, la solinfanoj povas ĝui favoran traktadon en kuracado, vartado, edukado, ricevo de laborposteno, de loĝdomo kaj dombazo ktp.

La brida rimedo ĉefe estas en

certa tempo rekvizicii de la geedzoj, kiuj malobservis la naskolimigan politikon, certan monon, kiu konsistigas ĉ. 5-10% de ilia enspezo.

Trie, la teknika politiko, kiu prenas preventon de gravediĝo kiel la ĉefan. La ŝtato proponas ĝeneralajn preventajn rimedojn, kaj la naskipovaj geedzoj decidas laŭplaĉe la metodon. La ŝtato senpage donas preventajn medikamentojn kaj ilojn kaj liveras teknikan servon. Estas menciinde, ke en Ĉinio oni ne dependas de abortigo por bridi la pliiĝon de la loĝantaro, sed konsentas fari tion al gravedulino, se ŝia sanstato permesas kaj ŝi volas tion.

La supre menciitaj politikoj observas jenan principon: La direktado de la ŝtato estas kombinita kun la memvolo de la amasoj. La ŝtato ellaboras strategion kaj planon pri la disvolviĝo de la loĝantaro kaj koncernajn politikojn, leĝojn, regularojn kaj labor-orientiĝon. La departementoj pri naskolimigo de ĉiuj niveloj donas multajn servojn al la amasoj, kiaj propagando, donado de preventaj medikamentoj kaj iloj kaj liverado de teknika kaj socia servo.

Laŭ statistiko de koncernaj ekonomikistoj, en la dekelkaj jaroj, kiam Ĉinio praktikis la naskolimigan politikon, la naskokvanto reduktiĝis je 200 milionoj. La sukceso estis konfirmita de UN kaj rekonita internacie. Ekde 1979, la procentaĵo de kresko de la loĝantaro en Ĉinio jam malleviĝis de 2.7% al ĉ. 1.2%. Kaj tiu de la mondo estas ĉ. 2%.

Tamen estas ankoraŭ tre malfacila la naskolimiga laboro en Ĉinio, ĉar en 1986 la naskokvanto de Ĉinio estis pli granda

ol tiu de 1985 je 3.34 milionoj. Kaj la procentaĵo de la natura kresko de la loĝantaro leviĝis de 1.123% en 1985 al 1.408%.

La ĉefa kaŭzo de tia stato estis la pliiĝo de naskipovaj virinoj. La homoj, kiuj naskiĝis en la dua naskotajdo en Ĉinio, kiu komenciĝis en 1962 kaj daŭris 12 jarojn, geedziĝas kaj naskas nun, kaj tiel leviĝis nova naskotajdo. Krome, en iuj lokoj malstreĉiĝis la naskolimiga laboro kaj plivastiĝis la amplekso por permesi naski la duan infanon. Precipe en la kamparo nemalmultaj geedzaj paroj naskis la duan aŭ trian infanon. Alia neignorebla kialo estis, ke en la lastaj jaroj en Ĉinio aperis grandnombraj migrantaj loĝantoj, inter kiuj estis individuaj industriaj kaj komercaj familioj kaj migranto-laborantoj, tial estiĝis manko en la naskolimiga laboro por tiuj loĝantoj.

Okaze de la "Tago de la Kvinmiliarda Loĝantaro de la Mondo", la ĉina registaro des pli emfazas, ke oni devas persisti en praktikado de la fundamenta naskolimiga politiko de la ŝtato, kaj klopodas, por ke la loĝantaro de Ĉinio ne superu 1.2 miliardojn en la fino de la kuranta jarcento. □

---

### Solve por "Ĉu vi scias?":

S-ro Li devas bicikli en inversa direkto. Li bezonas:  
 $(30 - 12 \times 40 / 60)$   
 $\div (18 + 12) = 22 / 30$  horo (44 minutoj)

### Solve por enigmo:

Korbopilko

# Kuracado kaj Sanprotektado Plibonigitaj en la Kamparo de Hunan

Sanĝo de la postĝinta fizionomio de la ĉina kamparo, kie mankis kuracistoj kaj medikamentoj dum longa tempo, estas atentata de la publiko. En la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de la agrikultura ekonomio alportita de la reformado de la kampara ekonomia sistemo, la vivnivelo de la kamparanoj leviĝis en malsamaj gradoj. Kiel iras nun la kampara kuracado kaj sanprotektado? Kun la demando mi vizitis iujn vilaĝojn de Hunan-provinco. Mi ĝojas, ke tie mi vidis, kiel oni penas altiĝi la efikon preventi kaj kuraci malsanojn.

## STARIGO DE KURAC-RETO

Hunan-provinco estis regiono, kie furiozis endemio, infektaj kaj parazitaj malsanoj, ĉefe en ĝia kamparo. Antaŭe ĉiujare estis preskaŭ 20 akutaj infektaj malsanoj, kiuj suferigis 300 000 homojn. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke la kooperaj kurac-retoj bazitaj sur la antaŭa koopera ekonomia sistemo jam ĉesis funkcii kaj ankoraŭ mankis kuracistoj kaj medikamentoj en la plejparto de la vilaĝoj en la provinco.

Sanitaraj servoj estas ĉefaj bazaj kuracaj organizoj en la subdistriktoj kaj urbetoj de la provinco. Ili estis gvidataj de la kuracaj burooj, la higienaj gvidorganoj de diversaj gubernioj. La sanitara servoj malfacile povis ludi sian rolon pro neracia

administra sistemo. En la lastaj du jaroj la provinco reformis la administran sistemon de la subdistriktoj kaj urbetaj sanitara servoj. Ĝi transdonis al la subdistriktoj kaj urbetaj registaroj la gvidantecon super la sanitara servoj kaj praktikas administradon fare de gubernio kaj subdistrikto kun la lasta kiel la ĉefa. Sekve multe altiĝis la iniciativo kaj aktiveco de la subdistriktoj kaj urbetoj por disvolvi la higienan aferon.

Post transpreno de la sanitara servoj, la subdistriktoj kaj urbetaj registaroj komencis

ordigi kaj perfektigi la vilaĝajn sanitara organizojn. Ekzemple en la gubernio Linli ĉiuj vilaĝoj ekhavis kuracistojn kaj medikamentojn jam en la fino de 1986.

En la vilaĝo Fangĵacun troviĝas kuraca stacio, kie laboras kuracisto Hŭang, diplomito de trejna kurso de vilaĝaj kuracistoj en la 60-aj jaroj. Nun li entreprenas la stacion en sia hejmo laŭkontrakte, kun sia edzino kiel helpanto. La stacio kun 8 ĉambroj grandaj kaj malgrandaj kovras areon de ĉ. 180 kvadrataj metroj. Ĝia apoteko servas per centoj da specoj de okcidentaj

*Kuracisto Ĝoŭ Ĉang'an diagnozas suferanton de cerbotumoro.*





*Lernantoj de la Mezgrada Higiena Kolegio en laboratorio*

kaj ĉinaj medikamentoj. La stacio, kiu antaŭe ĉesis funkcii, nun prosperas dank' al lia laŭkontrakta laborado. Ĝi faciligas al la vilaĝanoj kuracadon.

Mi informiĝis en la vizitado, ke la kuracaj stacioj en diversaj vilaĝoj de la gubernio Linli akceptis tri formojn de administrado. La unua estas kolektiva administrado fare de vilaĝo, t.e. vilaĝo solvas la problemojn de domo de la stacio, ĝia kapitalo, trejnado de kuracistoj k.a.; la dua estas kuna administrado, t.e. la stacion kune administras kelkaj vilaĝoj, vilaĝo kaj fabriko aŭ vilaĝo kaj sanitara servo. La tria estas, ke vilaĝa kuracisto mem preparas kapitalon aŭ utiligas sian hejmon por entrepreni kuracadon. La ĉefa diferenco inter la vilaĝa kuracisto kaj individua kuracisto kuŝas en tio, ke la antaŭa devas preni sur sin la taskon preventi epidemion de la vilaĝo kaj pro tio estas rekompenkata de la kolektivo.

La rekompencaj manieroj estas malsamaj pro malsamaj formoj de administrado. Tiuj, kiuj oficiale engaĝitaj kiel vilaĝaj kuracistoj, ricevas la tutan enspezon. Tiel la vilaĝaj kuracistoj laboras kun granda entuziasmo

kaj la kamparanoj estas tre kontentaj.

Nun, en la subdistriktoj en Hunan-provinco oni jam starigis proksimume 3 000 vilaĝajn kuracajn staciojn, kaj 85% de la vilaĝoj de la provinco jam havas kuracistojn kaj medikamentojn.

### **KULTURADO DE KVALIFIKITAJ VILAĜAJ KURACISTOJ**

Manko de kuracistoj estas malfacila problemo por la kampara kuracado kaj sanprotektado. En Hunan-provinco ĉiu milo da vilaĝanoj havas nur 1.06 kuracistojn. Por solvi la kontraŭdiron de manko de medicinaj laborantoj, la provinco fondis nombron da regulaj mezgradaj higienaj kolegioj ĉe gubernia nivelo surbaze de la antaŭaj guberniaj trejnaj kursoj de vilaĝaj kuracistoj. La sanprotekta kaj eduka departementoj kune solvis la problemojn pri financo, instruistoj kaj instru-programo de la kolegioj. Tiuj kolegioj starigis al si la taskon kulture kvalifikitajn meznivelajn vilaĝajn kuracistojn por la subdistriktoj kaj vilaĝoj. Ili akceptas kiel siajn lernantojn diplomitojn de la vilaĝaj malsuperaj mezlernejoj kaj instruas

tri jarojn. Multaj sin anoncis por lernado. Nun funkcias 31 tiaj kolegioj kun pli ol 1 500 lernantoj.

La 16-jara lernantino Ŭang Ĝjunhong de la Mezgrada Higiena Kolegio de Taŭjŭan-gubernio diris al mi, ke ŝia onklo estas unika kuracisto en la vilaĝo kaj tre bonvena al la vilaĝanoj. Ŝi opinias lin eksterordinara, ĉar li povas kuraci malsanulojn. Kiam la gubernia higiena kolegio volis akcepti lernantojn, ŝi tuj sin anoncis. Ŝi intencis praktiki medicinon kune kun sia onklo post diplomiĝo.

Tiu kolegio havas nove konstruitan trietaĝan lernodomon, ĉe kies finoj troviĝas 6 laboratorioj. En la anatomia laboratorio en la teretaĝo estas specimenoj, en la mikroskopa laboratorio en la unua etaĝo — dekoj da mikroskopoj kaj en la laboratorio pri flegado en la dua etaĝo — modeloj de flegistinoj, oksigenaj sakoj, pogutigiloj k.a. Krom la lernodomo, la lernantoj havas ankaŭ trietaĝan loĝdomon.

En la kolegio laboras 19 instruistoj, ĉiuj kun alta klereco, kaj ankaŭ 8 ĉefkuracistoj de la gubernio estas invitataj al instruado. En la kurso de vilaĝaj kuracistoj studas 59 lernantoj, kies plejparto estas knabinoj kun la aĝo de ĉ. 16 jaroj. Mi informiĝis, ke ili lernas 13 fundamentajn fakajn lernobjektojn krom la komunaj lernobjektoj politiko, korpokulturo kaj kemio.

La fondiĝo de tiuj mezgradaj higienaj kolegioj prezentas tian perspektivon: Estos bezonataj 1 000 kuracistoj, se ĉiu gubernio havas meznombro 400 vilaĝojn kaj al ĉiu vilaĝo oni liveros du meznivelajn kuracistojn, enalkulante tiujn postulatajn de la subdistriktaĵaj sanitariaj servoj,



subdistriktaj kaj urbataj entreprenoj kaj lernejoj. Se ĉiu kolegio akceptos 100 lernantojn ekde la kuranta jaro, do post dek jaroj ĉiuj kamparanoj de la provinco espereble povos ĝui kuracadon kaj sanprotektadon fare de la medicinistoj ricevintaj regulan mezgradan edukadon. Sufiĉe granda nombro da oftaj malsanoj povos esti briditaj.

### **MALFACILE KURACEBLAJ MALSANOJ POVAS ESTI KURACATAJ DE FAKAJ ĈINMEDICINISTOJ**

Granda progreso de la ĉinmedicina afero estas alia ŝanĝiĝo de la kampara higiena laboro de Hunan-provinco. En la pasintaj jaroj diversnivelaĵoj financaj departementoj de la provinco investis pli ol 24 000 000 jŭanojn por konstrui ĉinmedicinajn instituciojn en la distriktoj, urboj kaj gubernioj. En diversaj lokoj la nove konstruitaj domoj por la ĉina medicino kovras pli ol 100 000 kvadratajn metrojn. Oni persistas en ĉinmedicina instruado de pluraj kanaloj kaj formoj. La provinca ĉinmedicina hospitalo sinsekve funkciigis pli ol 50 fakajn kursojn, kiaj tiuj de ostologio, oftalmologio, ginekologio, laringologio, masaĝo, akupunkturo kaj ĉigong-o, kaj kulturis pli ol 2 000 medicinajn laborantojn. Precipe atentataj estas nove aperintaj fakaj ĉinmedicinaj hospitaloj ĉe gubernia nivelo, kiuj ĉiuj kun sia propra kapablo povas kuraci malfacile kuraceblajn malsanojn.

La Ĉinmedicina Hospitalo de Cili-gubernio estas unu el tiaj fakaj hospitaloj. Iu paciento el Pekino ricevis tie kuracadon. Li suferis bronkan astmon jam dek jarojn. Li vizitis iujn ĉinmedicinajn hospitalojn en grandaj urboj, sed ne resaniĝis. Fine li

venis al la nomita hospitalo. Unue kuracisto anestezis al li kelkajn dorsajn akupunkturajn punktojn, ŝmiris sur ilin ajlosukon, enmetis sur ilin moksajn bastonetojn ĉ. unu centimetron longajn (moksa bastoneto estas farita el bonkvalitaj sekaj artemiziaj folioj kaj pulvoro de pli ol 20 drogherboj), bruligis ilin kaj fine ŝmiris plastron sur la akupunkturajn punktojn. Post multfoja tia kuracado lia malsano evidente malgraviĝis kaj li espereble resaniĝos.

Bronka astmo estas paroksisma pulma anafilaksia malsano. Paciento reatakata de tia malsano malfacile resaniĝos. La nuna rutina kuracado ne estas ideala por regi paroksismon de la malsano kaj preventi ĝian reatakon. Surbaze de prifosado de la ĉinmedicina heredaĵo, la Ĉinmedicina Hospitalo de Cili-gubernio post plurjara provado elpensis senpusigan moksan terapion kun 27 drogherboj kiel materialoj kaj 15 akupunkturaj punktoj kiel kuracaj punktoj por kuraci bronkan astmon. Praktiko pruvis, ke tia terapio per korpaj kanaletoj komunikas la potencon de la medikamento en la homan korpon kaj tial havas fortan efikon batali kontraŭ reatako de bronka astmo. Ĝis nun la hospitalo jam akceptis pli ol 7 000 suferantojn de astmo kaj mildigis la malsanon de 94.4% de ili, el kiuj 51.2% tute resaniĝis.

Cerbotumoro estas rigardata kiel unu el la malfacile kuraceblaj malsanoj en la mondo. Por kuraci ĝin, la Ĉinmedicina Hospitalo de Linli-gubernio uzas, anstataŭ operacion, specialajn drogherbojn por forigi tumoron kaj jam atingis certajn sukcesojn.

Iu paciento malbone vidis jam tri jarojn pro kapdoloro kaj pro

tio lin trafis hemiplegio. Granda hospitalo de la urbo Ŝji'an diagnozis, ke li suferas de cerbotumoro. Oni malfermis lian kranion por ekzameni kaj tuj ĝin fermis pro nebla fortranĉo de la tumor. Oni konkludis, ke la malsano estas nekuracebla. Poste la paciento venis al la Ĉinmedicina Hospitalo de Linli-gubernio por kuracado. Surbaze de sia sperto, ĉinmedicina kuracisto Ĝoŭ Ĉang'an, aplikante bazan teorion de tradicia medicino, faris recepton el dekelkaj drogherboj, kiuj povas sanigi lienon, forigi malsekecon kaj mukaĵon, akceli sangocirkuladon kaj redukti tumoron. Post unu-jara uzo de la medikamento la paciento jam resaniĝis kaj reiris al sia laboro.

La cerbotumora ambulatorio de la hospitalo sinsekve kuracis ĉ. 200 suferantojn de cerbotumoro. Rezulte 73.3% de la pacientoj resaniĝis, nur 5.6% de ili mortis.

La fakaj ĉinmedicinaj hospitaloj de Hunan-provinco akiris rimarkindajn sukcesojn en kuracado de okulmalsano, ostopatro, vaskularito kaj mordvundo kaŭzita de serpento. La Ĉinmedicina Hospitalo de Jŭanling-gubernio, kiu antaŭe studis kuracadon de sterilaj viroj per ĉinmedicinaj medikamentoj, nun jam fariĝis la unua hospitalo por kuraci virajn malsanojn. Ĝi resanigis ĉ. 5 000 en-kaj eksterlandajn sterilajn virojn kaj ebligis al pli ol 1 000 geedzaj paroj naski infanojn.

La tradiciaj ĉinmedicinaj medikamentoj ludas pli kaj pli gravan rolon en la higiena laboro de la kamparo de Hunan-provinco. □

# ŜJAŬŜJAŬ\*

(Novelo)

(Dua Parto)

Post plurfoja alterno de la sezonoj, ĉiuj en la familio diris, ke Ŝjaŭŝjaŭ jam plenkreskis. Dank' al la Ĉielo, ŝi kreskis tre rapide kaj sane, kvankam ŝi trinkis malvarman akvon kaj manĝis maldelikatajn manĝaĵojn. Kvazaŭ tondilo, la bopatrino fortondis ĉiujn ŝancojn por troa kresko de Ŝjaŭŝjaŭ, tamen tio neniom malhelpis al ŝi, kvazaŭ la suno kaj aero en la kamparo estus sufiĉaj por ŝia kresko.

Kiam ŝi estis 15-jara, ŝi jam altis kiel plenaĝulo, sed la koro ankoraŭ nebula.

Ŝi jam estis pli granda, kaj ŝi devis labori pli multe. Krom ŝpini, vestolavi kaj flegi la edzon, ŝi devis ankaŭ falĉi herbojn por porkoj, mueli grenon, katizi fadenojn kaj teksu ŝtofon. Ĉiaj laboroj estis plenumblaj post lernado. Kutime en la kamparo oni rajtis restigi ĉe si parteton el la produktaĵoj kiel sian propran havaĵon, se oni plenumis sufiĉe multajn laborojn en la familio. Jen Ŝjaŭŝjaŭ akumulis en la lastaj 2-3 jaroj linajn kaj kotonajn fadenojn sufiĉajn por ŝia trimonata teksado ĉe primitiva teksilo.

La edzo antaŭlonge estis demamigita. La bopatrino naskis alian filon kaj la kvin-jara filo estis flegata de Ŝjaŭŝjaŭ sola. Kiel ŝi iris, tien la edzo sekvis.

Igrade la edzo timis ŝin rigardante ŝin patrino. Efektive ili estis korinklina unu al la alia.

Iomete progresis la loko kaj la ŝerco de la avo ŝanĝiĝis je la temo. Li ofte diris ŝerce al Ŝjaŭŝjaŭ, ke ŝi fortondu la harplektaĵon kaj ĝuu la liberecon. Iun someron Ŝjaŭŝjaŭ vidis lernantinojn. Ŝi ne serioze rigardis la ŝercon de la avo, sed ĉiufoje, kiam la avo ŝercis kun ŝi, ŝi ĉiam iris al la rivereto, pretervole karencis la ekstremon de la harplektaĵo, imagante la senĝenecon kaj ĉarmecon de la knabino sen harplektaĵo.

Ŝjaŭŝjaŭ ofte falĉis herbojn por porkoj aŭ distriĝis kune kun la edzo sur la sensuna deklivo de la monto Heliko.

La edzo estis tre naiva kaj ofte kantis aŭdinte aliajn kanti, kaj lia voĉo ofte venigis Pigan Hundon.

Piga Hundo havis apartan korinklinon al Ŝjaŭŝjaŭ, kion ŝi iom komprenis kaj ankaŭ timis. Piga Hundo estis viro, kaj al li mankis nenia eco de viroj. Li estis forta, diligenta, ŝercema kaj distrema. Unuflanke li sukcesis akiri plaĉon de la edzo de Ŝjaŭŝjaŭ, kaj aliflanke li ĉiam flirtadis ĉe Ŝjaŭŝjaŭ por ĉiamaniere moderigi ŝian timon pro li.

Grandaj montoj kaj densaj arboj facile kaŝis en si homojn. Se Piga Hundo ne sciis kie estis Ŝjaŭŝjaŭ, li do staris alte sur la monto kaj ekkantis por vekti atenton de la edzo, kiu ĉiam estis ĉe Ŝjaŭŝjaŭ. Kiam la edzo respondis per kanto, Piga Hundo tuj flugis al ŝi transkurinte la montojn.

La apero de Piga Hundo ĉiam ĝojigis la infanon. Li petis Pigan Hundon plekti por li insektojn el herboj aŭ fari bambuan fajfilon, do Piga Hundo intence sendis lin serĉi materialojn tre malproksimen. Kaj li sidiĝis ĉe ŝi kaj petis ŝin aŭskulti liajn kantojn erotikajn, kiuj hontigis kaj gajigis ŝin. Kelkfoje ŝi ektimis kaj tenis la edzon ĉe si, kaj kelkfoje ŝi tamen preferis, ke la edzo forestas. Fine en iu tago lia kanto konkeris ŝian koron kaj li faris ŝin virino.

Tiun tagon, la edzo iris foren por kolekti fragojn, kaj Piga Hundo kantis multajn kantojn por ŝi, kaj fine li kantis:

*La deklivon antaŭ la domo  
de ĉarmulino,  
Pasadas plej ofte la amanto.  
Feraĵn ŝuojn li eĉ eluzis,  
Nur por viziti vin, mian  
amatinon.*

Kaj ĉe la fino li diris al Ŝjaŭŝjaŭ: "Mi sendormas pro

vi.” Li ĵuris ke li neniam malsekretigos la aferon. Sed Ŝjaŭŝjaŭ ankoraŭ ne komprenis lin, vidis nur liajn muskolajn brakojn kaj aŭdis nur la lastan vorton de lia korverŝo. Pli poste Piga Hundo kantis por ŝi ankoraŭ multajn kantojn, kaj ŝi tute konfuziĝis. Ŝi ĵurigis lin per la ĉielo kaj rigardis lian ĵuron valida garantio, kaj lasis la Pigan Hundon agi laŭvole. La edzo revenis kun ŝvela mano pro piko de raŭpo. Ŝi forte tenis lian manon en la sia, blovis kaj suĉis ĝin. Pensante la ĵusan stultaĵon, ŝi iom konsciis, ke ŝi faris malbonan kaj stultan aferon.

Piga Hundo tentis ŝin al adulto en la kvara monato, kiam maturiĝas tritiko, kaj en la sesa monato, kiam maturiĝas pruno, ŝi ekamis frandi nematurajn prunojn. Ŝi sentis sian korpon iel eksterordinara. Kiam ŝi renkontis Pigan Hundon sur la monto, ŝi informis lin kaj petis de li konsilon.

Malgraŭ longa interkonsiliĝo Piga Hundo elpensis nenian kontraŭrimedon. Kvankam li faris ĵuron per la ĉielo, tamen nenian solvon li elmetis.

Tiu ulo havis bovan kreskon kaj musan kuraĝon. Ofte altastatura viro facile faras eraron, kaj tia homo estas malkuraĝa kaj ofte havas nenian bonan rimedon kontraŭ la eraro.

Fine Ŝjaŭŝjaŭ ekpensis pri eniro en la urbon, tordante la vipursimilan harplektaĵon:

“Fraĉjo Piga Hundo, ni iru en la urbon por ĝui liberecon perlaborante kiel servistoj, ĉu bone?”

“Tio ne eblas. Kion ni faros en la urbo?”

“Grandiĝas mia ventro.”

“Ni trovu medikamentojn. En foiro oni vendas medikamentojn.”

“Vi tuj havigu medikamentojn, mi intencas...”

“Vi intencas fuĝi en la urbon? Tio ne helpas. Tie ni havas neniun konaton, kaj plie estas malpermesate almozpeti laŭvole!”

“Vi, perfida, pereigas min. Mi preferas morti!”

“Mi ĵuras ne forlasi vin.”

“Ĵuro jam ne helpas. Vi helpu min, forprenu la karnon el la ventro, mi timas!”

Piga Hundo nenion respondis kaj post kelka tempo li foriris. Post nelonge la edzo revenis kun multe da kratagoj. Li konfuziĝis, vidinte ŝin sidanta sur herbo, kun okuloj ruĝaj. Rigardinte kelkan tempon, li demandis:

“Franjo, pro kio vi ploris?”

“Nenial, polvo falis en la okulojn kaj dolorigas min.”

“Mi blovu por vi.”

“Ne.”

“Vidu, kiel multe da fruktoj.”

Li prezentis antaŭ ŝin la fruktojn, elpoŝigis malgrandajn river-







mitulojn, ŝtonetojn k.a. kiujn li kolektis ĉe rivereto. Ŝjaŭŝjaŭ rigardis per la larmaj okuloj kaj diris al li kun kontraŭvola rideto: "Frateto, ni estas amikoj, ne diru hejme, ke mi ploris. Mi koleriĝos, se vi eldiros!" Kaj efektive neniu en la hejmo sciis pri la afero.

Post duonmonato Piga Hundo foriris sen adiaŭo, kunportante ĉiujn siajn havaĵojn. La avo demandis Mutulon, kiu loĝis kune kun Piga Hundo, kial kaj kien li iris, ĉu li banditiĝis surmonte aŭ soldatiĝis? Mutulo nur skuis

la kapon kaj diris, ke Piga Hundo ŝuldis al li 200 monerojn, ke li estas senkonsciencia, ke li forŝteliĝis senbrue. Mutulo parolis nur pri sia afero kaj ne klarigis la kialon de la forlaso de Piga Hundo. Pri tio la familio miris kaj babilis la tutan tagon. Ĉar la dungito nenion forŝtelis kaj post nelonge oni nature forgesis lin.

Neniom ŝanĝiĝis Ŝjaŭŝjaŭ. Estus bone, ke ŝi povus forgesi Pigan Hundon, sed la ventro pli kaj pli evidentiĝis neordinara. La objekto ĉiam moviĝetis en la

ventro, kaj ŝi ofte troviĝis en maltrankviliĝo kaj havis koŝmaron.

Ŝi bruskiĝis, sed tion nur ŝia edzo rimarkis, ĉar ŝi montriĝis multe pli severa al la edzo.

Ŝi pasigis la tempon kiel antaŭe, kune kun la edzo. Ŝi ankoraŭ ne povis tute kompreni la aferon. Ŝi ofte havis la penson, ke ĉio finiĝos, se ŝi mortos. Sed kial morti? Ŝi ne perdis la intereson vivi plu, ŝi volis vivi.

Se iu ajn en la familio senintence menciis la frateton-edzon, infanon aŭ Pigan Hundon, ŝi ĉiam sentis, kvazaŭ oni forte pugnobatus ŝian bruston.

En la naŭa monato ŝi pli timis, ke la sekreto malkaŝiĝos, kaj iris kune kun la edzo en templon, votis al la dio kaj englutis manplenon da incensa cindro. La edzo rimarkis tion kaj demandis ŝin. Ŝi respondis, ke la ventro doloris al ŝi kaj la cindro povas moderigi la doloron. Ŝi jam votis al la dio, sed la dio ne helpis ŝin, kaj ŝia ventro daŭre dikiĝis. Ŝi ofte iris trinki malvarman akvon ĉe rivero. Kiam la edzo demandis, ŝi klarigis, ke ŝi soifas.

Neniu el la rimedoj, kiujn ŝi elpensis, povis forigi la malŝataĵon el la ventro. Nur la edzo rimarkis ŝian ventron pligrandiganta, sed li ne havis la kuraĝon malkaŝi la sekreton al la gepatroj. Pro la longtempa kunestado kaj diferenco de la aĝoj, la timo kaj amo de la edzo al ŝi estis pli fortaj ol tiuj al la gepatroj.

Same kiel aliajn aferojn, ŝi klare memoris la tagon, en kiu Piga Hundo ĵuris kaj faris ion alian. Jam estis aŭtuno, la raŭpoj antaŭ kaj post la domoj jam faris kokonojn kaj fariĝis diver-

saj belaj papilioj. Kvazaŭ intence, la edzo ofte menciis la pikiĝon antaŭ pluraj monatoj, kio tre ĉagrenis Ŝjaŭŝjaŭ. Tial ŝi malamegis raŭpojn kaj ĉiam tretis ilin je ekvido.

Iun tagon ŝi denove aŭdis, ke preterpasis lernantinoj, pri kiuj ŝi eĉ havis sonĝon en luma tago, kaj gapis duontagon kun rigardo fiksita en la direkto kie levigas la suno.

Ŝjaŭŝjaŭ intencis imiti Pigan Hundon kaj fuĝi en la urbon. Ŝi faris preparon kaj elektis la vojon iratan de lernantinoj. Sed antaŭ ol ekiro la afero estis malkovrita. Tia aŭdaca ago estis sendube granda evento en la kamparo. Ŝi estis ligita je la manoj kaj enfermita en kuirejo. Oni donis al ŝi nenian manĝaĵon dum la tuta tago.

Pridemando malkaŝis la sekreton: La ventro de Ŝjaŭŝjaŭ, kiun ili rezervas por la edzo daŭrigi la familion post dek jaroj, jam estis prisemita de alia. Kia skandalo! Tute rompiĝis la kvieta vivo de la familio. Unuj koleris, aliaj larmis, triaj insultis. . . ĉiuj esprimis sian indignon laŭ sia prefero. Ĉu sin pendigi, sin dronigi aŭ sin veneni, la malliberigita Ŝjaŭŝjaŭ multe pripensis. Sed pro la tro juna aĝo, ŝi estis ĵaluza pri sia vivo kaj ne volis morti. Konsiderante pri la realo, la avo elpensis saĝan aranĝon: ŝlosi Ŝjaŭŝjaŭ en ĉambro kaj gardi ŝin, kaj venigi parencojn de Ŝjaŭŝjaŭ, por interkonsiliĝi, ĉu ŝi devos esti, laŭ la moro, dronigita aŭ forvendita. Se ŝiaj parencoj taksos la honoron pli grava, do dronigu ŝin en lagon. Alie, forvendu ŝin. Ŝjaŭŝjaŭ havis nur onklon, kiu dungigis al aliulo por terkulturado. Komence li miskomprenis, ke oni invitis lin al drinkado, kaj poste li informiĝis, ke okazis

granda malhonoraĵo, kaj tio perpleksigis tiun honestulon.

La ŝvelinta ventro mutigis lin. Kutime patriarko edukita je konfuceanismo inklinita al la barbara puno de dronigo. Ŝia onklo ne estis klerigita, ne volis mortigi ŝin kaj inklinita reedziniĝi ŝin al alia.

Ankaŭ tia solvo estis punote natura. Kutime la edza familio suferos perdon, sed tiu estos kompensita per vendo de la kulpinto. La onklo informis Ŝjaŭŝjaŭ pri tio kaj intencis foriri. Ŝjaŭŝjaŭ firme tenis lian veston kaj mallaŭte ploris. Tamen la onklo nenion diris skuan-te la kapon kaj foriris.

Portempe neniu venis por svati Ŝjaŭŝjaŭ kaj ŝi devis loĝi ankoraŭ en la domo de la edzo. La afero jam estis decidita, oni ne plu zorgis pri tio kaj atendis nur la finan solvon. Komence la edzo estis malpermesita kunesti kun Ŝjaŭŝjaŭ, sed post monato ŝi kaj la edzo denove vivis en gajo kaj intimeco kiel gefratoj.

La edzo sciiĝis, ke Ŝjaŭŝjaŭ havas infanon en la ventro, kaj ĝuste pro tio Ŝjaŭŝjaŭ devas esti edzinigota foren. Sed la edzo ne volis, ke ŝi foriru, kaj ankaŭ Ŝjaŭŝjaŭ ne volis forlasi. Ĉiuj apatiĝis, kvazaŭ ili ne povis ne observi la decidon. Kiu difinis la regulon? Ĉu Konfuceo aŭ Menzio? Neniu povis klarigi.

La familio atendis svatanton, sed ĝis la jarfino neniu venis. Kaj Ŝjaŭŝjaŭ devis pasigi la Prin-tempan Feston en tiu domo.

En la dua monato de la sekvanta jaro Ŝjaŭŝjaŭ naskis tre sanan filon, kun ĉarma vizaĝo kaj laŭta voĉo. Ambaŭ la akuŝinto kaj la novnaskito estis zorgeme flegataj. Laŭ kutimo oni

preparis vaporumitajn kokinaĵojn kaj sakeon por la akuŝinto kaj kultis la dion. Ĉiuj familiajnoj senescepte amis la bebon.

Ĉar la naskito estis filo, oni ne volis ŝin reedziniĝi al alia.

Kiam okazis la oficiala nupto por Ŝjaŭŝjaŭ kaj la edzo, la filo jam estis 10-jara kaj povis fari kelkajn laborojn, ekzemple paŝti bovon kaj falĉi herbojn. Li nomis la edzon de sia patrino kiel onklon, kaj la onklo volonte respondis sen kolero.

La filo nomiĝis Boveto. En la aĝo de 12 jaroj ankaŭ li edziĝis, kaj la novedzino estis 6 jarojn pli aĝa. Pli aĝa edzino estis tre utila en dommastrumado. Kiam la palankeno atingis la pardonon, la novedzino ploris en la palankeno, kaj la avo kaj pravo dronis en granda okupiĝo.

Tiutage, kun sia dua filo Maŭmaŭ en la sino, Ŝjaŭŝjaŭ rigardis la nuptan ceremonion tra la ulmeta heĝo. La sceno tute similis al tiu antaŭ dekelkaj jaroj, kiam ŝi brakumis la edzon en la sino. □

Esperantigis ŬANG GENJONG

(Daŭrigo de p. 70)

landoj estas la ŝlosilo por restaŭri la mondan ekonomion. Ĝi instigis la evoluintajn landojn fari novan laboron por atingi la interkonsiliĝintan normon de monhelpo donita al la disvolviĝantaj landoj.

La enhavoj de la dokumento montris novan esperon de la disvolviĝantaj landoj pri la internacia komerco. Sed pro la malrapida kresko de la monda ekonomio ili alfrontas ekstreme kompleksajn problemojn kaj devas fari longan penadon por ŝanĝi la nunan malracian stacion en la internacia komerco. □

# PLEJ FRUAJ NOVELOJ DE ĈINIO

de MEJ ĜI

La ĉinaj noveloj originas de la mitoj kaj legendoj en la prahistoria Ĉinio. La fabloj en la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 — 221 a. K.) estis burĝono de la noveloj. Krome, la artaj spertoj de la grandnombraj historiaj verkoj aktive influis la postajn novelojn en priskribado de homoj kaj okazoj.

La ĉinaj antikvaj noveloj naskiĝis en la dinastioj Ŭej, Ĝin, la Sudaj kaj Nordaj (220—581 p.K.). Tiam furoris verkado de noveloj kaj aperis multaj verkoj, kiuj povas esti dividitaj en novelojn pri fantomoj kaj tiujn pri homoj.

Ekde la lastaj jaroj de Handinastio (206 a.K. — 220 p.K.) furoris rakontoj pri dioj kaj fantomoj kaj vaste populariĝis budhismo kaj taoismo, bombastado pri dioj, fantomoj, spiritoj kaj feoj fariĝis socia moro, kaj sekve aperis grandnombraj ekstravagancaj noveloj. La plej brilaj el ili estas eminentaj popolaj legendoj, kiuj, kvankam kun ia magia koloro, estas saturitaj per bela revo kaj montras la amon, malamon kaj esperon de la ordinaraĵoj popoloj en la socia fundo.

La "Rakontaro pri Dioj" kompilita de Gan Baŭ de la Orienta Ĝin-dinastio (317-420

p.K.) estis reprezenta verko de la ekstravagancaj rakontoj. La originala verko jam perdiĝis kaj la nuna eldono estas kompilita de posteuloj laŭ la trovitaj antikvaj libroj. La libro estas 20-voluma, kun pli ol 400 rakontoj pri dioj, fantomoj, spiritoj, homa metamorfozo. El ili "Gangĝjang Moje", "Geedzoj Han Ping", "Li Ĝji Hakmortigas Boon" estas bone konataj de ĉinoj.

"Gangĝjang Moje" priskribas la venĝon de iu junulo pro sia patro. En Ĉu-regno majstro Gangĝjang Moje estis taskita forĝi maskl-femalan spadparon por la reĝo. La forĝado daŭris 3 jarojn. Moje sciis, ke la reĝo certe

koleriĝos pro la prokrastado kaj mortigos lin. Li do diris al sia edzino baldaŭ akuŝonta: "Se vi naskos filon, vi do diru al li, kiam li plenkreskos, ke sur la monto kontraŭ nia domo kreskas pino ĉe ŝtonego kaj la maskla spado estas kaŝita malantaŭ ĝi." Tion dirinte, li kun la femala spado foriris al la reĝo. Vidinte, ke Moje portis nur la femalan el la spadparo, li do flamiĝis de kolero kaj ordonis mortigi la spadoforĝiston. Plenkreskinte, Ĉi, la filo de Moje, trovis la masklan spadon kaj intencis venĝi sian patron. Sed kiam li informiĝis, ke la reĝo anoncis por lia kapo prezon de mil taeloj da





arĝento, li senhezite senkapigis sin kaj konfidis al asasinisto la kapon, por ke la lasta ĝin portu al la reĝo kaj murdu lin. En la verko estis vivece priskribita la paragrafo, kiel la asasinisto murdis la reĝon kunportante la kapon de Ĉi: “La asasinisto kun la kapo de Ĉi ricevis aŭdiencon. La reĝo ĝojegis. La asasinisto diris: ‘Tio estas kapo de bravulo. Oni devas kuir ĝin en kaldrono.’ La reĝo do kuirigis la kapon laŭ la propono de la asasinisto. Oni kuiris la kapon tri tagojn kaj tri noktojn, tamen la kapo estis ankoraŭ sendifekta. La kapo saltis el la bolanda akvo, indigne kun larĝmalfermitaj okuloj. La asasinisto diris al la reĝo: ‘Lia kapo ne detruigis, se via reĝa moŝto persone rigardus, ĝi certe difektiĝos.’ La reĝo do proksimiĝis al la kaldrono. La asasinisto subite levis la spadon kaj dehakis la kapon de la reĝo, kiu falis en la kaldronon. Ankaŭ la asasinisto senkapigis sin kaj ankaŭ lia kapo falis en la bolantan akvon. La tri kapoj en la kaldrono tuj difektiĝis kaj oni ne plu povis distingi ilin. Oni do dividis la kuirajn partojn kaj enterigis ilin. Tial oni nomis ilin tomboj Tri-reĝaj. La priskribo de la intrigo ŝajne estas ekstravaganca, tamen spegulis la firman volon de la popolo kontraŭ la tirano.

“Geedzoj Han Ping” rakontas tragedion: La reĝo Jan de Song-regno okupis edzinon de sia subulo Han Ping kaj kondamnis Han al servuteco, kio kaŭzis sinmortigon de Han Ping kaj lia edzino unu post alia. La verko malkaŝis la diboĉon kaj ferocagon de la feŭdaj reĝoj kaj prikantis la lojalan amon de la geedzoj Han Ping.

“Li Ĝji Hakmortigas Boaon” rakontas pri batalo kontraŭ



monstro. Komence de Handinastio, en Jongling-monto ĉe Dongjŭe-regno vivis boao, kiu ofte damaĝis la loĝantojn. La loka oficisto kredis la mensogon de sorĉisto, ĉiujare nutris la boaon per knabino. Knabino Li Ĝji brave elpaŝis kaj mortigis la boaon per akra spado, helpate de ĉashundo. Kiam ŝi eniris en la neston de la boao kaj vidis skeletojn de la viktimoj, ŝi indigne diris kun profunda kompato: “Vi, malkuraĝaj, estis englutitaj de la boao. Vere kompatindaj!” La rakonto pri-kantis la bravan kaj sagacan knabinon Li Ĝji kaj admonas, ke timemo povas konduki al perejo, kio estas vere kompatinda, kaj ke nur brava batalo povas forigi danĝeron.

Krom “Rakontaro pri Dioj” estis ankaŭ “Suplemento de la Rakontaro pri Dioj”, “Registroj pri Kuriozaj Okazoj”, “Kolekto de Preterlasitaĵoj”, “Rakontoj pri Fantomoj”, “Rakontoj pri Strangaĵoj” k. a. El ili nun konserviĝas ne tre kompletaj, tamen troviĝas el ili interesaj paragrafoj pri malestimo al dioj kaj fantomoj. La artikolo “Ĵuan Deĵu” el “Rakontoj pri Fantomoj” rakontas: Ĵuan renkontis fantomon en necesejo kaj aplombe diris al ĝi kun rideto: “Oni diras, ke fantomoj estas abomenindaj. Tio ja estas vero.” Aŭdinte tion, la fantomo honte foriris. “Zong Dingbo Kaptas Fantomon” el “Rakontoj pri Strangaĵoj” rakontas: Zong Dingbo renkontis fantomon nokte survoje. Li neniom timis kaj vojaĝis kune kun la

fantomo. La fantomo proponis dorsporti unu la alian alterne. Zong konsentis. La fantomo la unua surdorse portis Zong Dingbo kaj diris, ke li estas tro peza, kaj dubis, ke eble li ne estas fantomo. Zong do sprite respondis, ke li mortis antaŭ nelonge kaj sekve estas kompare peza. Kiam ili transiris la riveron, Zong Dingbo plaŭdis en la akvo, la fantomo denove ekdubis. Zong respondis, ke li, estante nova fantomo, ne kutimas transiri riveron kaj tio estas neniom mirinda. El la interparolo kun la fantomo, Zong eksciis, ke fantomoj plej timas kraĉon de homo. Enirinte la urbon, la fantomo transformiĝis en ŝafon. Zong kraĉis sur ĝin, por ke ĝi ne povu plu transformiĝi kaj forkuri, kaj forvendis ĝin.

La ekstravagancaj noveloj de la dinastioj Ŭej, Ĝin, la Sudaj kaj Nordaj estis la produktaĵoj de la antikvaj noveloj de Ĉinio en la komenca periodo. Ĝenerale, ili estis nematuraj kaj krudaj, tamen la aŭtoroj jam atentis pri priskribo de homaj trajtoj. La fidela amo de la edzino de Han Ping, la kuraĝo de Li Ĝji estas kompare sukcese priskribitaj. La aŭtoroj kaptis la plej ĉefajn partojn de la rakonto kaj per kelkaj vortoj jam elstarigis la temon, kaj tial la verkoj karakteriziĝas per lakoneco. La ekstravagancaj noveloj havis profundan influon al la postaj. Antaŭ ĉio, ili faris preparon por la legendaj noveloj de Tang-dinastio. El la pli postaj noveloj ofte vidiĝas ekstravagancaj noveloj, kiuj heredis kaj disvolvis la ekstravagancajn novelojn de la dinastioj Ŭej, Ĝin, la Sudaj kaj Nordaj.

La ĉefaj noveloj en tiu periodo pri homoj estis "Ridindaĵoj", "Diverstemaj Notoj en la Okcidenta Ĉefurbo", "Fragmentoj

de Vortoj", "Novaj Rakontoj" k.a. el kiuj la lasta estas bone konservita kaj plej elstara. En la dinastioj Ŭej kaj Ĝin, inter la intelektuloj kaj oficistoj furoris la moroj de babilado, atento pri parola kaj konduta manieroj kaj takso de personoj. "Novaj Rakontoj" estis evidente influita de tia socia moro. Ĝia aŭtoro Liŭ Jiĉing (403-444 p.K.) estis siatempe grava oficisto. Laŭ tiamaj kriterioj li havigis al la libro 36 partojn, kiaj "Viroj", "Paroloj", "Oficaj Aferoj", "Literaturo" kaj aliaj. La libro notis anekdotojn de intelektuloj kaj oficistoj de la Orienta Handinastio (25-220 p.K.) ĝis la Orienta Ĝin-dinastio kaj kompare komplete spegulis la penson, kutimojn kaj vivon de la aristokratoj en la dinastioj Ŭej kaj Ĝin. Kvankam en la libro aŭtoro admire priskribis tiamajn diboĉadon kaj negativan dekadencan, sekve en la libro ekzistas nemalmultaj negativaj faktoroj, ĝi tamen estas utila por ke la posteuloj konu la tiaman vivon. En la libro estas paragrafo pri drinkado de Liŭ Ling, kio liveras materialojn al la posteuloj por koni romantikajn aferojn de la dinastioj Ŭej kaj Ĝin: "Liŭ Ling diboĉis en drinkado. Li ebriiĝis, senvestigis sin en sia domo. Vidinte tion, oni sarkasme ridis je li. Li tamen diris: 'Mi prenas la ĉielon kaj teron kiel mian domon kaj la domon kiel mian pantalonon. Kial vi iris en mian pantalonon?'" La drinkado, diboĉado kaj malzorgo pri sociaj aferoj, nenionfarado en la vivo ja estis la tiel nomata moro de la dinastioj Ŭej kaj Ĝin. Kompreneble en la libro la aŭtoro ankaŭ laŭdis la moralojn kaj kondutojn de honestaj homoj kaj iagrade malkaŝis la abomenindan vizaĝon kaj putran vivon de la regantaro.

"Novaj Rakontoj" estas kompare alta en arto. En mallongaj artikoloj la aŭtoro per kelkaj frazoj kaj agoj vivece reliefigis la heroojn. Ekz. li priskribis la avidecon de iu homo nur per 3 frazoj kun 16 ideogramoj: "Ŭang Ĵong posedas prunojn de bona speco. Li volas vendi ilin, sed timas ke la semoj falas en alies manon, li do boris la kernon." En alia artikolo la aŭtoro karikature troigas la malpaciencon de iu homo en manĝado de ovo: "Li pikis la ovon per maĝbastonetoj, sed ne sukcesis. Li ekflamis kaj ĵetis ĝin teren. La ovo ruliĝis surtere senhalte. Li do piedpremis ĝin per sia ligna ŝuo, sed denove malsukcesis. Li flamiĝis pli forte. Li ĝin prenis de la planko, enbuŝigis, morde dispecigis kaj elbuŝigis.

La aŭtoro estis lerta en uzo de kontrastoj por priskribi personojn. Tion bone ekzemplis "Gŭan Ning Distranĉis Maton". "Gŭan Ning kaj Hŭa Ŝin kune sarkis legomĝardenon kaj trovis pecon da oro. Gŭan daŭrigis sian laboron, rigardante la oron same kiel tegolpecon aŭ ŝtonon, dum Hŭa rapide prenis la oron kaj foriris ĝoje saltante. Foje ili legis sidante sur sama mato. Preterveturis luksa ĉaro en kiu sidis iu kun oficista ĉapo. Gŭan Ning daŭrigis sian legadon, dum Hŭa Ŝin forlasis la legadon kaj eldomiĝis por rigardi. Gŭan do distranĉis la maton, dirante: 'Vi ne estas mia samideano.'" Per priskribo de la du bagateloj kaj la koncernaj subtilaj agoj la aŭtoro klare prezentis la malsamajn karakterojn de Gŭan kaj Hŭa.

Tiuspecaj noveloj havis grandan influon al la posteuloj. Multaj el la rakontoj fariĝis materialoj por la postaj noveloj kaj dramoj. □

# Du el la Ekstravagancaj Noveloj de la Dinastioj Ŭej, Ĝin, Sudaj kaj Nordaj

## Geedzoj Han Ping

Han Ping estis subalternulo de Jan, reĝo de Song-regno. Li edziĝis al filino de He-familio. Ĉar la knabino estis tre bela, la reĝo okupis ŝin. Han Ping mal-kontentis kaj la reĝo ĵetis lin en malliberejon, kondamnis lin al servuteco, kies devo estis gardi



la urbon tage kaj konstrui urbomuron nokte. La virino sekrete sendis al sia edzo leteron, en kiu ŝi skribis: "Pluvas senĉese, rivero estas larĝa kaj profunda. La suno varmigas min." Post nelonge la letero falis en la manon de la reĝo, kiu do montris ĝin al siaj proksimuloj. Tamen ili ne povis kompreni, kion aludas la vortoj. Lia subulo Su He diris: "'Pluvas senĉese' aludas, ke ŝi estas tre malĝoja kaj larmas senĉese; 'rivero estas larĝa kaj profunda' aludas, ke ili

geedzoj ne povas plu vivi kune; 'la suno varmigas min' aludas, ke ŝi decidis sin mortigi." Post nelonge Han Ping sin mortigis.

La edzino de Han Ping kaŝe putrigis sian veston. Foje, kiam la reĝo kune kun ŝi ascendis altan terason, ŝi subite desaltis de la altaĵo. La proksimaj haste tiris ŝin, tamen pro la putreco de la vesto ili ne sukcesis kaj ŝi mortis de la defalo. Oni trovis ŝian testamenton ĉe ŝia zono, en kiu legiĝas: "Via reĝa moŝto, vi preferas min vivi, dum mi morti. Mi petas, ke vi entombigu min kune kun Han Ping."

La reĝo ekflamis de kolero. Li rifuzis ŝian lastan peton kaj ordonis enterigi ŝin disde la tombo de Han Ping. Li diris: "Vi, geedzoj, amas unu la alian. Se vi kunigos la tombojn, mi do ne malhelpos." En la sekvanta tago elkreskis du grandaj katalpoj el la du tomboj. Dek tagojn


poste la arboj fariĝis dikaj kaj estis nebrakumeblaj por unu persono, ili kliniĝis unu al la alia kaj brakumis sin reciproke, kaj iliaj radikoj kuniĝis subtere. Paro da ambirdoj eknestis sur la arbosuproj, ne forlasante tage, nek nokte. Ili kantis triste, sin apogante unu sur la alia. La loĝantoj de Song-regno simpatiis kun tio kaj donis al la arboj nomon "sopirarboj". La nomo "sopirarbo" ja aperis ĝuste de tio. Oni opiniis, ke la ambirdoj estas la spiritoj de geedzoj Han Ping.

Nun en Sujjang estas urbo Hanping kaj daŭre cirkulas la popolkanto pri la afero.

(el "Rakontaro pri Dioj")

## Vizito de Ŝjun Ĝjubo al amiko

Ŝjun Ĝjubo venis de malproksime por viziti sian amikon mal-





sanan ĝuste en la tempo, kiam ferocaj malamikoj atakis la urbon. La amiko diris al Ŝjun: "Mi certe mortos. Vi eskapitu!" Ŝjun respondis: "Mi venis de fore por vin viziti, kaj vi admonas, ke mi foriru. Kia malnobleco, se mi forlasus vin pro

la vivo! Ĉu tio estas mia konduto?" La malamikoj venis kaj demandis Ŝjun: "Nia armeo venis. ĉiuj forkuris. Kia viro vi estas kaj kuraĝas sola resti ĉi tie?" Ŝjun respondis: "Mia amiko malsanas. Mi ne povas forlasi lin. Mi volantas, ke vi

mortigu min anstataŭ mian amikon." La malamikoj diris inter si: "Ni, malnoblaj, entrudiĝis en la landon noblan." Ili do retiris sin for kaj la tuta urbo estis savita. □

(el "Novaj Rakontoj")

MIHAI BENIUC (1907- ):

## Pomuj' vojrande

*Vojranda arb' mi estas, sen baril'.  
Allogas mia pom' per ruĝa bril'.  
Jen, prenu, vojiranto, kun kuraĝo,  
Neniu vin postkuros pro damaĝo.  
Se iun, tamen, danki volas vi,  
Ja danku l' sanktan teron de l' patri'.  
Ĝi lule prenas nin ĉe sinon sian,  
Nutrante mian vivon, kaj la vian.*

*Kiam printemp' pro juna suno varmas,  
Sub mia ŝelo flormilopoj svarmas.  
Sobrante ĝian sukon dum somer',  
Kliniĝas mi kun ĉiu branĉ' al ter'  
Je signo de respekto kaj honoro,  
De ĉiu sent' senvorta de la koro.  
Aŭtune, kiam pom' ĉe pomo sferas,  
Al homoj ilin ame mi oferas.  
Se iĝis la branĉaro senornama,  
Sub la kovrilo dika, neĝalana,  
Per radikar' mi strebas al profundo,  
Ne ŝiru l' ventoj min el mia grundo,  
Kaj riĉas mia frukt' kun ĉiu jar',  
Kun ĉiu kreskas mia malavar'.*

*Mi ŝatas la infanojn, petolantaj  
Ĉe l' kol' kun ruĝa pec' de flagoj sanktaj,  
Kaj, same, la knabinojn virgajn ŝatas,  
Se ili blankpiede min, paŝadas  
Kun baskoj kaj la sinoj pomoplenaj,  
Ruĝvangaj pro plezuro kaj ridemaj.  
Tiam forgesas mi pri l' malicul'  
Ĵetinta mian frondon per terbul',*



*Kaj rememoras, ke pasintprintempe  
Sin kisis iuj apud mi, longtempe,  
Kaj, je l' foiro, li kun ĝoja kanto  
Pomfloron metis al ĉapelrubando.*

*Vojranda arb' mi estas, sen baril'.  
Allogas mia pom' per ruĝa bril'.  
Jen, prenu, vojiranto, kun kuraĝo,  
Neniu vin postkuros pro damaĝo.  
Se iun, tamen, danki volas vi,  
Ja danku l' sanktan teron de l' patri'.  
Ĝi lule prenas nin ĉe sinon sian,  
Nutrante mian vivon, kaj la vian.*

El la rumana tradukis JOZEFO NAGY

# Popolaj artoj sur stratoj

Fotoj de ŜEN ĈEN



*Prezentado de pupteatro sur strato*

Sur strato multaj homoj ĉirkaŭas artiston, kiu faras homfigurojn el faruno. Li havas sur sia stando pli ol dek pastojn de diversaj koloroj. Preninte iom da pastoj, li premas ilin foje refoje per siaj lertaj manoj. Uzante tranĉileton, tondileton kaj ostan stangeton, li elfaras el ili versimilan homfiguron post 3-5 minutoj. La rigardantoj admiras lin senĉese.

Ĉie en la ĉinaj urboj kaj vilaĝoj videblas diversaj popolaj artoj, kiaj pupteatro kaj farado de papertondaĵoj kaj plumblovitaj sukeraj homfiguroj. Ĉe standoj kaj en magazenoj oni vendas multajn popolajn artaĵojn, kiaj malgrandaj vent-radoj, tol-papilioj, argilaj tigroj, maskoj kaj pupoj. La modestaj popolaj artaĵoj ĝuigas al turistoj agrablecon. Kvankam nun la vivmaniero en Ĉinio multe ŝanĝiĝis, ilin ankoraŭ ŝatas la ordinaraĵoj ĉinoj.


*Farado de farunaj homfiguroj*







*Vent-radoj*



*Ĉe stando de maskoj kaj pupoj*



*Farado de plenblvitaj  
sukeraj figuroj*





*Tol-papilioj ŝatataj  
de knabinoj*



# TREZOROJ EN MILJARA SUBTERA ŜTONDOMO ELTROVITAJ

Teksto de ŬANG ĜAŬLIN  
Fotoj de AN KEJEN

*Relikvujoj montrataj al ĵurnalistoj*



*Reliefo sur la pordo de  
la subtera ŝtondomo*



*Ŝtonskulptitaj orbaraj leonoj ekster  
la pordo de la subtera ŝtondomo*



Antaŭ nelonge, estis hazarde elterigita nombro da raraj trezoroj enterigitaj antaŭ pli ol mil jaroj en Ŝenŝji-provinco de okcidenta Ĉinio. Tio faris sensacion ĉe la arkeologaj rondoj de Ĉinio.

Maje de la kuranta jaro oni trovis, en ŝtondomo sub la budha pagodo de Famen-templo en Fufeng-gubernio de la provinco, kvar fingro-relikvojn de Ŝakjamunio kaj pli ol mil objektojn donacitajn de imperiestroj de Tang-dinastio (618-907 p. K.) al la templo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, tio estis alia grava eltrovo post la Han-dinastia tombo en Ma'uangduj ĉe Ĉangŝa kaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio.

Famen-templo situas 10 km. norde de la guberniurbo Fufeng. Ĝi konstruiĝis antaŭ 1 800 jaroj.

En budhisma verko estas notite, ke antikve la reĝo Asoka de Tjanĝu (la nuna Hindio) dividis la relikvojn de Ŝakjamunio en 84 000 porciojn pli ol 200 jarojn post lia morto (inter ĉ. 272-226 a. K.) kaj ordonis diaĵojn kaj diojn konstrui 84 000 pagodojn en diversaj lokoj de la mondo por ilin kulti. Ankaŭ en Ĉinio konstruiĝis 19 pagodoj kun la veraj relikvoj, el kiuj la kvina estis la pagodo de Famen-templo kun fingro-ostoj de Ŝakjamunio.

Dum longa tempo en historio estis permesite nur al imperiestraj familianoj kaj altranguloj eniri en Famen-templon por kulto. De la 5-a jc. ĝis la 10-a jc. ĝi servis kiel sanktejo de imperiestro por bonvenigi kaj elporti la relikvojn. Sole en Tang-dinastio oni tie sepfoje grandskale bonvenigis kaj elpor-



*Arkeologoj esploras ŝtonskulptaĵon en la subtera ŝtondomo.*

tis la relikvojn. Ekz., je la sesa fojo, t.e. en 819 p. K., la imperiestro Ŝjanzong (806-820 p. K. sur trono) de Tang-dinastio ordonis sendi oficistojn kaj bonzojn por bonvenigi la relikvojn. Unue oni kultis la relikvojn en la imperiestra palaco tri tagojn kaj poste portis ilin respektive al pluraj famaj temploj por la sama celo. Nobeloj, oficistoj kaj popolanoj konkure iris respektive rigardi ilin. Por tio estis konsumita multe da mono.

La lasta bonvenigo de la relikvoj en Tang-dinastio okazis en 873 p. K. La 4-an de la unua monato de la sekvanta jaro estis fermita la pordo de la ŝtondomo sub la pagodo. De tiam la relikvoj kaŝiĝis subtere. De 1579 oni rekonstruis 30 jarojn la antaŭan lignan pagodon en okangulan, 47 metrojn altan brikan pagodon kun 13 etaĝoj.

En la komenco de la okdekaj jaroj falis la okcidenta parto de la pagodo. Por rekonstrui la pagodon oni malkonstruis la orientan parton en 1985. Aprile de 1987, kiam oni ordigis la pagodan bazon, arkeologoj trovis la ŝtonan kovrilon de la malantaŭa ĉambro de la ŝtondomo.

Arkeologoj trovis ĝian enirejon 20 m. sude de la pagoda bazo kaj tuj faris prifosadon. Tiel denove malfermiĝis la pordo de la ŝtondomo post 1 113 jaroj. La domo longas 21.2 metrojn kaj konsistas el trairejo, teraso tunelo, antaŭa, meza kaj malantaŭa ĉambroj kaj la niĉo de la malantaŭa ĉambro, kun totala areo de 31.84 kvadrataj metroj. Ĝi estas la plej granda subtera ŝtondomo de la budhaj pagodoj ĝis nun trovitaj.

Estis trovitaj en la tunelo du steleoj, sur unu estas registrita la historio de Famen-templo kaj sur la alia registrita la soleno, ke la du imperiestroj Jizong (860-874 p. K. sur trono) kaj Ŝjizong (875-888 p. K. sur trono) de Tang-dinastio bonvenigis kaj elportis la relikvojn, la nomoj kaj kvantoj de objektoj oferitaj kaj la monoj de oferintoj. La elterigitaj historiaj objektoj estas kvar fingro-relikvoj, 121 oraj kaj arĝentaj ujoj, 17 vitraj kaj glazuraj objektoj, 10 porcelanaĵoj, 12 ŝtonaj objektoj, 16 feraj objektoj, 19 lakitaj lignaj objektoj, 400 gemoj kaj jadaĵoj, kaj pli ol 700 silkaĵoj. Ili bone konservitaj, klare montras la





*Blankmarmora soklo kun gravuraĵoj, sur kiu staras relikvujoj*

tempon de produktado. Fakuloj konstatis, ke ili plejparte estas unuaklasaj historiaj objektoj protektendaj de la ŝtato. La samtempa elterigo de tiel multaj trezoroj estas grava afero por ĉinaj arkeologoj.

La elterigitaj budhismaj objektoj estas valoraj materialoj por studi la prosperon kaj dekadencan de budhismo en Tang-dinastio. U Zetjan (685-704 p. K. sur trono), la sola imperiestro en la historio de Ĉinio, adoris budhismon. La stelea epigrafo montris, ke ŝi donacis unu orfadenan jupon kaj unu filigranan silkvatan robon, kiuj ambaŭ estis sufiĉe delikataj. Ĝi montris ankaŭ, ke la imperiestro Uzong (840-846 p. K. sur trono) de Tang-dinastio ne kredis je budhismo kaj malpermesis budhismon. Bonzoj de Famen-templo frakasis la imitaĵojn por plenumi la ordonon kaj sekrete konservis la verajn relikvojn.

La veraj relikvoj estis trovitaj el la fera kesto de la malgranda niĉo de la malantaŭa ĉambro de la ŝtondomo en la 10-a de majo 1987. En la fera kesto estas kestoj santala kaj arĝenta kaj ĉerkoj kristala kaj jada unu en alia, kiuj protektas la verajn relikvojn. Fakuloj konstatis, ke

ili estas la sola relikvo en la mondo. Sur la arĝenta kesto gravuriĝas ideogramoj kun signifo: "Trezora kesto, entenanta la verajn relikvojn de Ŝakjamunio farita laŭ la ordono de la imperiestro". La aliaj tri relikvoj metiĝis en la antaŭa, meza kaj malantaŭa ĉambroj de la ŝtondomo respektive. Fakuloj opinias, ke ili estas falsaj.

Estas multnombraj kaj altklasaj la oraj kaj arĝentaj objektoj ĉi-foje elterigitaj. Ili plejparte estas farigitaj de la du imperiestroj Jizong kaj Ŝjizong de Tang-dinastio speciale por la relikvoj. Interalie, la 1.96-metra sonbastono por bonvenigi la relikvojn estas la plej longa el la ĝis nun trovitaj sonbastonoj, kaj farita pli delikate ol la 1.75-metra nikelin-kapa sonbastono konservata en la templo Ŝjosojin de Japanio. Ĝi, korpe malplena, estas farita el pli ol 58 taeloj da arĝento kaj 2 taeloj da oro, kun 12 gravuritaj bonzoj sur si kaj paro da radoj kaj 12 ringoj sur la kapo. Nur plej altrangaj bonzoj rajtis uzi tian bastonon. La plej granda el la arĝentaj kaj oraj objektoj estas kvinpieda incensujo kun pezo de 19 kg, kiu surhavas kvin testudojn dike orumitajn, ĉiu sur lotusfloro. La ornamo signifas feliĉon kaj lon-

gan vivon kaj la bildo estas unuafoje trovita.

Krome, el la 700 silkaĵoj estas unuafoje trovita en Ĉinio la brokato kun oraj fadenoj. Kaj la diametro de le plej maldika orfadeno estas nur 0.1 mm. Multaj silkaĵoj havas tre delikatajn desegnojn kun freŝaj koloroj, kio montras mirigan teknikon de teksistoj en Tang-dinastio. Tiuj teksaĵoj prezentis fildindajn materialojn por esplori la kulturan kaj vestan historion de Ĉinio en Tang-dinastio, tial ili estas arkeologie grava eltrovo pri la studo de Tang-dinastio en la lasta duon-jarcento.

El la trovitaj historiaj objektoj iuj spegulas la rilatojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj siatempe. Ekz., glazura telero kun acerfolia desegno, blua glazura telero kun ronda acerfolia desegno kaj ebene volvita rando, flava glazura botelo kun telera aperturo kpt. Ili kun stilo kaj trajto de okcidentaziaj landoj montras per si mem, ke en la malfrua periodo de Tang-dinastio Ĉinio kaj Persio kaj aliaj okcidentaziaj landoj havis oftan ekonomian kaj kulturan interŝanĝon.

El la trovitaj objektoj estas ankaŭ kompleto da tetrinkiloj, t.e., tepistujo dike orumita kaj kun anserformaj desegnoj kaj te-kribrilo tegita per or-lameno kaj kun desegnoj de flugantaj grupoj, uzitaj de la imperiestro Ŝjizong. Ili montras, ke antaŭ ol trinki la tiamaj homoj pistis tefoliojn, kribris kaj infuzis la pulvoron per bolanta akvo. Ili trinkis la akvon kun la pulvoro. Nun la japana te-ceremonio tenas ankoraŭ tian kutimon. Tio montris, ke Ĉinio estas la vera hejmloko de teo kaj la japana te-ceremonio originas el Tang-dinastio de Ĉinio. □

## Interesa Vojaĝo de Ora Kolĉeno

Sveda s-ino Regina Emson, baldaŭ 80-jara, fervora veterano de Esperanto, partoprenis en la 71-a Universala Kongreso en Pekino, malgraŭ longa vojo. Ŝia unua UK estis la 21-a en 1929, kaj ĝis la 71-a UK ŝi kongresis jam 21-foje. Kiel delegitino de UEA en Svedio, ŝi senlace semas Esperanton.

Post la Pekina Kongreso ŝi vojaĝis al la pitoreskaj urboj Gujlin, Hangĝoŭ kaj Ŝaŭŝing de nia lando. La 9-an de aŭgusto, kiam ŝi estis preta flugi hejmlanden post la plezura vojaĝo, ŝi subite trovis, ke ŝia ora kolĉeno jam ne troviĝis ĉirkaŭ la kolo. Tio pli malpli ombris ŝian vojaĝon en Ĉinio. Ne tute perdante la esperon, ŝi tuj skribis post hejmenreveno al la hotelo Ŭanghu en Hangĝoŭ kaj ankaŭ al s-ano Wang Shirong, redaktoro de "El popola Ĉinio", kiu vojevadis por la Postkongresa Ekskursiva Grupo 3.

Ricevinte ŝian leteron, s-ro Wang Shirong tuj skribis al la hotelo. Post kelka tempo oni respondis al li, ke servistino trovis la oran kolĉenon, kiam ŝi purigis la ĉambron. Ŝi senprokraste donis la kolĉenon al sia superulo. La hotelo poŝtendis ĝin al s-ino Regina Emson laŭ ŝia adreso. Sed pro misskribo de la adreso la poŝtaĵo estis returnita al la hotelo. Poste la hotelo sendis la kolĉenon al s-ro Wang. Tion sekvis korespondado por interkonsiligo pri la problemo kiel transdoni la oran kolĉenon. . .

Reakirinte sian perditajn, s-ino Regina Emson skribis al la redakcio de EPC. Sube estas ŝia letero de ni mallongigita. La publikigo estis aŭfermesita de s-ino Regina Emson. El la letero oni povas scii, kiel la ora kolĉeno revenis al sia posedanto post longa vojaĝo.

— La Red.

Post la ĉiurilate brila 71-a UK en Pekino, ankaŭ rilate la veteron, escepte la 9-an de aŭgusto 1986 ekpluvis kaj fulmotondris 2-3 horojn antaŭ la reflugo hejmen de nia sveda grupo —

S-ino Regina Emson (meze) en vizito de la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio en Pekino



min trafis granda ŝoko. Subite mi eksentis, ke ĉirkaŭ mia kolo mankis mia ora kolĉeno kun Esperanto-steleto. Sammatene mi reflugis el Hangĝoŭ al Pekino, por samvespere daŭrigi la vojaĝon hejmen. Ĉu mi forgesis ĝin en mia ĉambro 505 en la Hotelo Ŭanghu? La steleto estis tre kara memorigaĵo de mia fratino Elinjo, dank' al kiu mi iĝis esperantistino. Tre dolorigis min perdi tiun memorigaĵon.

Revene mi tuj skribis al la hotelo Ŭanghu en Hangĝoŭ kaj al nia Esp-gvidanto s-ro Wang Shirong, petante helpon ricevi la kolĉenon mian. Plurajn leterojn ni interŝanĝis. De lia tria letero de la 28-a de novembro

(1986) mi eksciis ke la hotelo sendis mian kolĉenon al li, al Pekino. Mi ne povas sufiĉe laŭdi la honestecon de la ĉambro-purigistino, kiu ĝin trovis kaj iris kun ĝi al sia ĉefo. . .

Ni daŭre cerbumis kiel solvi la problemon: kiel resendi la kolĉenon al Svedio. Mi kontaktis tiucele svedan turistgrupon kaj — Laŭ la rekomendo de la Sveda Ĉina Amikec-Asocio en Boras

— jam en marto la Ĉinan Ambasadorejon en Svedio, letere kaj telefone. Iun tagon en la fino de aprilo surprizis min telefonparolo el Stokholmo. Oni informis min, ke mia kolĉeno troviĝas en la Ĉina Ambasadorejo.

La 4-an de majo alvenis la klariga letero de s-ro Wang Shirong, ke oficisto de la Ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj in-

formis lin pri la kontakto inter ni kaj ke la ambasadoro, kiu ferias en Ĉinio, kunportos mian kolĉenon al Stokholmo. La 7-an de majo mi laŭ interkonsento vizitis la ĉinan ambasadorejon, kie du afablaj ĉinaj oficistoj transdonis al mi la kolĉenon mian. Mia ĝojo kaj danko estis nepriskribebla. . . □

La feliĉa kaj dankema

Regina Emson

## Nove Fondita Ĉina Muzeo de Poŝtmarkoj

de SUN ŜAŬJING\*

La Ĉina Muzeo de Poŝtmarkoj en la centro de Pekino estas unu el la ŝtataj fakaj muzeoj en la kategorio de soci-scienco kaj historio fonditaj en la lastaj jaroj. Ĝi fondiĝis en julio 1985. Ĝian kolekton konsistigas parto de dokumentoj kaj objektoj pri la historio de la ĉina poŝto kaj la poŝtmarkoj de diversaj periodoj en la ĉina historio, kiujn heredis kaj kolektis la poŝtmarka emisia administracio sub la Ĉina Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko. En la kolekto estas preskaŭ 100 milionoj da ĉinaj kaj alilandaj poŝtmarkoj el ĉ. 200 000 serioj.

Kun la apero de la moderna poŝto, naskiĝis poŝtmarko. Kvankam ĝi havas historion de nur pli ol 100 jaroj, tamen ĝi jam fariĝis la plej populara artaĵo por kolekti, studi kaj apreci en la mondo. Korespondado per poŝt-stacioj en Ĉinio jam

havas historion de pli ol 3 000 jaroj, sed naskiĝis la moderna poŝto en Ĉinio nur kun la invado de imperiismaj potencoj post la Opia Milito (1840), kaj antaŭ 1949 ĝin regis fremdaj landoj. En 1878 la registaro de Ĉing-dinastio prove funkciigis poŝtservon en doganejoj kaj emisiis la unuan serion de ĉinaj poŝtmarkoj kun desegno de granda drako. En 1896 oficiale fondiĝis la ĉina ŝtata poŝto — la Poŝto de Ĉing-dinastio. Nun eksponiĝas en la muzeo la unuaj poŝtmarkoj kaj arkivaĵoj pri poŝto, konservitaj de la Ĝenerala Poŝta Buroo sub la Ministerio de Poŝto kaj Komuniko de Ĉing-dinastio.

Depost la Revolucio de 1911 ĝis 1949, Ĉinio sin trovis en la reĝimo de separatistoj-militaristoj. Tiam ĝi suferis de atakoj de internaj malordoj kaj deks-teraj agresoj, de oftaj militoj

kaj ĉiam plialtiĝantaj prezoj. Pro tio implikiĝis ankaŭ la poŝto kaj la poŝtmarko-emisio. En la muzeo oni povas vidi poŝtajn dokumentojn kaj diversajn poŝtmarkojn emisiitajn kaj valor-ŝanĝitajn de la registaro de la nordaj militaristoj, la Kuo-mintang-a registaro en Nankino kaj lokaj reĝimoj, kaj de la marionetaj registaroj de Manĉurio, Interna Mongolio kaj Ŝinĝjang.

Antaŭ 1949, ankaŭ en la liberigitaj regionoj kaj la revoluciaj bazlokoj gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio oni emisiis poŝtmarkojn. En la muzeo abundas ankaŭ tiaj konservitaĵoj.

En la muzeo komplete kaj sisteme konserviĝas la poŝtmarkoj emisiitaj de la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko post la fondiĝo de la Ĉina Popola Res-



publiko en 1949, kaj koncernaj prototipaj desegnoj, gravuritaj kliŝoj, dokumentoj kaj pentraĵoj faritaj de famaj artistoj.

En la muzeo estas eksponataj ankaŭ multaj alilandaj poŝtmarkoj. Ili estas akiritaj per interŝanĝo en la nomo de la Ĉina Poŝto kun pli ol 200 landoj kaj regionoj, helpe de la Poŝt-unuiĝo. Tiu kolekto de variaj poŝtmarkoj ĉiujare kreskas je proksimume 10 000 pecoj. Ili funkcias kiel fenestro al la ĉina popolo por koni politikon, ekonomion, sciencojn, kulturon, pejzaĝojn, morojn kaj ceterajn flankojn de aliaj landoj.

La fondo de la muzeo ricevis grandan subtenon de diversondaj filatelistoj en- kaj eksterlandaj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, multaj ĉinaj filatelistoj kaj poŝt-sciencistoj donacis siajn valorajn poŝtmarkojn al la ŝtato, kiuj videblas en la muzeo. Fama filatelisto Ĝjang Ĝifang antaŭ sia morto donacis al la ŝtato ĉiujn siajn poŝtmarkojn kolektitajn dum 60 jaroj. Inter liaj kolektaĵoj la plej karaj estas diversaj poŝtmarkoj kun la desegno de granda drako, la unua serio de poŝtmarkoj en la ĉina

historio. La peco de la "ruĝa impostmarko kun malgrandaj ideografiaĵoj unu ĵuano" (emisita en 1897), donacita de filatelistoj Ŝang Ĝjize kaj Ma Ĵen-ĉjūan, estas rigardata de la internaciaj filatelaj rondoj kiel raraĵo, tiu prenita de malnova koverto estas la ununura ekzistanta peco. La donaco de filatelistoj ege riĉigas la kolekton de la muzeo.

En 1987 nia amiko usona verkisto J. Ethridge donacis al la muzeo 2 300 unuataĝajn kovertojn usonajn en la kompleto, kolektitajn de lia patro dum 50 jaroj (1936—1986). Por esprimi dankon al li, la muzeo okazigis la Ekspozicion de Usonaj Unuataĝaj Kovertoj (1936—1986), kiu multe ĝuigis ĉinajn filatelistojn.

En la du jaroj post sia fondiĝo, la muzeo okazigis la ekspozicion de poŝtmarkoj omaĝe al la 120-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Sun Jatsen kaj la 75-a datreveno de la Revolucio de 1911, la ekspoziciojn de poŝtmarkoj pri mondaj animaloj kaj la Internacia Ruĝa Kruco, la ekspoziciojn de poŝtmarkoj de Meksikio kaj Hispanio kaj aliajn




*Laborantinoj de la muzeo fosas en materialoj.*

karakterhavajn ekspoziciojn. Samtempe la muzeo ankaŭ okazigis ekspoziciojn de ĉinaj poŝtmarkoj en Japanio, Alĝerio, Italio, Seĉelio, Meksikio, Bolivio k.a. La ekspozicioj akcelis kontakton inter la ĉinaj kaj alilandaj filatelistaj rondoj kaj pliprofundigis interkomprenon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Krome, la muzeo liveras al diversaj rondoj de la socio referencajn materialojn. Tio multe helpas al disvastigo de sciencoj kaj kulturo, al konstruado de socialisma spirita civilizacio kaj al akcelo de internacia kultura interŝanĝo. Kaj pli grave, ke tio larĝigas la vidkampon de ĉinaj filatel-amantoj, inkluzive de gejunuloj kaj infanoj, kaj donas al ili sciojn kaj nobligas ilin. Tial la servo estas bonvena al la publiko. □

### *Eksponejo de la Ĉina Muzeo de Poŝtmarkoj*



\* La aŭtoro estas direktoro de la nomita muzeo.

# TANG MUHAJ, LA UNUA ĈINA LERNANTO DE KARAJAN



*Direktisto Tang Muhaj*

Antaŭ orkestro intense ludanta sur scenejo, la direktisto forte svingadis siajn brakojn en viglaj kaj graciaj movoj. Jen ludis la Simfonia Orkestro Bamberger de FR Germanio en la teatro Hajdjan de Pekino.

Subite ĉesis la ludo kaj tion sekvis momenta silento. En la teatro eksplodis tondra aplaŭdado kaj la aŭskultantoj kriis de ekscitiĝo. La direktisto turnis sin al la aŭskultantaro kaj riverencis. Li estis eminenta direktisto Tang Muhaj ĝuanta reputacion internacie.

## NOKTO DE STELULO

Estis la lasta semajnofino de januaro 1985. Tang Muhaj, pasloĝante en Munkeno, estis telefonvokita de la direktoro de la orkestro Bamberger — malsaniĝis dum turneo la ĉefdirektisto de la orkestro, kio embarasis la orkestron. Ofte la sukceso de koncerto dependas iagrade de la direktisto. Kion fari? La direktoro elektis Tang Muhaj el sia

nomlisto de direktistoj. Anstataŭ kontaktiĝi kun la agento de Tang, li telefonis rekte al Tang. Ĉu tio ne estis tro subita? La koncerto estis okazonta en la sekvanta vespero, kaj la veturado devis okupi duontagon. Tang Muhaj kalkulis la tempon por tralegi partiturojn, el kiuj kelkaj estis tute ne konataj por li.

Konsiderinte pri sia firma bazo metita post multjara ŝvitiga studado, li respondis kun memfido: “Bonvolu pretigi flugbileton.”

Tiun nokton Tang Muhaj utiligis preskaŭ ĉiun sekundon. Li fosis en referencaj materialoj, preparis repertuarojn, ekzamenis akustikon, rigardis video-registojn, analizis komponaĵojn sur la piano por profunde kompreni la komponaĵojn kaj bone fari la direktadon... ĝis li ascendis la aviadilon en la sekvanta tago.

Je la kvara pm. komenciĝis la duhora provludo. La unua estis la Kvina Simfonio de Schubert.

La orkestro estis majstre trejnita kaj ludis kunlabore kun la direktisto. Pasis du horoj. La talento de Tang Muhaj estis rekonita de la sensivaj muzikistoj.

La okan vespere komenciĝis la koncerto. En la halo neniu sidloko estis vaka. La aŭskultantoj dube atendis la sursceniĝon de la ĉina direktisto. Sub la lerta direktado de Tang Muhaj, la orkestro senrezerve montris la magian infektemon de Schubert. La simfonia poemo “Till Eulenspiegels Lustige Streiche” de Richard Strauss estas verko riĉa je muzika lingvo kaj altaj tajdoj, kiu estas tre malfacila kaj por la direktisto kaj por la ludantoj. Konforme al la disvolviĝo de la intrigo de la komponaĵo, Tang Muhaj sukcese vivigis la heroon Till Eulenspiegels de la verko per la drasta kontrasto, nuanca variigado, organika ritmo kaj vigla fleksebleco. Kiam finiĝis la lasta akordo, la emociitaj aŭskultantoj respondis per varma aplaŭdado kun hurao kaj admiro. La aŭskultantoj frenezigiĝis de ĝojo.

La eksteratenda sukceso de la prezentado konkeris la aŭskultantojn kun alta klereco de muziko, ĉar tie estas la hejmloko de la granda komponisto Robert Schumann. La ludantoj frapetadis la resontabulon por montrisan admiron kaj respekton al la talenta ekzota junulo.

Sed la veran kulminon atingis la ludo en Hamburgo, la lasta urbo de la turneo. La komentariistaj rondoj laŭdis, ke la lasta prezentado estas la "nokto de stelulo" de Tang Muhaj. La ĝenerala direktoro de la usona Kolumbia Impresaria Kompanio speciale venis al FR Germanio kaj kontraktis kun Tang pri longatempa kunlaborado. Tang Muhaj diris, ke tio estis la dua eksploda punkto por lia kariero. Do kio estis la unua?

### PROVIZORA PERDO KONDUKAS TAMEN AL SUKCESOJ

Tang Muhaj aĝas 38 jarojn. Kiam li estis knabo, li estis tre aktiva sur la scenejo en la geknaba domo, kie li komponis, pianludis kaj kantis. En 1966 li estis akceptita en la Ensemblon de la Ŝinĝjang-a Milita Regiono. En 1973 li sukcese ekzameniĝis kaj komencis fakan studon en

la Kompona kaj Direkta Fakultato de la Ŝanhaja Konservatorio. Post diplomiĝo en 1977 li estis sendita studi en la klaso de majstra direktisto de la Munkena Supera Konservatorio.

En 1980, kiam Tang Muhaj studis direktadon de simfonio en FR Germanio, li anoncis sin al la internacia konkurso de junaj direktistoj aranĝita de la mondfama Karajan-Fonduso. Post plurfojaj konkursoj kun diverslandaj junaj direktistoj, Tang Muhaj akiris la rajton partopreni en la tria finalo. Tang Muhaj nur unu paŝon distancis de la laŭro. Subite iu membro de la juĝkomitato diris, ke la aĝo de Tang Muhaj jam estas ekster la limigo difinita de la regularo por la konkurso. Tio estis vera, ĉar la konkurso ial prokrastiĝis ĝis 1982, kaj lia aĝo apenaŭ superis la limigitan. Kun granda bedaŭro la direktoro de la Berlina Filharmonia Orkestro telegrafis al Karajan, kaj Karajan speciale venis al la konkursejo kaj decidis prokrasti la konkurson duonhoron por aparte ekzameni Tang Muhaj.

Pro tio, ke la mondfama majstro vid-al-vide ekzamenos lin, Tang Muhaj ne povis reteni sian ekscitiĝon. Dum la

ekzameno li plene montris sian talenton, akran muzikan sensivecon, grandan entuziasmon kaj vigelecon.

Finiĝis la ekzameno. Karajan tuj decidis, ke Tang Muhaj estu vizitanta direktisto por la Berlina Filharmonia Orkestro en 1983 kaj lernu ĉe li du jarojn post la diplomiĝo el la konservatorio. Karajan subskribis kaj publikigis sian decidon. Tiele, Tang Muhaj ne partoprenis en la konkurso, tamen li fariĝis la unua ĉina lernanto de Karajan. Tio estis por li eksterordinara honoro, kaj li fariĝis famulo en Eŭropo. Tamen li ne montris memkontenton. Intervjuate li diris al la reportero: "Lerni ĉe Karajan estas bona afero, sed tio ne devas esti troigita. Mi ne devas min glori en la nomo de disĉiplo de la majstro. Estas malfacile havi sian propran stilon, estante kiel la ombro de Karajan, kaj krome, oni ne povas esti respektata de la kritikemaj muzikistoj de Eŭropo. Mi devas lerni lian eminentan arton de direktado kaj ne honori min per identeco de lia disĉiplo."

### VIZAĜE AL LA MONDO

En la 30-a de septembro 1986 okazis la monda televizia kaj



*Tang Muhaj en  
direktado*



radia benefico de klasika muziko en la Koncertejo de Ĝenevo, kiun UN aranĝis por mone helpi la mizerulojn de la mondo. Al la benefico kontribuis centoj da mondfamaj majstraj artistoj kaj kelkaj mondnivelaj simfoniaj orkestroj. Ĉ 40 landoj aĉetis la rajton de televizia kaj radia elsendo. Londono, Ĉikago, Novjorko kaj Tokio intermikse faris elsendon kunlabore kun la centra koncertejo en Ĝenevo. En la benefico partoprenis majstraj violonistoj Isaac Stern kaj Yehudi Menuhin, violonĉelisto Ma Joŭjoŭ, tenorulo Luciano Pavarotti, direktisto Seiĝi Ozaŭa, flutisto Jean-Pierre Rampal, kiuj vizitis Ĉinion. En la centra koncertejo ludis nur tri direktistoj. Unu el ili estis Tang Muhaj.

En 1983, Tang Muhaj estis premiita de la Vagnera Fonduso. Aŭtune de la sama jaro li estis invitita kiel asistanto de la mondfama direktisto Leonard Bernstein en Munkeno. En 1984, invitite de Seiĝi Ozaŭa, li partoprenis en la muzika festivalo okazinta en Bostono de Usono.

Li sukcese direktis dekojn da simfoniaj orkestroj, operaj orkestroj kaj brodkastaj orkestroj, ekzemple, la Londona Filharmonia Orkestro, Pariza Simfonia Orkestro, Orkestro de Sankta Sicilio de Romo, Brodkastaj Orkestroj de Milano kaj Torino, ktp. Havis agrablan kunlaboron kun li iuj mondfamaj muzikistoj, kiaj violonistoj Yehudi Menuhin, Ĝeng Ĝinghe kaj Igor Oistrakh, violonĉelistoj Pierre Fournier kaj Mstislav Rostropovitch, kaj flutisto Rampal. En la koncertoj okazigitaj en Oslo, Berno, Lisbono, Hongkongo k. a. Tang Muhaj fariĝis stelulo por la spektantaro kaj aktoraro. Kie li estis, tie alte taksis lin la gazetaro, ekzemple "Times" de Londono, "Figaro" de Parizo kaj "Heroldo" de Romo.

Dank' al sia diligenta studado kaj praktikado, Tang Muhaj jam formis sian propran stilon de direktado, kaj la Okcident-Eŭropaj muzikistaj rondoj opinias, ke la direktado de Tang Muhaj posedas profundan inter-

non, riĉan eksteran belecon kaj ankaŭ la subtilan kaj latentan ĉarmecon de la oriento. Pri tio Tang Muhaj diris: "Senlima estas la strebado de direktisto al la ideala medio."

### "ĈINIO BEZONAS MIN"

En junio 1983, ĉe la koncerto por fini la studon Tang Muhaj bele direktis la ludon de "La Kvara Simfonio" de Ĉakovski kaj akiris la plej altan diplomon de la artaj lernejoj de FR Germanio. Post tiu ĉi koncerto iu munkena reportero demandis lin, ĉu li volas labori ekster Ĉinio. Li prompte respondis: "Certe Ĉinio bezonas min pli, ol FR Germanio kaj aliaj landoj!" Kaj munkena ĵurnalo raportis pri li en la artikolo sub la titolo "Ĉinio bezonas min. . .".

Nun Tang Muhaj estas konstanta direktisto de la Ĉina Centra Filharmonio, kaj samtempe turneas en la mondo laŭ invito de kvar impresarioj de Eŭropo kaj Ameriko. □

## MEJ ĜI:

# LA UNUA PASEJO DE LA GRANDA MURO

La Granda Muro komenciĝas de Ŝanhajĝuan-pasejo oriente, kiu ligiĝas kun montoj kaj maro. Ĝi estas strategie grava loko. Aparte impona estas la spektaklo, ke la Granda Muro etendiĝas en la maron. Vere rava ĝi estas!

Tiu ŝtona konstruaĵo de la Granda Muro nomiĝas Laŭlongtoŭ (Laŭlongtoŭ signifas kapon de maljuna drako ĉinlingve). En 1579 la nacia heroo Ĉji Ĝjigŭang garnizonis kun soldatoj ĉi tie. Por malhelpi malamikan kavalerion entrudiĝi suden de la pasejo

en malfluso aŭ ĉe la glaciĝo de la maro en vintro, li konstruigis en la maro ŝtonan remparon 9 metrojn altan kaj 21 metrojn longan, kiu ligiĝas kun la Granda Muro sur la bordo, kaj tiel plifortigis ĝian defendan povon. Oni diris, ke la Granda

Muro similas longan drakon, kiu zigzagas sur montoj kaj ŝovas sian kapon en la maron por trinki kaj levi ondegajn. Tial oni nomas ĝin Laŭlongtoŭ.

Sed antaŭ kelkaj jaroj tie vidiĝis nur la ruino de la remparo, laŭ kiu oni povis nur imagi al si ĝian imponecon siatempan. Pro tio multaj vizitantoj, venintaj speciale por apreci la pejzaĝon, ne povis ne bedaŭri. En 1986, la ĉina registaro komencis rekonstrui Laŭlongtoŭ. Nun ĝi ree prezentas sian imponecon ĉe la bordo de Bohaj-mar. Kaj pro tio fariĝis pli grandioza la fama pasejo Ŝanhajĝuan.

Laŭlongtoŭ estas masonita tute el ŝtonoj kaj estas same granda kiel ĝi estas laŭ la noto en historia libro. La ŝtona remparo sin etendas en la maron kun naŭ niveloj. Sur la remparo staras steleo kun kvar grandaj ĉizitaj ideogramoj, kiuj signifas "La ĉielo kreas marojn kaj montojn". Laŭdire la ideogramoj estas aŭtografaj de Ĉji Ĝji-gŭang. Sur la remparo estas dislokita longformaj granitoj grandaj kaj malgrandaj, kiuj estas elfositaj el la maro dum la rekon-

struado. Ili estis bazŝtonoj de Laŭlongtoŭ. Tri tavoloj de la rekonstruita remparo estas masonitaj el tiuj ŝtonpecoj. Starante sur la remparo, oni povas ĝui la vastegan ondantan maron, kiu etendiĝas ĝis la horizonto kaj kunfandiĝas kun la blua ĉielo. La ondegoj tondre plaŭdas kontraŭ klifoj kaj levas blankan surfon.

Sur Laŭlongtoŭ estas Ĉenghaj-turo kun areo de 40 m<sup>2</sup>, kiu konstruiĝis en Ming-dinastio (1368-1644) kaj nomiĝis origine Gŭanhaj-kiosko (Kiosko de Mar-rigardo). La nuna turo estas rekonstruita laŭ la arkitektura stilo de Ming-dinastio. Ĝia areo pligrandiĝis je 100 m<sup>2</sup> por enteni pli da turistoj.

Kvar km. norde de Laŭlongtoŭ troviĝas Ŝanhajĝuan-pasejo. La pasejo ligiĝas kun la Granda Muro kaj havas kvar pordegojn. Nun estas bone konservita ĝia orienta pordego, t.e. la pordego kun la vortoj "la Unua Pasejo de la Mondo". La turo altas 13 m. En ĝia supra parto estas embradura turo kaj en ĝia malsupra parto estas arka pordego, tra kiu



*La Granda Muro sur Ĝjaŭŝan-monto*

oni povas iri al Nordoriento kaj nordo de nia lando. La embradura turo estas duetaĝa kun pli ol 60 embrazuroj en la flankoj norda, suda kaj orienta. Sur la okcidenta muro de la turo pendas la giganta tabulo kun la vortoj "La Unua Pasejo de la Mondo". La turo ruĝe lakita brilas en la suno. Ŝanhajĝuan-pasejo estas strategie grava loko kaj la unua pasejo de la Granda Muro. Tial ĝi meritas la nomon "La Unua Pasejo de la Mondo". Krome, ĉe la lokoj, kie interligiĝas la kastela ĉirkaŭmuro kaj la Granda Muro, estas angulaj turoj. Ekster la kastelo estas du remparoj pordefendaj kaj la kastelo estas ĉirkaŭata de rivero, super kiu kuŝas antaŭaj levpontoj antaŭ la pordegoj. Ĉirkaŭ la kastelo dislokiĝas multaj signalfajraj turoj, kiuj transigis alarmon per fumo kaj fajro unu al alia. Multaj vizitantoj admiris, ke la Granda Muro estas sufiĉe perfekta defendkonstruo.

Proksime norde de la pasejo krute leviĝas Ĝjaŭŝan-monto. La Granda Muro komenciĝas de Laŭlongtoŭ, trapasas Ŝanhajĝuan kaj zigzagas sur la kulmino de Ĝjaŭŝan-monto. La gard-turo alte staras sur ĝi. Ĝi estas la plej alta loko ĉe Ŝanhajĝuan. Surgrimpinte la kulminon, oni povas havi panoraman vidon de la Granda Muro, kiu iras suden al la maro, kaj la imponan aspekton de la pasejo. □

### *Ĉenghaj-turo*



## Respondo de la direktoro (Humuraĵo)

Kiam komizo interparolis kun turisto en butiko, envenis la direktoro. Ĉi tiu aŭdis la voĉon de la komizo: "Ĝi mankas, ĝi mankis dum longe kaj mankos laŭdire ankaŭ en la venontaj tagoj. . ."

"Ne. Baldaŭ ni havos ĝin. En la pasinta semajno ni jam faris la mendon," la direktoro tuj interrompis la komizon kaj alparolis la turiston. Post tio li vokis la komizon flanken kaj diris al



li mallaŭte kaj kolere: "Neniam donu nean respondon al la klientoj. Diru al mi, kion li deziras?"

"Li demandis, ĉu pluvis ĉi tie lastatempe."

### Ĉu vi scias?

S-ro Ĝang sin ekzercas en longdistanca kurado sur 30-kilometra ringa ŝoseo. Li kuras 12 kilometrojn ĉiuhore. 40 minutojn post lia ekkuro s-ro Li ekbiciklas kun rapideco de 18 kilometroj ĉiuhore por atingi lin. Ĉu vi scias, kiom da tempo s-ro Li bezonos por tio?

(Solvo trovebla en ĉi numero)

## Parolpovaj fruktoj

(Magio)

**Ludo:** La ludanto ordonas al sia helpanto laŭvice surtabligi bananon, piron, pomon kaj persikon kaj sin turnas al la spektantoj: "Homoj havas homan lingvon, bestoj havas bestan lingvon, ankaŭ fruktoj havas la

sian. Kiun ajn el ili vi prenos kaj flaros, ili malkaŝos tion al mi." Li iras al angulo de la podio kaj kovras al si la okulojn per tuko. La helpanto petas iun spektanton laŭvole preni kaj flari unu el la fruktoj. Li montras ĝin al la ĉeestantoj kaj remetas ĝin sur la tablon. La helpanto petas la ludanton interparoli kun la fruktoj. Per tio la ludanto povas ĝuste diri al la ĉeestantoj, kiun el ili la spektanto tuŝis.

**Artifiko:** La ludanto kaj lia helpanto anticipa elkovas kaŝlingvon, ekz. "bone" signifas bananon kaj "vidu" persikon. Se spektanto prenas bananon, la helpanto diras: "Bone!"; se li prenas persikon, la helpanto diras: "Vidu!"

## Enigma

Simila al melono,  
ŝatata de iuj,  
kaptata de ili,  
ĵetata jam tuj.

(Io por sporta ludo)

## KORESPONDI DEZIRAS

\* S-ano Zhang Qinghe 28-jara dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj kaj interŝanĝas pk., E-pm. E-aĵojn kaj gazetojn. Adr.: Lun Chuan Gong Si, Er Ma Lu 56, Yichang, Hubei, Ĉinio.

\* Katarina Mróz, 23-j. studentino pri oligofreni-pedagogio, PL 80-266 Gdansk, al. Grunwaldzka 176/6, Pollando, dez. kor. kun samfakaj studentoj kaj kun personoj laborantaj en specialaj lernejoj.

\* 45-j. s-ino dez. kor. tutmonde kol. bildkartojn. Ludmila Minarova, Nosice 130, 020 01 Puchov, Ĉeĥoslovakio.

\* 27-j s-ino dez. kor. tutmonde kun virinoj. Maria RADKOVI-COVA Sidl Lid. milici 336/3, Breclav 4, 69141 Ĉeĥoslovakio.

\* 25-j. fraŭlo dez. kor. tutmonde. Jozef MINAR, Nosice 130, 020 01 Puchov, Ĉeĥoslovakio.

\* S-ro M. Roodenburg dez. kor. kun samideanoj kaj interesiĝas pri pm. kaj kartoj. Adr.: Eksterlaan

412, Vlaardingen 3136 SL, Nederlando.

\* Nacia k Internacia Nomoservo. Sola distribuanto de nacia kaj internacia nomverko. 50 bilionoj da div. nomoj. Adr.: Viljo Eronen, PL-685, SF-00101 Helsinki, Finnlando.

\* Dizdareviĉ Jusuf instruisto dez. kor. kun samideanoj el USSR, CSSR, Hungario, Pollando, Hispanio, Francio. Adr.: 72104 Zenica, Ulica Milivoja Piyuge 57, Jugoslavio 00195.



# NACIA REGIONA AŬTONOMIO DE ĈINIO

de ĈEN LEĈJI

La nacia regiona aŭtonomio de Ĉinio ne estas sola nacia aŭtonomio, nek sola loka aŭtonomio, sed kombiniĝo de ili ambaŭ, t. e. sub la unuigita gvidado de la ŝtato oni praktikas regionan aŭtonomion en lokoj koncentre loĝataj de nacimalplimultoj, fondas aŭtonomajn organizojn kaj praktikas la aŭtonomecon. Tio estas la fundamenta principo por solvi la naciajn problemojn kaj la grava politika sistemo de Ĉinio.

La nacia regiona aŭtonomio de Ĉinio havas sufiĉan flekseblecon: Oni povas starigi aŭtonoman regionon en la loko koncentre loĝata de iu nacimalplimulto; oni povas starigi tian regionon en la loko koncentre loĝata de du aŭ pluraj nacimalplimultoj;

*La Jinĉŭan-a Islama Hotelo en Jinĉŭan, la ĉefurbo de la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono*



oni povas starigi malsamnivelajn aŭtonomajn regionojn laŭ la grandeco de la loko loĝata de iu nacimalplimulto. Interne de la nacia aŭtonoma regiono oni povas starigi koncernajn aŭtonomajn distriktojn en la loko loĝata de aliaj nacimalplimultoj. Efektive, en ĉiuj naciaj aŭtonomaj regionoj loĝas hanoj, kiuj eĉ konsistigas grandan parton de la loĝantaro en iuj naciaj aŭtonomaj regionoj. Tio formiĝis nature en la historio.


Naciigo estas formo kaj simbolo de la nacia aŭtonomio de Ĉinio kaj ankaŭ necesa kondiĉo por praktiki la aŭtonomecon. La naciigo de la aŭtonomaj organizoj inkluzivas naciajn membrojn, naciajn skriblingvojn kaj naciajn formojn, interalie, la unua estas ŝlosila, t.e. la prezidanto de aŭtonoma regiono kaj la estroj de aŭtonomaj subregiono kaj gubernio nepre devas esti membroj de la koncernaj nacimalplimultoj praktikantaj la aŭtonomecon; la prezidanto aŭ vicprezidanto de la konstanta komitato de la popola kongreso de aŭtonoma regiono devas esti membro de la koncerna nacimalplimulto; la aliaj oficoj de la popola registaro devas esti plenumataj laŭeble de membroj de la koncerna nacimalplimulto kaj aliaj nacimalplimultoj. Tio garantias la mastrecon de nacimalplimulto en aŭtonoma regiono, ke la aŭtonomaj organizoj vere funkcii kiel politika potenco intime ligata sin kun la popolamasoj.



*Ĝoja festado de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Mjaŭ-kaj Dong-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Sudorienta Gujĝoŭ-provinco*

Aŭtonomeco estas la kerno de praktikado de la nacia regiona aŭtonomio. La aŭtonomaj organizoj havas la samajn povojn kiel tiujn de la samnivelaj lokaj ŝtataj institucioj kaj plenumas samtempe la aŭtonomecon, alivorte, la aŭtonomaj aŭtoritatoj havas pli da povoj ol la samnivelaj lokaj ŝtataj aŭtoritatoj.

Politike, la aŭtonomaj organizoj havas rajton ellabori siajn aŭtonomajn leĝojn kaj aliflan-kajn leĝojn surbaze de la lokaj trajtoj en politiko, ekonomio kaj kulturo, kaj rajton praktiki apartajn flekseblajn politikojn,



*Esploristoj de la Akademio de Sociaj Sciencoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono en diskutado pri budhis-maj problemoj*

kondiĉe ke ili ne malobservas la ŝtatajn konstitucion kaj leĝojn, por akceli la lokajn ekonomian kaj kulturan aferojn. Tie oni rajtas ŝanĝi la decidojn, ordonojn kaj instrukciojn de la superaj instancoj aŭ ne plenumi ilin, se ili ne konformas al la loka realo, tamen oni devas unue peti la aprobon de la supera instanco. Oni rajtas uzi unu aŭ plurajn lingvojn kaj skriblingvojn tie cirkulantajn en sia plenumo de ofico; kaj observante la militan sistemon de la ŝtato, oni povas organizi lokajn polic-trupojn post la sankcio de la Ŝtata Konsilantaro.

Rilate la ekonomian konstruadon, la aŭtonomaj organizoj povas, gvidate de ŝtata plano kaj konforme al la lokaj trajtoj kaj bezono, ellabori principon, politikon kaj planon pri la ekonomia konstruado, memstare aranĝi kaj administri la lokan ekonomian konstruadon; kaj ili povas, en la kadro de la leĝoj, racie reguligi produktajn rilatojn, reformi la ekonomian administran sistemon, difini la posedantecon kaj uzrajton de lokaj stepoj kaj arbaroj, administri, protekti kaj ekspluati lokajn naturajn riĉfontojn, fari eksteran komercon laŭ la difino de la ŝtato, malfermi eksterkomercajn havenojn kaj fari landliman komercon post la sankcio de la Ŝtata Konsilantaro.

En la sfero de kulturo kaj eduko, surbaze de la eduka principo de la ŝtato kaj en la kadro de la leĝoj, la institucioj de aŭtonomaj regionoj rajtas decidi la edukatan planon de sia loko, decidi la aranĝon de diversspecaj lernejoj, iliajn lernosistemojn, instru-manierojn, enhavon de instruado, lingvojn uzatajn en instruado kaj metodojn por akcepti novajn lernantojn; memstare disvolvi literaturon, arton, ĵurnalisman aferon, eldonadon, radioelsendon, filmon, televidon, sporton, medicinon kaj aliajn kulturajn aferojn kun naciaj formoj kaj trajtoj. Ili rajtas protekti naciajn historiajn objektojn kaj historiajn heredaĵojn, heredi kaj disvolvi nacian kulturon.

La aŭtonomaj organizoj rajtas memstare administri la financon aferon de sia loko. Ili povas memstare uzi la enspezojn de sia propra regiono, kaj la ŝtato helpas ilin finance por kovri ilian deficiton, se tio okazas.

Ĉinio praktikas la sistemon de la nacia regiona aŭtonomio, kion oni decidis laŭ la historiaj kondiĉoj, naciaj interrilatoj kaj la dislokiĝo de diversaj naciecoj de Ĉinio.

Ekde la dinastioj Ĉin (221 — 206 a. K.) kaj Han (206 a. K. — 220 p. K.) Ĉinio estas unuigita

lando multnacieca kaj centralizita, kvankam la feŭda separatismo ne estis radikale eliminata. En la pli ol 2 000 jaroj de Ĉin-dinastio ĝis Ĉing-dinastio okazis plurfoje dispartiĝo kaj unuiĝo de nia lando, tamen la unuiĝo estis la ĉefa. Precipe en la lastaj jarcentoj la ŝtata unuiĝo fariĝis neretenebla. Ĉinio estas fondita kune de la diversaj naciecoj, tial defendi la unuiĝon de la patrolando estas komuna volo de ĉiuj naciecoj. Jen la historia bazo por praktiki la nacian regionan aŭtonomion.

En la longtempa disvolviĝo la diversaj naciecoj de Ĉinio dependis unu de alia, disvolvis la ekonomian interrilaton kaj kulturan interŝanĝon kaj kune kreis la longan historion kaj brilan kulturon de Ĉinio. Kvankam dum longa tempo de la historio ekzistis nacia subpremo, nacia malakordo kaj eĉ milita konflikto, tamen estis nekontraŭstareblaj la reciproka dependo kaj kuna disvolviĝo de la diversaj naciecoj en la ekonomio kaj kulturo. Precipe en la lastaj cent jaroj la popolanoj de diversaj naciecoj faris revolucionan batalon kontraŭ la ekstera agreso, kune spertinte malfeliĉon kaj malfacilon, kio formis ilian nedisigeblan intiman rilaton.

Pro la historiaj kaŭzoj la diversaj naciecoj vivas dise sur la ĉina teritorio, kio formis la fenomenon de grandarea miksa loĝado de pluraj naciecoj kaj malgrandarea koncentra loĝado de unu nacieco. Hanoj loĝas ĉie en la lando, dum la grandaj kaj malgrandaj areoj loĝataj de naci-malplimulto troviĝas inter la lokoj loĝataj de hanoj. Al tia fenomeno konformas nur la nacia regiona aŭtonomeco kun granda fleksebleco, kio povas garantii aŭtonomecon de la naci-malplimulto.

La politiko de nacia regiona aŭtonomio kiel baza politiko por solvi la naciajn problemojn de Ĉinio estas subtenata de la diversnaciecaj popolanoj kaj estas difinita kiel unu el la gravaj politikaj sistemoj de la nova Ĉinio. Ĝi estas enskribita en "Komunan Programon de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco" kaj "Konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko".

En 1952 la Centra Popola Registaro, sekvante la principojn difinitajn en la komuna programo kaj resuminte kelkjarajn praktikajn spertojn en la efektivo de nacia regiona aŭtonomio, ellaboris "Skizo pri Praktiko de la Nacia Regiona Aŭtonomio de la Ĉina Popola Respubliko". La publikigo de la skizo pluapasa akcelis efektivigon de nacia regiona aŭtonomio. En la 50-aj jaroj en la plejmulto de la lokoj koncentre loĝataj de nacimalplimultoj fondiĝis nacia aŭtonomio.

"La Leĝo pri Nacia Regiona Aŭtonomio de la Ĉina Popola Respubliko" publikigita la 31-an de majo, 1984, en leĝa formo difinis nacian regionan aŭtonomion efektivigatan en Ĉinio. Tio markis, ke la nacia regiona aŭtonomio de Ĉinio atingis novan etapon en sia disvolviĝo.

Nun en Ĉinio estas 5 aŭtonomaj regionoj, 31 aŭtonomaj subprovincoj kaj 104 aŭtonomaj gubernioj, entute 140 aŭtonomaj lokoj, kies areo konsistigas 63% de la tuta teritorio de Ĉinio. La estroj de la supre menciitaj aŭtonomaj lokoj senescepte estas membroj de la koncernaj nacimalplimultoj. En ĉiuj nacimalplimultaj aŭtonomaj regionoj laboras granda nombro da nacimalplimultanoj en fakoj politika, ekonomia, kultura kaj aliaj. □

## ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas en la 1-a de oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	950	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	1500	3000	4300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	14.00	23.00	33.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00



# La Ebenajo de Okcidenta Siĉŭan

Teksto de DA ŬEJ Fotoj de JAN GIN

Ĝinŝa-rivero, kiel limlinio inter la provincoj Siĉŭan kaj Junnan, fluas de Dukoŭ orienten. Ĝi enfluas tra la Ljangŝan-a jinnacieca regiono en Siĉŭan-basenon. Ĝi havas abundajn branĉojn. Inter ili la gravaj estas la riveroj Mingĝjang, Tŭoĝjang, Ĝjaling kaj Uĝjang, kiuj enfluas en Jangzi-riveron de sude kaj norde respektive kaj formis nesimetrian centripetan akvosistemon en la baseno. Laŭdire pro tio Siĉŭan ricevis sian nomon (ĉinlingve Siĉŭan signifas 4 riverojn).

Siĉŭan estas landinterna provinco ĉe la supra baseno de Jangzi-rivero en sudokcidenta Ĉinio. Ĝia nordokcidenta parto apartenas al la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, kie abundas arbaroj kaj herbaroj kaj prosperas arbarokulturo kaj brutbredado. Oriente

de ĝi kuŝas Siĉŭan-baseno kun areo de pli ol 200 000 kvadrataj kilometroj. Abunda akvo dotis la basenon per fekunda grundo, abundaj produktaĵoj kaj prosperaj agrikulturo kaj flankokupoj, tial ĝi estas honorita per la nomo naturdotita lando.

Duono de Siĉŭan-baseno estas kovrita de montetoj. Okcidente de ĝi sternaĝas aluvia Ĉengdu-ebenaĵo, alinome la Ebenajo de Okcidenta Siĉŭan. Ĝi, ĉ. 600 metrojn alta super la marnivelo, havas areon de 6 000 kvadrataj kilometroj. La ebenaĵo, kiel bazo de komerca greno de Siĉŭan-provinco, produktas ĉefe rizon kaj ankaŭ tritikon, maizon, bataton k.a. Dank' al la riĉa rikolto en la Ebenajo de Okcidenta Siĉŭan kaj aliaj regionoj en 1984, la totala grena produktokvanto de la provinco atingis


40 795 000 tunojn kaj kreis novan rekordon en la historio. Tiujare la pokapa meznombra grena posedado atingis 400 kilogramojn. Kvankam la provinco estis sinsekve atakata de naturaj katastrofoj en la lastaj du jaroj, en 1986 produktiĝis 39 238 000 tunoj da greno. Ekde la 50-aj jaroj Siĉŭan-provinco liveras ĉiujare al aliaj provincoj milionojn da tunoj da greno. Krome, la produktokvantoj de kotono, kolzosemoj, sukeroj kaj aliaj ekonomiaj plantoj okupas unuan lokon en la lando.


## DUĜJANGJAN, ANTIKVA AKVOUTILIGA KONSTRUAĴO

La riĉecon de Ĉengdu-ebenaĵo oni devas ŝuldi al la akvoutiliga konstruaĵo Duĝjangjan konstruita antaŭ 2 200 jaroj.

En pluveta tago mi veturis al la gubernio Ĝuanŝjan, 55 kilometrojn for de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉŭan-provinco. Akompanate de Ŝjaŭ Ŝi de turisma servo, mi vizitis la faman Duĝjangjan.

Duĝjangjan, akvoutiliga konstruaĵo en la meza baseno de Mingĝjang-rivero, situas ĉe la piedo de Julej-monto en Ĝuanŝjan-gubernio. Mingĝjang-rivero estas la plej akvoriĉa el la branĉoj de Jangzi-rivero ĉe la supra baseno. Ĝi fontas ĉe la piedo de Minŝan-monto ĉe la limo inter la provincoj Siĉŭan kaj Gansu.





*Granda magazeno de Ĉengdu konstruita en 1908*

Kvankam ĝia fonto distancas nur je pli ol 300 kilometroj for de Duĝjangjan, tamen ĝia niveldiferenco atingas 2 000 metrojn, sekve de tio, ĝi fluas tre rapide en sia supra baseno. Ĉe Ĉengdu ebenaĵo ĝia flu-rapido malgrandiĝas, kaj amasiĝas ŝlimo kaj ŝtonetoj, kio ofte kaŭzis superakvon. La akvoutiliga konstruaĵo evitiĝis la katastrofon.

Ni ascendis la antikvan konstruaĵon Fulong-templon en iu kvieta parko. Ŝjaŭ Ŝi konigis al mi, ke ĝuste de tie komenĉiĝas Duĝjangjan. La templo kun longa historio kaj gracia strukturo havas tri halojn unu post alia laŭvice, en kiuj eksponiĝas diversaj pentraĵoj, kaligrafiaĵoj, steleoj, tabuloj kun versparoj. Ascendinte la kioskon Hŭajgu de la templo, oni povas vidi la komencan parton de la kanalo 2 000 metrojn longan, kvazaŭ ŝarko kuŝanta en la centro de Minĝjang-rivero. Tie estas gorĝo de montoj, riveroj kaj ebenaĵoj. Okcidente de ĝi ondas montoj unu post alia kaj oriente de ĝi sterniĝas senlima ebenaĵo. Mi

informiĝis de Ŝjaŭ Ŝi, ke Duĝjangjan konsistas el la digoj Juzuj kaj Fejŝa kaj la enfluejo Baŭpingkoŭ.

La digo Juzuj dividas Minĝjang-riveron en riverojn internan kaj eksteran, la Ekstera Rivero, kiel la ĉefa fluo, forkondukas superakvon kaj la Interna Rivero irigacias la kampojn. Ordinare la akvo de la Interna Rivero konsistigas 60% de tiu de Minĝjang-rivero. Ĉe la inundo la proporcio ŝanĝiĝos inverse.

La digo Fejŝa forkondukas superakvon kaj ŝlimon kaj reguligas flukvanton. En seka sezono ĝi baras la tutan akvon de la Interna Rivero, kaj en pluva sezono ĝi forkondukas la superfluan akvon en la Eksteran Riveron.

La enfluejo Baŭpingkoŭ malsupre de la templo Fulong estas gorĝo de la Interna Rivero, tra kiu akvo el Duĝjangjan enfluas en diversajn irigaciajn kanalojn.

La tri konsistigaj partoj de Duĝjangjan estas racie kaj science aranĝitaj. Laŭ notoj en

historiaj libroj, prefekto Li Bing kaj lia filo en 256-251 a.K., laŭ la topografiaj kondiĉoj, per taŭgaj rimedoj kaj dediĉinte longan tempon, farigis la konstruaĵon, kiu ludas bonfikan rolon en irigaciado kaj inundo-preventado dum miloj da jaroj. Por memori pri Li Bing kaj lia filo, posteuloj konstruis ĉe Duĝjangjan la Templon de Li Bing kaj Lia Filo.

Descendinte la templon Fulong, ni vade trapasis la digon Fejŝa kaj ascendis la digon Juzuj. En tiu sezono en la Ekstera Rivero preskaŭ ne estas akvo, kaj ankaŭ akvo en la Interna Rivero apenaŭ superfluis la digon. Mi aŭdis, ke ĉiujare sur la digo turistoj estas forportitaj de inundo. Ŝjaŭ Ŝi diris al mi, ke en la pasintaj ĉ. 30 jaroj, la ŝtato firmigis kaj riparigis la akvoutiligan konstruaĵon Duĝjangjan. Oni konstruis elektran kluzon 13 metrojn altan kaj 100 metrojn longan en Juzuj kaj anstataŭigis la antaŭan digon el bambuaj plektaĵoj kaj ŝtonetoj per ferbetonaj instalaĵoj, kiuj povas kaj dividi inundakvon kaj forigi ŝlimon. Ĉiujare ĝi pliliveras al la irigacia regiono 1.9 miliardojn da kubmetroj da akvo. Tiel, la favorata areo de la konstruaĵo Duĝjangjan ampleksas ne nur ebenaĵon, sed ankaŭ sekan montetaran regionon kaj la irigaciata areo kreskis de 133 300 hektaroj al 533 300.

## VIZITO EN ĈENGDU

Kiam mi iris sur strato de Ĉengdu, mi estis kunpuŝata de homfluo kaj malfacile movis miajn piedojn. Tio ne estas miriga. Se vi dividas Ĉinion en du proksimume egalajn partojn sudorientan kaj nordokcidentan, vi do trovos kun miro, ke la loĝantoj de la sudorienta parto konsistigas 94.4% de la totala



*Legomoj liverataj al malproksimaj lokoj*

loĝantaro de Ĉinio, kaj tiuj de la nordokcidenta nur 4.6%. Mi ekiris de la fonto de Jangzrivero kaj de tie komencis mian vojaĝon. Mia vojaĝo estis farita plejparte en la nordokcidenta regiono loĝata maldense. Siĉŭan apartenas al la sudorienta parto kun cent milionoj da loĝantoj, el kiuj 70% loĝas sur la Ebenaĵo de Okcidenta Siĉŭan, unu el la troloĝataj regionoj en Ĉinio.

Ĉengdu estas la politika, ekonomia, kultura kaj trafika centro de Siĉŭan-provinco, kun areo de pli ol 3 800 kvadrataj kilometroj kaj 3 700 000 loĝantoj. En 316 a.K. ĝi jam ricevis la nomon. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ĝi estis nomata "broka urbo" pro sia evoluinta brokado. En la Kvin Dinastioj (907-960 p.K.) ĝi ricevis alian nomon "hibiska urbo" pro abundaj hibiskoj en la urbo. Ĝis nun oni ankoraŭ kutimas nomi ĝin per tiuj nomoj.

En tiu antikva kultura urbo kun longa historio konserviĝas multaj vidindejoj, kiaj temploj

de antikvuloj kaj terasoj kaj kioskoj por turistoj.

Mi venis al la Templo de Uhoŭ situanta en la suda antaŭurbo de Ĉengdu. Ĝi estis konstruita por memorigi pri Ĝuge Ljang, la ĉefministro de Ŝu-regno en la periodo de la Tri Regnoj (220-280 p.K.). Ĝuge Ljang estis eminenta politikisto kaj milita taktikisto en la ĉina historio. Li estas rigardata de la ĉina popolo kiel simbolo de saĝo.

Oni jam ne povas juĝi, en kiu jaro ĝi estis konstruita, sed ĝi ekestis almenaŭ antaŭ 760 p.K. Min tre interesas la tie impone eksponataj versimilaj homstatuoj, kvazaŭ diskutus pri io grava la civilaj korteganoj kaj generaloj.

Alia vidindejo, kiu ĉiam altiras turistojn, estas la Parko Kabano de Du Fu. En 759 p.K. Du Fu, fama poeto de Tang-dinastio (618-907 p.K.), fuĝis el la provincoj Ŝenŝji kaj Gansu al Ĉengdu kaj tie vivis kvar jarojn. Riparite de diversaj dinastioj, la kabano estas bone konservita.

Promenante sur strato de Ĉengdu, vi trovos tre baldaŭ, ke tie vendiĝas multaj etmanĝaĵoj. En la urbo funkcias kvankam nur pli ol 20 famaj lunĉejoj, tamen ankaŭ aliaj 3 000 hoteloj kaj restoracioj ĉiu vendas etmanĝaĵojn, kaj plie, estas nekalkuleblaj manĝaĵstandoj ambaŭflanke de stratoj.

Estas abundaj specoj de manĝetoj en la urbo. Laŭdire, estas pli ol 60 specoj de famaj manĝetoj. Gustumado taŭgas pli, ol vido kaj aŭdo, sekve, mi gustumis iujn el ili.

En la butikoj de gluecizaj farĉitaj buloj de Laj-familio mi ĝuis la bongustajn bulojn. Oni konigis al mi, ke Laj Jŭanŝin, la kreinto de gluecizaj farĉitaj buloj de Laj, ekvendis tiajn bulojn por sin vivteni en 1894. Liaj gluecizaj buloj farĉitaj el nigraj sezamsejoj precipe plaĉas al homoj, kaj iom post iom li famiĝis per la nomo "glueciza farĉita bulo de Laj".

La Ĉengdu-aj ĝjaŭzi-oj (farunaĵo kun farĉo), malpli grandaj ol la nordaj, karakteriziĝas per maldika tegaĵo kaj freŝa farĉo kaj estas delikate preparitaj. Oni manĝas la farunaĵon, verŝinte sur ilin kapsik-oleon, salon, ajlerojn kaj aliajn spicojn. Ili estas freŝaj, dolĉaj kaj salaj. Oni povas diri, ke vere superkvalitaj etmanĝaĵoj ili estas.

Unuvorte, etmanĝaĵoj de Ĉengdu, kun dolĉa, sala, acida kaj pika gustoj, estas diversaspecaj, kiaj vermiĉeloj, huntunoj, farunaĵoj kun farĉo, frititaj konfitaĵoj, kukoj, gluecizaj farĉitaj buloj, salatoj kaj supoj.


Multaj butikoj kaj standoj funkcias eĉ nokte. Ili, entreprenataj per malgranda kapitalo, gajnas malgrandan profiton per grandkvanta vendo. Ĉiuj etmanĝaĵoj estas ŝatataj. □





*Parto de Ĉengdu*

*En la Parko Kabano de Du Fu*






*Statuo de Li Bing en la templo  
dedicita al li kaj lia filo*



*Dujiangyan*









*En tetinkejo de urbeto* Foto de HŬANG TAŬPENG

*Kampoj* Foto de HŬANG LUKUJ



# *La Nuna Internacia Komercio kaj Disvolviĝantaj Landoj*

Kiel statas la nuna internacia komercio?

En 1980 la sumo de eksportaĵoj de la mondo atingis 1 997.8 miliardojn da usonaj dolaroj kaj kreis la mondan rekordon. Sed poste, la sumo malleviĝis kaj en 1983 ĝi atingis sian fundon. De 1984 la sumo malrapide kreskis. Materialoj de la Ĝenerala Kontrakto pri Tarifoj kaj Komercio montris, ke la totala sumo de eksportaĵoj en 1986 pliiĝis je 3.5% kompare al tiu de 1985, tamen ĝi estis ankoraŭ malpli granda ol tiu en 1980, kio kontrastis kun la rapida kresko en la 60-70-aj jaroj.

La stagnanta internacia komercio metas la disvolviĝantajn landojn en aparte malfacilan situacion.


Pro la malkreskanta bezono de la krudaj materialoj kaj kurzofalo, malleviĝis la totala sumo de eksportaĵoj de la disvolviĝantaj landoj. La proporcio de la sumo de eksportaĵoj de la mondo reduktiĝis de 28% en 1980 al 20% en 1986. Interalie, la proporcio de la naftoeksportantaj disvolviĝantaj landoj reduktiĝis de 15% en 1980 al 5% en 1986. Kvankam la komercio de la disvolviĝantaj landoj, kiuj ne eksportas nafton, pli-malpli pliboniĝis en la pasintaj jaroj, tamen ĝi ankoraŭ frontas al ten-

denco de malleviĝo, juĝate laŭ longdaŭra vidpunkto. Ĝia proporcio en la menciita kampo de la mondo reduktiĝis de 30% en 1950 al 21% en 1960 kaj 15% nuntempe.

La malboniĝo de komercaj kondiĉoj estas serioza por la disvolviĝantaj landoj. Materialoj de la Internacia Mona Fonduso montris, ke la prezaro por eksportitaj krud-materialoj de la disvolviĝantaj landoj en la periodo de 1981 ĝis 1985 malaltiĝis je 18.5% kalkulante laŭ neŝanĝita prezaro, sed tiu de iliaj importitaj fabrikitaj varoj altiĝis je 71.5%. Sole pro la kurzofalo la disvolviĝantaj landoj, inkluzive de la landoj eksportantaj nafton, perdis ĉ. 110 miliardojn da usonaj dolaroj, kio malfortigis ilian kapablon pagi debeton, malfavoris al ilia internacia en-kaj elspezo kaj plie malhelpis ilian ekonomian kaj socian disvolviĝon.

Krome, la disvolviĝantaj landoj multe suferas de la komerca protektismo praktikata de la evoluantaj landoj.

La komerca protektismo ne nur akriĝas komercajn frotojn inter la evoluantaj landoj, sed ankaŭ kaŭzas gravan damaĝon al la komercio de la disvolviĝantaj landoj. En la 60-70-aj jaroj la disvolviĝantaj landoj penis



*Sovetiaj vizitantoj en la Ĉina Komerca Ekspozicio en Moskvo*

disvolvi prilaboran industrion kaj porfabrikaĵan produktadon, rezulte de tio rapide disvolviĝis tekstila industrio kaj multaj aliaj branĉoj de la malpeza industrio. Iuj disvolviĝantaj landoj akiris progreson eĉ en industrioj ferŝtala, aŭtofabrikada, elektronika k.a. Tamen tio daŭris ne longe. En la komenco de la 80-aj jaroj la Okcidenta Eŭropo kaj Nord-Ameriko, la

ĉefaj lokoj, kien eksportiĝas produktoj de disvolviĝantaj landoj, senĉese intensigis limigojn al importado. La plej okulfrapa estas la limigo al importado de tekstilaĵoj kaj vestoj, farita de la Duflanka Limiga Kontrakto pri Plurspecaj Fibroj. Koncerne la vendadon de ŝtalo, aŭto, elektronikaj produktoj, duonkonduktiloj k.a., oni ankaŭ devas subskribi "Interkonsento pri Vendado en Ordo". Tiel la antaŭnelonge leviĝinta eksportado de fabrikitaj varoj de la disvolviĝantaj landoj estas katenita de la komerca protektismo de la evoluintaj landoj.

Laŭ statistiko de la Monda Banko, de 1981 ĝis 1986 la limigoj de netarifa muro praktikataj de Nord-Ameriko kaj la Eŭropa Komunumo kontraŭ importado, pliiĝis je pli ol 20%. En 1986 estis limigitaj 30% de la produktoj eksportitaj de la disvolviĝantaj landoj al la evoluintaj. La proporcio de komerco de la disvolviĝantaj landoj en tiu de la mondo reduktiĝis de 28% en 1980 al 19% en 1986. La totala sumo de la eksportaĵoj de la latinamerikaj landoj malkreskis de 104 miliardoj da usonaj dolaroj en 1981 al 86 miliardoj en 1986.

Kontraŭ la malrapida kresko de la vara komerco, rapide kreskis en la pasintaj jaroj la komerco pri laborservoj de la mondo. Turismo, valut-servo, teknika transdonado, informa komunikado k.a. jam fariĝis eroj de la internacia interŝanĝo. Laŭ statistiko de la Organizo de Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolvo, de 1970 ĝis 1986 la totala sumo de la komerco pri laborservoj de la mondo kreskis de 100 miliardoj da usonaj dolaroj al 1 000 miliardoj. La jara mez-nombra kresko estis 15%.

Tamen la komerco pri labor-

servoj malfavoris al la disvolviĝantaj landoj. Ĝia proporcio en la mondo estas malgranda, kaj plie, la sumo de la importaĵoj estas pli granda ol tiu de la eksportaĵoj. La defcito de la komerco pri laborservoj de la disvolviĝantaj landoj dum 1970-1982 kreskis de 3.9 miliardoj da usonaj dolaroj al 59.9 miliardoj. Tiukaze, iuj evoluintaj landoj proponis, ke la regularo pri "libera komerco" difinita en la Ĝenerala Kontrakto pri Tarifoj kaj Komerco estu aplikata ankaŭ en la komerco pri laborservoj, kio certe alportos pli da perdo al la disvolviĝantaj landoj teknike postiĝintaj, se ĝi realiĝos.

En la 80-aj jaroj la manko de mono bezonata de la disvolviĝantaj landoj fariĝis ĉiam pli serioza. En la Sesa Konferenco de Komerco kaj Disvolvo en 1983 iuj disvolviĝantaj landoj postulis, ke la evoluintaj landoj, kies normo de oficiala helpo al la disvolviĝantaj landoj ankoraŭ estas malpli ol 0.7% de la totala produktovaloro de ilia nacia ekonomio, atingu la normon antaŭ 1985, kaj neniom pli malfrue ol en la dua duono de la 80-aj jaroj, kaj atingu 1% kiel eble plej frue. Tamen, laŭ kalkulo de la sekretariato de la konferenco, en 1985 la sumo de la oficiala helpo de la membrolandoj de la Disvolva Helpa Komitato konsistigis nur 0.32% de la totala produktovaloro de ilia nacia ekonomio. Laŭ ciferoj publikigitaj de la Monda Banko, en 1986 la sumo de oficiala helpo donita de la 24 membrolandoj de la Organizo de Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolvo al la disvolviĝantaj landoj konsistigis nur 0.3% de la totala produktovaloro de ilia nacia ekonomio. El la evoluintaj landoj nur Norvegio, Nederlando, Danlando kaj Svedio atingis

la normon, sed neniu el la ĉefaj evoluintaj landoj atingis la normon. Inter ili la sumo de oficiala helpo donita de Usono kaj Japanio konsistigis nur 0.2% kaj 0.27% de la totala produktovaloro de ilia nacia ekonomio respektive. Lastatempe la Organizo de Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolvo publikigis, ke en 1986 la sumo de monprunto donita de la Monda Komerca Banko al la disvolviĝantaj landoj reduktiĝis de 52 miliardoj da usonaj dolaroj en 1981 al 5 miliardoj. Malgrandiĝis ankaŭ la sumo de la rekta investo de la evoluintaj landoj al la disvolviĝantaj landoj.

Samtempe la ŝuldo de la disvolviĝantaj landoj pli kaj pli grandiĝis. Malgrandiĝis ankaŭ ilia kapablo kvitigi sin kontraŭ la ŝuldo. Laŭ la ciferoj publikigitaj lastatempe de la Internacia Mona Fonduso, je la fino de 1986, la totala sumo de ŝuldo de la disvolviĝantaj landoj kreskis de 610 miliardoj da usonaj dolaroj en 1980 al 1 094.9 miliardoj. Kaj la nombro de la landoj, kiuj ne povis akurate kovri la ŝuldon, kreskis de 6 en 1980 al pli ol 40.

Konsidere al la tiel grava mal-ekvilibro en la internacia komerco, la dokumento ellaborita dank' al la klopodado de ĉiuj membrolandoj, precipe disvolviĝantaj landoj, en la Sepa Konferenco de Komerco kaj Disvolvo de UN okazinta aŭguste ĉi-jare klare montris, ke la merkato de la disvolviĝantaj landoj nun enprenas en sin pli ol 25% de la eksportaĵoj de la evoluintaj landoj, tial denove puŝi antaŭen la disvolviĝantajn landojn helpas al la ekonomia disvolvo neinflacia de la evoluintaj landoj. Ĝi montris ankaŭ, ke solvi la ŝuldan problemon en la kunlaboro inter la evoluintaj kaj disvolviĝantaj

(Daŭrigo sur p. 39)




## ĈINIO LANĈIS KAJ REVENIGIS SCIENC-ESPLORAN ARTSATELITON

La 10-an de aŭgusto Ĉinio refoje revenigis en difinita loko de centra Siĉŭan-provinco artsateliton por scienca esploro kaj teknika eksperimento.

La artsateliton lanĉis la Artsatelito-lanĉa Centro de Ĝiŭĉjŭan, Gansu-provinco, en la 5-a de aŭgusto, per la transporta raketo Ĉangĝeng n-ro 2. La artsatelito rivoluis laŭplane kvin tagojn en orbito por scienca esploro. Unuafoje ĝi faris teknikan eksperimenton en mikropeza medio.

La 12-an de aŭgusto Ĉinio redonis al franca kompanio du eksperimentajn aparatojn 15 kg. pezajn, kiuj estis kunportataj de tiu satelito. Ĉinio unuafoje servis tiuflanke al alia lando. La sukceso

*La satelito akurate revenas al la difinita loko.*



montras, ke Ĉinio povas ne nur irigi serion da transportaj raketoj de Ĉangĝeng-tipo en la internacian merkaton, sed ankaŭ servi al eksterlanda kliento per satelito.

## ĈINIO ANONCIS SIAJN REZERVOKVANTOJN DE ORO KAJ FREMDAJ VALUTOJ

La Ĉina Popola Banko informis, ke ĝis junio 1987 Ĉinio rezervis 12 670 000 uncojn da oro, fremdajn valutojn de 12.578 miliardoj da usonaj dolaroj kaj la restan sumon de la prunteprenita fremda mono de 8.304 miliardoj da usonaj dolaroj.

## EFIKAS LA REFORMITA ĈINA LABOR-DONA SISTEMO

Por utiligi multnombrajn novajn laborfortojn aperintajn ĉiujare, en la lastaj ok jaroj la ĉinaj urboj anstataŭigis la ŝtatan monopolan labor-donan sistemon per rekomendo far registaraj departementoj, memvola organizado kaj serĉo de profesio per si mem. La procentaĵo de senlaboruloj malleviĝis de 5.9% en la fino de la 70-aj jaroj al 2% nuntempe. De post 1979 pli ol 60 milionoj da homoj havigis al si okupon.

## PROGRESAS LA ŜIP-INDUSTRIO DE ŜANHAJO

Antaŭ nelonge en Hamburgo estis subskribita la kontrakto, ke la ŝipfarejo Hudong de Ŝanhajo faros grandan kontener-ŝipon por la kompanio Hapag Lloyd de FR Germanio. Kun totala ŝarĝkapablo de 42 000 toneloj, la ŝipo povos porti 2 700 kontenerojn, pli multe ol la ordinaraj kontener-ŝipoj.

Laŭ statistiko, de post 1980 Ŝanhajo liveris al FR Germanio, Italio, Norvegio, Usono, Pollando, Kubo, Aŭstralio, Egiptio, Singapuro, Malajzio kaj Hongkongo 68



*Eksterlandaj turistoj en Tibeto*

ŝipojn, kun totala ŝarĝkapablo de 548 200 toneloj. Nun ĝi faras kaj laŭkontrakte faros 21 ŝipojn kun totala ŝarĝkapablo de 311 500 toneloj.

## TIBETO SERVAS AL TURISMA EKSPEDICIO

Tibeto estas konata kiel la monda tegmento. Tie oni, utiligante la naturajn kondiĉojn de altega montaro kaj danĝeraj riveroj, funkciigis en la lastaj jaroj servon al la turisma ekspedicio nomata "Al la naturo", inkl. montogrimpado, flosado en rivero, skiado, kampajn biciklado, aŭtomobilado kaj motorciklado, ĉeval-rajdo kaj veturado per termobalono. En loko 5 000 metrojn super la marnivelo turistoj povas ĝui mirindajn pejzaĝojn de serako, neĝa monto, altebenaĵo lago k.a.

## ĈINIO OKAZIGOS EKSPOZICION DE MALBONKVALITAJ PRODUKTOJ

En decembro de la kuranta jaro la Malpez-industria Ministerio de

Ĉinio okazigos en Pekino ekspozicion de malbonkvalitaj produktoj, kiel malbonkvalitaj fridujoj, elektraj ventumiloj, lavmaŝinoj, bicikloj, horloĝoj, brakhorloĝoj, kofroj, elektraj bakujoj, elektraj term-tapiŝoj kaj elektraj harsekigiloj, kiuj vendiĝis en la merkato ekde la 1-a de januaro 1987 kaj estis neripareblaj. La ekspozicio celos averti la fabrikojn de tiuj produktaĵoj, ke ili prenu la kritikojn de vizitantoj kiel movforton altigi la kvaliton de siaj produktoj.

### PREVENTO DE AIDS-MALSANO

Strategie aids-malsano estas regebla en Ĉinio, diris s-ro Ĉen Mingang, la ministro de la Sanprotekta Ministerio de Ĉinio.

Li opinias, ke aids-malsano komunikigas ĉefe per sodomio kaj adulto, kiuj estas severe riproĉataj de la publika opinio kaj ne akcepteblaj de etiko kaj leĝo de Ĉinio. En Ĉinio oni povas bari la eniron de aids-virusoj per limigo de livero de sango-produktaĵo, severa malpermeso de ĝia importado kaj kvarantenigo de pasaĝeroj. Iuj fakuloj asertas, ke tradiciaj ĉinaj drogoj kaj korpo-saniga ekzerco ĉigong povas fortigi la imunecon de homa korpo kaj estas valoraj por esplora studo.

### SUKCESA REPLANTADO DE KRURO SUR ROMPITA BRAKO

11-jara knabino Meng Ŝin de Ŝenjang, Ljaŭning-provinco, perdis siajn maldekstrajn brakojn kaj kruron pro trajno-akcidento. Oni portis ŝin al la Centra Hospitalo de Ŝenjang. Kuracisto Ŝin Ĉangtaj kaj aliaj de la operacia grupo sub la traŭmatologia-ostologia sekcio kuraĝe uzis ŝian derompitan maldekstran kruron (jam difektitan kaj nereplanteblan) por ripari ŝian difektitan maldekstran antaŭbrakon, kaj post tio, ili replantis ŝian derompitan brakon. La kna-

bino bone resaniĝis post la operacio. Nun la replantita maldekstra antaŭbrako havas kutiman koloron, bonan formon kaj senton de tuŝo kaj doloro. Ŝi jam povas iom fleksi la fingrojn de la maldekstra mano kaj iom post iom reakiras aliajn funkciojn.

Fakuloj opinias, ke la operacio atingis la internacian avangardan nivelon kaj malfermis novan vojon tiuflanke.

### SUKCESA APARTIGO DE KORPE KUNLIGITAJ FRATINOJ


Antaŭ nelonge Liŭ Ziŝjan kaj aliaj kirurgoj de la Popola Hospitalo de Gŭangdong-provinco, post 4-hora operacio, sukcese apartigis du korpe kunligitajn fratinojn, kiuj enhospitaliĝis kvin tagojn post sia naskiĝo. Antaŭ la operacio ili ventre kunligiĝis pli ol 30 cm<sup>2</sup>. Tiam unu el ili febris kaj la alia vivis normale. Unu ploris kaj la alia dormis. Ili fekis kaj urinis en malsama tempo, sed havis saman sangopremon. Post la operacio unu pezis 2.4 kg. kaj la alia 2.55 kg.

### "KOMPLETA VERKARO DE BAKIN"

En Ĉinio iras streĉe la kompilado de "Kompleta Verkaro de Bakin", kiu entenos la 60-jaran laboradon de la granda ĉina literatura majstro kaj veterana esperantisto Bakin. Estas jam eldonitaj liaj unuaj tri volumoj kurantjare kaj eldonotaj la ceteraj en la venontaj kvin jaroj. La verkaro nombros 20-25 volumojn.

### LA BRONZA STATUO DE PUŜKIN RESTARIGITA EN ŜANHAJO

Ĉi-jare oni restarigis la bronzan statuon de la granda rusa poeto Puŝkin en ĝia malnova sidejo en Ŝanhajo. Lia statuo estis starigita en 1935 kaj forigita de japanaj



*La bronza statuo de Puŝkin restarigita en Ŝanhajo*

armeanoj dum la Dua Mondmilito. Ĝi restariĝis en 1947 kaj detruigis en la kultura revolucio.

### LA MALNOVA LOĜEJO DE DALAI RIPARITA EN ĈINGHAJ

La popola registaro de Ĉinghaj-provinco asignis 250 000 jŭanojn por ripari la malnovan loĝejon de Dalai-lamao XIV, kiu nun loĝas eksterlande. La riparado daŭris unu kaj duonan jarojn kaj finiĝis en junio ĉi-jare. La popola registaro de Ping'an-gubernio, la hejmloko de Dalai-lamao, konfidis la ateston pri lia dom-proprietulo al lia kuzino Ĉjilŭosaj, lia ununura parenco en Ĉinio.

# ORFIŜOJ

de ĜJI SING



Orfiŝoj estas tradicie montrataj en Ĉinio. Post longa kulturado multiĝis iliaj specioj. Ili plaĉas al rigardantoj per siaj movoj, koloroj kaj formoj.

La poŝtmarko-serio el 12 pecoj kun figuroj de fiŝoj estis emisiita la 1-an de junio 1960.





*La Sep Stel-rokoj*

Foto de **LIŬ ĜIBIN**